Ĉinio Koreio Japanio

Landoj similaj sed diferencaj



PETR CHRDLE

KAVA-PECH

Ĉinio
Koreio
Japanio

Landoj similaj sed diferencaj

PETR CHRDLE

KAVA-PECH

Ĉi tiun publikaĵon mi dediĉas al la rememoro de mia edzino Stanjo (Stanislava Chrdlová, 1954–2000), sen kies entuziasmo kaj sindediĉa kunlaboro mi verŝajne ne sukcesus starigi miajn kongresan kaj klerigan agentejon kaj eldonejon.

Petro Chrdle

Eldonejo: KAVA-PECH
Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice
https://kava-pech.cz/esperanto

© Petr Chrdle, teksto kaj fotoj (krom la foto sur la paĝo 204), 2022

ISBN 978-80-88326-24-3

Enhavo

Enkonduko 7

Gutoj de la historio 10

La landoj similaj, sed diferencaj 16

Enkonduko al la sekvaj tri ĉapitroj 36

Impresoj el Ĉinio 38

Impresoj el Koreio 82

Impresoj el Japanio 132

Enkonduko

Mi vizitis multajn landojn, kaj eŭropajn, kaj ekstereŭropajn, kaj de tempo al tempo mi prelegadas pri ili. Kaj ripete mi ricevadas demandojn, kial mi tiujn interesajn fotojn kaj rakontojn ne eldonas libroforme, des pli, kiam mi posedas eldonejon, do mi ne devus serĉi eldoniston. Mi do efektive komencis pripensi tion. Finfine ĉi-jare, kvankam mi ne kutimas fari novjarajn mempromesojn, ĉi-foje (sojle al la jaro 2021) mi ĝin faris: ĉi-jare mi devas verki la libron pri miaj vojaĝimpresoj. Kaj se ne, do neniam plu!

Origine mi pripensis, ĉu mi skribu pri Koreio aŭ Japanio (sinsekvo kiel mi la unuan fojon vizitis ilin), ĉar tio estas la landoj, kiuj hejmiĝis en mia koro, kaj kiujn mi ankaŭ plej bone ekkonis. Japanion mi vizitis dekfoje, Koreion sepfoje. Krome, mi havis bonŝancon tie restadi, kvankam mallongtempe, en diversaj medioj: en universitatoj, monaĥejoj, sed ankaŭ en familioj. Fine mi decidiĝis, ke mi enmetos en la libron ne nur ambaŭ landojn, sed ankaŭ Ĉinion, kie mi estis nur unufoje en Ĉina Popola Respubliko (ĈPR), aŭ el la vidpunkto de Tajvano „Kontinenta Ĉinio" kaj dufoje en Tajvano (oficiale Ĉina Respubliko, el la vidpunkto de ĈPR nuntempe ribelanta ĉina insulo, firma parto de ĈPR). Tial miaj spertoj de Ĉinio estas multe pli supraĵaj ol tiuj de la du ceteraj landoj. Sed malgraŭ tio, ankaŭ ĉi tiu grandega lando ravis min kaj lasis en mi multajn interesajn impresojn.

Verŝajne estus dece klarigi, kiel komenciĝis mia vojaĝado. Jam de la frua juneco mi ŝatis legi vojaĝpriskribojn; tamen, ĉar ĉe ni ne eblis reale vojaĝi*, mi vojaĝis almenaŭ en miaj imagoj kaj per fingro surmape. En la jaro 1991 gastis ĉe mi korea profesoro, doktoro de korea medicino kaj posedanto de

* Ĝis la jaro 1989 regis ĉe ni Komunisma Partio kaj por povi elveturi el la lando oni bezonis elirvizon, kiun tamen oni disponigis tre rare pro deĵoraj kialoj, kaj private nur escepte al speciale elektitaj homoj.

koreamedicina kliniko Puramo CHONG (ni interkonatiĝis pere de nia komuna hobio, Esperanto) kaj fine de lia restado li invitis min reciproke al Koreio. Li diris, ke same kiel li ĉe mi, mi estos lia gasto, povos loĝi kaj manĝi ĉe li, do ununura elspezo, kiun mi havos, estos la prezo de la flugbileto. Tion mi, vojaĝrevulo, devis akcepti!

Kaj kiam mi jam veturis tiel foren, mi „saltetis" por tri tagoj al Japanio viziti alian mian amikon, ĉar mi eĉ en sonĝo ne povis imagi, ke mi ankoraŭ iam povus havi bonŝancon viziti la foran Malproksiman Orienton (el la vidpunkto de mezeŭropano).

Tiu vojaĝo ravis min! Post la velura revolucio* oni jam povis vojaĝi libere sen bezoni la elirvizon, sed tio ne helpis miaokaze, ĉar mankis al mi la bezonata mono. Tial mi forlasis bone startintan karieron en Fervoja Esplorinstituto kaj Teknika Universitato, fondis Kongresan kaj Klerigan Agentejon kaj apud aliaj mi prizorgis ankaŭ licencon por entrepreni vojaĝoficejon. Tiun tamen nur kun la celo, ke ĝi ebligu al mi vojaĝi tra la mondo, kvankam kun la kondiĉo, ke mi devas anticipe trastudi la itineron por povi la grupon mem ĉiĉeroni.

La celojn de la vojaĝoj (kiujn mi nomis laŭ la kutimo en Esperantujo karavanoj) mi lasis al hazardo. Komence mi elektis tiun landon, kie okazis iu grava Esperanto-aranĝo, plej ofte la ĉiujara Universala Kongreso (UK). Al kutima unusemajna programo de la kongreso mi aldonis ĉiam unusemajnan ekkonigan programon laŭ vidindaĵoj de tiu lando. Kaj, ĉar mi havis inter esperantistoj bonan renomon kaj fidon kaj havis neniujn fiksajn kostojn, ĉar ĉiujn preparojn faris mi mem kun mia edzino Stanjo, mi ne celis mongajnon kaj estis por mi sufiĉe, ke oni pagis miajn dumvojaĝajn kostojn, mi neniam havis problemon trovi interesiĝantojn por miaj vojaĝofertoj. Baldaŭ miaj karavanoj fariĝis konataj en meza Eŭropo kaj aliĝadis al ili ankaŭ alilandaj esperantistoj el najbaraj (plurfoje ankaŭ el pli foraj) landoj, do la karavanoj fariĝis internaciaj jam ekde la unua renkontiĝo de la partoprenantoj en la flughaveno. Tial ankaŭ dekomence oni povis ĝui la komunikadon en Esperanto, kio estis tre agrabla kaj konvena preparo por la kongreso, ĉar multaj aktive praktikis Esperanton nur tre malofte. Oni devas imagi, ke dum la komenca tempo de niaj vojaĝoj la interreto estis preskaŭ nekonata, kaj se oni ĝin komencis uzadi, do nur korespondcele, tial la spertoj paroli vere mankis.

* La politikan ŝanĝon en novembro 1989 oni nomas kutime velura revolucio, ĉar ĝi okazis sen civitana milito aŭ alia sangoplena maniero.

Tiumaniere mi travojaĝis ne nur Ĉinion, Koreion kaj Japanion, sed ankaŭ ekzemple Aŭstralion, Singapuron, Brazilon, Israelon, kaj aliajn landojn. Post iom da jaroj, dum iu kunveno de la reprezentantoj de la ĉeĥaj turismaj entreprenoj turniĝis al mi posedanto de alia malgranda vojaĝoficejo Bortour, Jiří Jelínek, kiu organizadis karavanojn al aranĝoj de IML (*International Marching League*, Internacia Marŝa Ligo), kiu same kiel mi ankaŭ mem gvidadis siajn grupojn. Li diris al mi, ke li volus organizi ankaŭ la vojaĝon cele japanan tritagan marŝon, sed tion li ne kuraĝas. Ĉar li aŭdis, ke Japanio estas en mia programo, li petis min gvidi tien ankaŭ liajn marŝemulojn. Mi konsentis, la „marŝkaravano" estis sukcesa kaj sekvis ankoraŭ dufoje kun aliaj grupoj, nunkaze jam kombinita kun Koreio, Japanio kaj Tajvano (tiuj aranĝoj estas en tri sinsekvaj semajnfinoj, por ke la partoprenantoj el foraj landoj, ekzemple el Eŭropo, povu partopreni ĉiujn).

Intertempe mi ligis pli proksimajn rilatojn kun japanaj esperantistoj kaj estis invitita al kelkaj prelegvojaĝoj kaj ankaŭ por gvidi konversacian kurson en Tokio. Simile, kvankam en malpli granda skalo, tio okazis en Koreio.

Fine de tiu ĉi enkonduko mi volas ankoraŭ priskribi mian hezitemon rilate al la vicigo de la tri landoj en la titolo de la libro, same kiel en la propra verko. Unue mi volis la vicigon laŭ la alfabeto, kio estas verŝajne la plej kutima, poste mi kliniĝis al la vicigo tempa, do kiel mi ekkonadis la landojn, tiukaze Koreio, Japanio, Ĉinio, sed nenio plaĉis al mi, ĉar tio estus ĉiam malkonvena; ja mi havas la plejparton de la travivaĵoj el Japanio, pri kiu la ĉapitro estos certe la plej ampleksa, iom malpli el Koreio, kaj malplej pri la plej granda el la landoj, Ĉinio. Do mi decidis vicigi ilin laŭ la amplekso de la informoj, Japanio, Koreio, Ĉinio, sed ankaŭ tion mi ne konsideris konvena, ĉar post la tralego de sufiĉe detalaj priskriboj de tio, kion mi travivis en Japanio la leganto atendus minimume la samon pri la sekvaj landoj kaj estus seniluziigita de la troa koncizeco. Do finfine mi trovis la solvon: jes, mi vicigos ilin laŭ la amplekso, sed inverse; unue la plej grandan landon, Ĉinion, pri kiu mi tamen povos verki malpli, se mi volas resti ĉe miaj propraj spertoj kaj travivaĵoj, sekve Koreio, de kiu mi havas nekompareble pli da spertoj kaj rememoroj, kaj fine Japanion, kiun mi havis la bonŝancon ekkoni plej detale el ĉiuj. Mi esperas, ke tiu kialo estas komprenebla, kaj ke oni ne serĉos en ĝi ion alian, kaŝitan.

Kaj ankoraŭ unu grava rimarko: en la teksto estas skribitaj nomoj de aziaj personoj ŝajne Ĥaose, tial mi devas klarigi la kialon. Estas klarigite pli poste, ke en ĉiuj tri oni tradicie skribas unuavice familian nomon kaj nur post ĝi la propran. Sed multaj, precipe junaj homoj skribas laŭ la okcidenta maniero unue la propran nomon kaj nur post ĝi la familian. Tiun ilian preferon mi respektas ĉiam dum ilia unua mencio kaj en subtekstoj ĉe la bildoj. Kaj por klarigi, kiu estas kiu, mi skribas la familiajn nomojn majuskle. Sed sekve mi jam skribas ĉiujn nomojn laŭ niaj kutimoj, do unue la propran kaj nur post ĝi la familian, ambaŭ jam per majuskligitaj nur la unuaj literoj.

Gutoj de la historio

Estas ĝenerale konate, ke Ĉinio estas unu el la lululoj de la monda civilizacio. Estas preskaŭ nekredeble, kiel jam profunde antaŭ la komenco de nia jarnombrado sukcesis kreiĝi tiel grandega imperio kaj oni eĉ, pro timo de detruo de sia imperio pere de la barbaroj el nordo, komencis konstrui la grandan muron, kiu pro sia amplekso ne havas konkurencon ĝis nun. Temas pri miraklo de tekniko, kiun oni plej amplekse perceptas starante sur ĝi kaj rigardante, kiel ĝi etendiĝas multfoje trans krudaj montoj.

Ni rememoru almenaŭ la plej gravajn el multaj inventaĵoj, kiujn donis Ĉinio al la mondo. Por pli bona imago mi mencias ankaŭ daton de la ekesto (kvankam ne ĉiam ĝi estas precize konata kaj ĉe kelkaj temas pli pri supozo):

Papero: la 3a jarmilo antaŭ nia jarnombrado (plue a.n.jn.) el kanabfadenoj, en la jaro 105 la inventisto Cai Lun produktis la unuan modernan paperon surbaze de lignaj fadenoj.
Silko: la 3a jarmilo a.n.jn.
Nudeloj: proksimume 2000 a.n.jn., similaj al la hodiaŭaj spagetoj.
Porcelano: la 7a jc. a.n.jn. tiel nomata protoporcelano, la 7a jc. jam porcelano kiel ni ĝin konas hodiaŭ.
Akupunkturo: sojle al nia jarnombrado.
Kompaso: la 4a jc. a.n.jn., peco de magnetito (erco) naĝanta en akvo sur la ligna submetaĵo.
Teo: dum la dinastio Chan, do iam inter la jaroj 202 a.n.jn. kaj 220.
Seismografo: en la jaro 132, la imperiestra esploristo kaj astronomo Zhang Heng.



Granda Ĉina Muro

Pafpulvoro: la 3a ĝis 4a jc.: taoistoj por forigo de malbonaj spiritoj, nur pro la sonefikoj.

Monbiletoj: en la jaro 650 dum la imperiestro Kao Tsung.

Raketoj: en la 6a jc. por suprenpafo de artfajraĵoj, ekde la 13a jc. kiel batalilo.

Kluzo: la 6a ĝis 10a jc. (la datoj en unuopaj fontoj diferenciĝas).

Libropresado: la ĉina forĝisto kaj alkemiisto Bi Sheng (990–1051), Gutenberg ĝin adaptis al eŭropa skribo en 1455.

Kaj multaj aliaj, ĉe kiuj ni ne konas la tempon de la ekesto (alumetoj, ĉirkaŭkolo por tiri bruton, ludkartoj, …)

Mi aldonu, ke la ĉina civilizacio estas preskaŭ certe la ununura, kiu evoluis sen interrompo en unu loko ĝis la novepoko sen influoj deekstere. Unusola, kion ĝi transprenis deekstere, estis budhismo el Hindio, sed ankaŭ ĝin Ĉinio tre baldaŭ laŭplaĉigis al si.

Lulilo de la ĉina civilizacio estas riverbasenoj de grandaj riveroj, ĉefe Chuang-che kaj Jang-c-tiang, kie komencis evolui la plej malnova dinastio



Terakota armeo

de Xia. La unuajn skribajn memoraĵojn ni havas el la tempo de la dinastio Shang el la 16a jc. a.n.jn.

En tiu tempo tamen ne eblas ankoraŭ konsideri Ĉinion unueca. La kuniĝo okazis en la jaro 221 a.n.jn. dum la regado de la imperiestro Qin Shi Huang. Li ankaŭ komencis konstrui la Longan muron (nun nomatan Granda), ŝoseojn, sed ankaŭ la Imperiestran kanalon, la plej longan artefaritan akvoverkon en la mondo funkciantan ĝis hodiaŭ. Kaj li ankaŭ lasis por si konstrui grandegan armeon el terakota argilo, kiu restis kaŝita sub la tero ĝis la jaro 1974.

Ni transsaltu la longan kaj riĉan historion de Ĉinio, daŭrajn batalojn, invadojn de hunoj, lasu flanke la influon de religio kaj saltu al la 20a jc., kiam Ĉinio estis sub forta influo de Sovet-Unio, kies konsilantoj tie agis.

Tiutempe en la sudo de Ĉinio formiĝis movado sub la gvido de Chiang Kai-shek, ĝi efektivigis dekstreman puĉon, elĵetis la sovetiajn konsilantojn kaj la tuta Ĉinio eniris sub lian registaron kun la sidejo en la urbo Nankino. Post la dua mondmilito furoris la ĉina enlanda milito, dum kiu venkis

la komunistoj gvidataj de Mao Zedong kaj la nankina registaro sub la gvido de Chiang Kai-shek retiriĝis al la insulo Tajvano. En la jaro 1949 Mao proklamis la fondon de la Ĉina Popola Respubliko (ĈPR).

Sur la korea duoninsulo vivis homoj de pratempo. La plej malnovaj trovitaj produktoj de la homa kreo, la korea ceramiko, datiĝas ĉirkaŭ la 8a jarmilo a.n.jn., sed, diference de la ĉinaj konstruantoj kaj inventantoj, koreoj antaŭ ĉio okupiĝis pri agrikulturo. Temis pri pluraj memstaraj regnoj, kiuj ofte interbatalis. Estas konsiderate, ke Koreio estas fondita de Dangun en la jaro 2333 a.n.jn.

La elstara monarĥo, kiu grande prosperigis sian dinastion, estis la reĝo Seĵong la Granda (1397–1450), kiu faris gravajn administrajn, ekonomiajn kaj sociajn reformojn kaj krome li estas konsiderata iniciatinto aŭ eĉ kreinto de la korea skribo nomata Hangulo, kiun oni uzas ĝis nun, kaj kiun pluraj lingvistoj konsideras la plej perfekta en la mondo.

Tamen tio havas ankaŭ malbonan flankon. Onidire post la enkonduko de Hangulo oni neniigis ĉiujn antaŭajn dokumentojn skribitajn en la ĉinaj ideogramoj kaj tial nebuligis sian propran historion.



Seĵong la Granda

En la historio de Japanio, kiel insula popolo, ŝanĝiĝas periodoj de memvola izoliĝo disde la ekstera mondo kaj male periodoj de transpreno de fremdaj modeloj. Jam ĉirkaŭ jaroj 10 000 a.n.jn. tie ekzistis kulturo karakterizita per specifaj specoj de ceramiko, kion atestas la arkeologiaj elfosaĵoj. Tio signifas, ke temas pri la plej malnova ceramiko en la mondo.

Granda evoluo de Japanio komenciĝis inter la jaroj 538 ĝis 710 (erao Asuka), kiam oni komencis konstrui la centralisman ŝtaton laŭ la modelo de Ĉinio, inkluzive de la tribunala sistemo. Kaj ĉefe, tiutempe japanoj komencis akcepti

budhismon kaj la ĉinan skribon. Ekde tiam ni jam havas la unuajn japanajn skribajn dokumentojn. Antaŭ tiu tempo ekzistis la unuaj skribaj mencioj pri Japanio nur en ĉinaj dokumentoj, la plej malnova konata de la jaro 58.

El la epoko de Asuka devenas ankaŭ la unua japana kroniko priskribanta legendojn, laŭ kiuj la japana nacio devenas rekte de dioj.

Kiel la komencon de la nuntempa japana historio eblas konsideri la eraon Nara (710–794). La unua ĉefurbo de la kunigita Japanio fariĝis Heijookjoo (nuntempa Nara). La dua ĉefurbo de Japanio (794–1868) fariĝis Heiankjoo, poste nomata Mijako, Saikjoo, de la jaro 1868 Kioto.

La situacio rilate al la regado en Japanio estis tamen pli komplika. La imperiestro rezidis en Kioto ĝis la jaro 1868, sed lia potenco estis tre malforta kaj la efektivaj regantoj estis samurajoj (militistoj) fronte de ŝoguno, la militista estro. Tial oni ofte parolas pri lia rezidejo, la urbo Kamakura, kiel pri la fakta ĉefurbo de Japanio kaj tiun tempon, 1185–1333, oni nomas la epoko de Kamakura.

En la jaro 1603 la ŝoguno kun sia administraro translokiĝis al Edo (de 1868 Tokio), kiu fariĝas pro tio la nova fakta ĉefurbo de Japanio, kvankam la imperiestro plu setlis en Kioto. Sed kiam en la jaro 1869 moviĝis al Tokio ankaŭ la imperiestro, la urbo pro tio fariĝis la ĉefurbo de Japanio ankaŭ formale.

Tiu dudeka jarcento!

Same kiel la historion ĝis ĉi tien, ankaŭ la komplikan 20an jarcenton, kiu estas ankoraŭ viva por multaj nuntempuloj, mi ĉiuokaze ne volas analizi. Unue pro tio, ke mi ne estas historiisto, krome en fontoj la proksima historio estas priskribata tre diference, laŭ tio, ĉu la aŭtoro klinas pozitive al Ĉinio, Koreio aŭ Japanio, do se mi volas resti objektiva, mi devas trasalti tiun eventoriĉan tempon.

Malgraŭ tio mi mencios kelkajn nerompeblajn faktojn, kiuj montras ne nur la kruelecon de la tiutempaj eventoj (parenteze, en Eŭropo la situacio pro la du mondmilitoj ne estis pli milda), sen tio, ke mi esploru, kiu kion kaŭzis kaj kiuj estas la konsekvencoj. Tamen mi menciu almenaŭ tion, kio samas en en la diversaj fontoj, ke la agresema estis kutime Japanio. Krome,

mi envicigis nur tiujn, kiuj speguliĝas ĝis ĉi tiu tempo de la 21a jarcento, kaj kies postsekvojn mi sentis ankaŭ dum miaj vojaĝoj.

La dua Ĉina-Japana Milito 1937–1945 (la unua estis jam en la jaroj 1894-1895) gvidis al la engaĝiĝo de Japanio en la duan mondmiliton en alianco kun Germanio kaj Italio. Post la malvenko de Japanio restis en ĝi (precipe en la plej suda insulo Okinava) usonaj militistaj trupoj, kio ĝis nun de tempo al tempo kaŭzas maltrankvilon inter la japanaj civitanoj.

La Ĉina Civitana Milito daŭris kun paŭzoj de la jaro 1927 ĝis decembro 1949, ekde kiam Ĉinio estas disigita al ĈPR kaj Tajvano. Tiurilate mi volas atentigi pri diversaj nomoj, kiujn eblas renkonti, kaj kiuj estas iam konfuzigaj: el la vidpunkto de ĈPR estas Tajvano nedisigebla parto de ĝi, nur momente regata de ribelantoj. Sed el la vidpunkto de Tajvano, ĝi nomiĝas Ĉina Respubliko, dum ĈPR estas nomata Kontinenta Ĉinio. Nu, mi neniukaze volas juĝi ilin, mi nur klarigas la diversajn nomojn.

La Korea Milito (1950–1953) estis kruela militkonflikto inter Korea Popoldemokrata Respubliko (Norda Koreio) subtenata aktive de Ĉinio kaj „morale" kaj per liverado de armiloj de Sovet-Unio (sed ankaŭ de Ĉeĥoslovakio) unuflanke, kaj Suda Koreio subtenata de Unuiĝintaj Nacioj (UNO) kaj aktive precipe de Usono aliflanke. La rezulto estas terura: mortigitaj aŭ netroveblaj 2,5 milionoj da koreoj, 33 000 usonanoj, 3000 apartenantoj al la trupoj de UNO kaj 900 000 ĉinoj. Ĝis nun ne estis nuligita la milita stato inter la du Koreioj kaj validas nura armistico, tre fragila de tempo al tempo. La du landojn dividas la demarkacia linio iom norde de la 38a paralelo.

Ankoraŭ grava atentigo: mi menciis enkonduke, ke mi estis sepfoje en Koreio, do nun mi devas tion precizigi, ke temis ĉiam pri Suda Koreio. Nordan Koreion mi neniam vizitis kaj do mi neniam mencios ĝin en la sekvaj tekstoj. Tial, se mi nomos Koreion, ĉiam mi pensos pri Suda Koreio, oficiale Korea Respubliko (nur pro koncizeco) kaj ne Nordan Koreion, oficiale Korean Popoldemokratan Respublikon.

La landoj similaj sed diferencaj

Ĉinio, Koreio, Japanio: el nia mezeŭropa rigardo temas pri tri landoj en Fora Oriento, kiuj uzas por ni strangan nekompreneblan skribon. La homoj similas unu al la alia kaj estas diferencaj de ni, ilia plej kutima nutraĵo ne estas pano kaj terpomoj, sed rizo, rizo kaj denove rizo, ĉiuokaze ili trinkas verdan teon, anstataŭ uzadi normalan manĝilaron (kompreneble „normalan“ el nia vidpunkto), ili uzadas por manĝi bastonetojn, kaj anstataŭ manpremo ili sin klinas, …, resume dirite, en niaj okuloj ili estas la samaj kaj havas sian orientazian kulturon.

De la supre indikitaj imagoj pri tiuj tri popoloj multo veras, io malpli, kaj io ne, precipe ke ili estas la samaj. Do antaŭ ol mi komencos sinsekve prezenti la popolojn kaj vivmanierojn de tiuj tri landoj, kiel mi ilin ekkonis, mi strebos montri la diferencojn.

Diferencoj kaj diferencoj

En la enigma titolo ne estas eraro. Mi volas montri du specojn de diferencoj, nome la diferencojn inter Eŭropo, kie mi vivas, sed kies kulturo almenaŭ en la okuloj de koreoj kaj japanoj estas konsiderata okcidenta, aŭ pli ofte amerika (komprenu usona), kaj ĉiuj tri priskribitaj landoj. Alivorte, mi strebos koncize priskribi la ecojn, kutimojn kaj etiketon, do kio decas kaj kio maldecas, kiuj estas en ĉiuj tri landoj pli aŭ malpli la samaj, sed diferencaj de tiuj, kiuj regas ĉe ni. Tiuj diferencoj estas bone kompreneblaj ankaŭ por tiuj, kiuj konsideras „Foran Orienton“ kiel unu kulturon.

Sekve mi volas fokusiĝi al la dua grupo de diferencoj, por multaj pli surprizaj, nome al la diferencoj inter unuopaj tri popoloj kaj iliaj landoj.

Ambaŭ priskriboj de la diferencoj estas pure subjektivaj, kiel mi ilin dum miaj vojaĝoj vidis kaj perceptis. Bedaŭrinde, male ol en Koreio kaj



Grupo de lernejanoj (probable japanaj) en la korea subĉiela muzeo

Japanio, kie mi havis la bonŝancon konatiĝi kun diversaj medioj, kiel en familioj, tiel ankaŭ en universitatoj kaj en monaĥejoj, Ĉinion mi tiel bone ne ekkonis. Tio eĉ ne eblus pro ĝia grandeco kaj certe diverseco de la unuopaj regionoj, des pli kiam mi vizitis la „grandan" Ĉinion nur unufoje kaj Tajvanon dufoje, krome ĉiam nur por mallonga tempo kaj ligita al konkreta programo. Pro tio mi petas la leganton kompreni, kial la informoj pri la priskribitaj landoj kaj homoj en ili estas malproporciaj.

Iam mi hezitis, kien ion vicigi. Kiel ekzemplon mi menciu la kutimon kiel manĝi kaj uzi la manĝilaron. Ĉiu scias, ke ĉe ni la manĝilaro konsistas el kulero, tranĉilo kaj forko, kaj ke azianoj manĝas per bastonetoj. Tial ŝajnus logike, ke mi envicigu tion inter la unuajn diferencojn, do inter nia kulturo unuflanke kaj la orientazia duaflanke. Sed ne! Mi vicigos tion



Ĉinaj lernantoj sur la Placo de Ĉiela Trankvilo

nur en la duan grupon de diferencoj, ĉar mi fokusiĝos al la malpli konataj, tamen grandaj diferencoj inter ili.

Diferencoj „Okcidento" – „Oriento"

Mi komencu pri tio, kio tuj videblas sur la strato: **la lernantoj en uniformoj**, kiuj estas laŭ mia gusto iom malplaĉaj kaj malkomfortaj, precipe ĉe infanoj. Ekzemple en Japanio ili kutime konsistas el pantalonoj kaj jakoj el malhela ŝtofo, veŝto, kravato, ĉe malgrandaj infanoj ankoraŭ ĉapo. La ĉapojn mi laŭdas, ili estas tre praktikaj ĉefe en turisme allogaj lokoj, kie svarmas infanaj grupoj, ĉar aparteneco al iu grupo klare videblas kaj la infano ne tiel facile perdiĝas. En Ĉinio mi vidis la lernejajn uniformojn pli helaj kaj por miaj okuloj pli plaĉaj.

Krome, se temas pri malgrandaj infanoj de infanĝardeno, tiuj ne bezonas iujn teknikajn rimedojn por teni sin kune (kiel ĉe ni ŝnuron kun teniloj), sed ili devas iri unu post la alia kaj ĉiu devas tuŝi per unu mano



Koreaj infanoj en muzeo en Seulo

la ŝultron de tiu antaŭ si. Mi supozas, ke, se iu liberiĝus de la ŝnuro, la instruistino tion ne tuj devas rimarki, sed se tio okazus en la priskribita sistemo, tuj ekestus du vicoj, kiuj malproksimiĝas. Mi trovis tion tre praktika. Verdire, mi vidis tiun ĉi sistemon nur en Koreio, sed supozas ĝin aŭ ion similan ankaŭ en Japanio kaj Ĉinio.

Se mi jam parolas pri infanoj, kio ankaŭ diferencas de niaj stratoj estas, ke mi nenie en la priskribitaj landoj vidis infanĉaretojn. La infanojn oni ĉiuokaze portas. Sed kiel, al tio mi revenos en la sekva subĉapitro.

Ĉie, kie mi estis, la **necesejoj** estis uzeblaj senpage. Tamen, kun ununura escepto, kie mi devis pagi por uzi la necesejon (dum miaj vojaĝoj; mi ne kuraĝas aserti, ke tio estas vere ununura loko en tiuj landoj), estis tie, kie mi ne atendus tion: sur la japana sankta monto Fuĵi: kiel sur la pinto (3776 m), tiel ankaŭ en la ripoz-stacioj survoje. Mi supozas, ke la kialo estas, ke tie akvo estas ege valora, do multaj grimpantoj devas iom kontribui.

Banĉambroj kaj pantofloj. En Ĉinio mi vizitis neniun hejmon, sed mi supozas, ke la sekvaj fenomenoj, kiujn mi renkontis en Japanio kaj Koreio,

validas ankaŭ tie. Kaj koreoj, kaj japanoj, venante hejmen, demetas siajn ŝuojn tuj ĉe la enirejo kaj surmetas ĉiam preparitajn pantoflojn. Tio ne mirigis min, ĉar tiu kutimo regas ankaŭ en la plejparto de la ĉeĥaj hejmoj. Sed en tiuj pantofloj oni ne rajtas eniri necesejon aŭ banĉambron, kie estas preparitaj specialaj necesejaj aŭ banĉambraj pantofloj. La kialo klaras, ĉar precipe en banĉambro estas ĉiutempe malseka planko. Mi, altstaturulo preskaŭ dumetra, ne devas verŝajne aldoni, ke la preparitaj „universalaj" pantofloj ne taŭgis por miaj piedoj, do mi ĉiam revenis el banĉambro kun malsekaj ŝtrumpetoj. Kiam mia japana amiko TUTOMU Niŝio legis malneta͡jon de ĉi tiu teksto, li reagis, ke ĉe li hejme oni ne uzas apartajn pantoflojn por necesejo, nek por banĉambro. En banĉambron oni eniras kun endomaj pantofloj se la planko estas seka, se ĝi malsekas, do nudpiede. Mi do aldonas, ke kion mi priskribis, ne estas ĝenerala regulo en ĉiuj japanaj (kaj verŝajne ankaŭ koreaj) hejmoj, sed ĉe Tutomu mi ne gastis. Kaj ĉie, kie mi gastis, regis la regulo, kiun mi priskribis pli supre.

En Japanio estas plia devo demeti pantoflojn antaŭ eniro en tradician tatam-ĉambron (ofte nur unu en loĝejo aŭ familia domo, kaj ne ĉiuj ĝin posedas), ĉar al tatamo oni povas treti nur en ŝtrumpetoj. Sed al la tatam -ĉambroj mi revenos en la ĉapitro pri Japanio.

Bankuvo. Pri Ĉinio mi ne scias, sed kaj en Japanio, kaj en Koreio la bankuvo en la banĉambro ne servas por lavi sian korpon en ĝi, sed por ĝui ĝin trankvile kuŝante kaj ĝuante ripozon. La korpon oni devas anticipe bone purigi antaŭ la bankuvo helpe de duŝilo. Estas klare, ke ĉiu planko de banĉambro havas akvodefluilon kaj certe jam estas pli bone komprenebla la neceso havi specialajn pantoflojn por eniri la banĉambron.

Hoteloj. Dum en niaj eŭropaj landoj hoteloj provizas loĝigajn servojn por tranokto aŭ restado dum pluraj tagoj, kaj se ekzistas po-horaj hoteloj, do ili servas nur por tiu celo, en Koreio kaj Japanio (en Ĉinio mi ne renkontis tion kaj dubas pri tiu sistemo ankaŭ tie) en pluraj hoteloj estas indikita prezo ne nur por unu nokto, sed ankaŭ por 4 horoj kiam ajn dumtage. Mi supozas, ke en luksaj hoteloj tio ne validas, sed tie mi ne restadis, do mi ne scias.

Manpremo kaj kliniĝo estas specifa afero. Ĉiuj scias, ke ĉe ni estas kutimo dum la renkontiĝo manpremi kaj en tiuj „foraj" landoj kliniĝi. Sed ofte

okazadas paradoksoj. Same kiel mi volis montri, ke mi scias, kio decas, kaj mi kliniĝis, la persono kontraŭ mi volis ofte montri, ke li aŭ ŝi scias, kio decas en mia lando, do li aŭ ŝi antaŭeniris kun sia mano preparita por manpremi. Klare, tio estas gaja afereto, nur por rideti, se orientano proponas manon por manpremi kaj eŭropano kliniĝas. Sed, nur post kiam mi jam estis plurfoje en Koreio kaj Japanio, mia bona japana amiko atentigis min, kiel ridinda estas mia kliniĝo! Kliniĝante (kaj mi ĝis tiam esperis, ke dece), miaj manoj moviĝis malantaŭ la pozicio de la dorso, kio estas por ili ridinda kaj tiel almenaŭ japanoj karikaturas en filmoj kaj ilustraĵoj mallertajn okcidentanojn. Nur post tiu atentigo mi rimarkis, ke ili, kliniĝante, metas siajn manojn al femuroj. Mi do, ne konsciante tion, amuzis japanojn kaj koreojn kiel okcidenta klaŭno.

Nomkartoj. Nomkartoj estas tre popularaj kaj preskaŭ ne eblas ne interŝanĝi ilin dum la reciproka prezentado. Kion mi nun ĉi tie priskribos, tio ne plu validas dum lastaj jardekoj, ĉar jam regas ĝenerale uzata kutimo, ke oni skribas la ĉefan (familian) nomon per majuskloj, dum la aldonan (personan) nomon per nur la unua litero majuskla. Sed ankoraŭ en la naŭdekaj jaroj mi estis ofte konfuzita, ĉar mi ricevis nomkarton, sur kiu estis skribitaj ambaŭ nomoj per nur unu majuskla litero. Oni povas pensi, ke tio ja ne gravas, oni ja konas la sinsekvon. Sed ho ve! En ĉiuj priskribitaj landoj oni skribas historie unue la familian nomon kaj post ĝi la aldonan. Sed multaj por montri sian „modernecon" skribas inverse unue sian aldonan kaj nur poste familian nomojn. Nu, bele, sed – la problemo okazas, se oni serĉas iun kaj demandas pri aldona nomo, kiun neniu konas, ĉar tiujn kutime oni ne uzadas, eĉ ne inter amikoj. Sed kiel mi jam menciis, dum miaj lastaj vizitoj mi jam renkontis nur la nomkartojn skribitajn en diversa sinsekvo, sed ĉiam la ĉefa nomo per majuskloj.

Mi ankoraŭ aldonu, ke kion mi priskribis, validas nur por edukitaj personoj, kiuj havas unuflanke de la nomkarto la tekston en sia lingvo kaj dorse en la latina skribo. Sed ofte mi ricevis nomkarton eĉ arte belegan, sed nur unuflankan, do nur skribitan en la loka alfabeto. Tial se mi tuj ne alskribis la nomon fonetike, ĝi restis por mi komplete neutila. Tamen, jes ja, se mi venis ien kaj serĉis iun, mi povis montri la nomkarton. Sed la ĝustan, kio ĉe malordemulo, kiu mi estas, ne simplas! Bedaŭrinde ankaŭ al

mi okazis, ke mi supozis, ke mi montras la ĝustan, sed montris nomkarton de iu alia, en tiu loko nekonata persono!

Subskriboj. En la latina alfabeto ni subskribas nin mane kaj la subskribo validas kiel identigilo de la persono, tial oni povas havi konservitan modelan subskribon ankaŭ ĉe bankoj kaj aliaj gravaj instancoj. Sed tio ekzistas en neniu de la priskribitaj landoj. Tial ĉiu ĉino, japano aŭ koreo posedas sian identigan stampilon, kiun li aŭ ŝi devas tre bone gardi, ĉar tio estas la ununura ebla aŭtentikigilo de dokumentoj, eĉ de tiuj plej gravaj.

Piedoj. Piedoj estas verŝajne por japanoj io malpura, malgraŭ tio, ke ili estas tre puremaj. Ĉe koreoj tio validas en iom malpli granda skalo, pri ĉinoj mi ne scias. Faru eksperimenton mem: enmanigu iam al iuj japanoj, kiuj ja svarmas ekzemple en Prago, vian fotilon kaj petu pri foto de vi. Li aŭ ŝi volonte fotos vin kaj vi mem vidos, ke malgraŭ tio, ke super via kapo estos granda spaco plenigita per ĉielo, certe mankos viaj piedoj, ĉar la foto estos sube tranĉita ie inter viaj piedoj kaj genuoj. Kaj sidante streĉi piedojn kontraŭ iu estas laŭ la orientaj reguloj unu el la plej grandaj maldecaĵoj.

Nazpurigado! Nazpurigadon oni konsideras eligo de malpuraĵoj el la korpo, same kiel maltrinkadon aŭ malmanĝadon, tial eblas fari tiun proceduron nur private, prefere en necesejo. Por demonstri tion, mi povas mencii unu travivaĵon el Prago: ĉe mi gastis mia amiko, korea profesoro pri ekonomio, do persono, kiu relative ofte vojaĝis. Unu duontagon mi havis iun neforŝoveblan devon, tial mi petis mian konatinon, studentinon kaj esperantistinon, ke ŝi gvidu lin tra la malnovurba centro kaj kastelo de Prago. Tion ŝi volonte plenumis kaj vespere mi demandis lin, kiel li estis kontenta pri ŝia ĉiĉeronado. Li ege laŭdis ŝin, tamen post iom da hezito li aldonis, ke en unu momento li devis honti pro ŝi kaj ekstariĝis flanken, kvazaŭ li ne apartenu al ŝi. Mi kun timo demandis lin, kion do teruran ŝi faris. Li respondis, ke mi imagu, ke meze de la kastela korto, inter amaso da homoj, ŝi deprenis poŝtukon kaj komencis publike purigi sian nazon, eĉ iom laŭte! Kaj eĉ pli terure, tiun malpuran poŝtukon ŝi remetis en sian poŝon! Ĉe la rakonto li faris tian grimacon, ke mi ekkomprenis, kiel terura travivaĵo tio devis esti por li.

Alian ekzemplon de la rilato de azianoj al la nazpurigado mi havas nerekte de mia japana amiko. Li rakontis al mi, ke li ĉeestis kun kelkaj kolegoj konferencon en Usono. Kaj tie, imagu, la preleganto interrompis sian prelegon kaj komencis antaŭ la publiko purigi sian nazon! Li diris, ke li nur rigardis flanken por ne vidi tion, sed lia kolego ne eltenis tion kaj devis forlasi la prelegejon.

Kiam mi la unuan fojon eksciis, pri kia maldecaĵo temas, mi iom hontis, ĉar mi antaŭ tio jam estis plurfoje en Koreio kaj Japanio, do eble senkonscie mi ankaŭ trankvile purigis mian nazon kaj remetis la tukon en la poŝon, sed poste mi iom trankviliĝis, ĉar mi ne rememoris, ke mi iam havis nazkataron; do, espereble mi tiel maldeca ne estis. Sed certe mi tion ne scias.

Mi menciu ankaŭ la malon, kio estas normala en Azio sed maldeca ĉe ni: kiam gastis ĉe mi japana profesoro kaj ni tagmanĝis, venis gaste ankaŭ mia filino (kiun mi anticipe ne informis), do ŝi ankaŭ kunmanĝis. Kiam dume nia gasto manĝis kaj laŭte signis, ke la manĝaĵo bongustas, mi vidis, kiel la filino paliĝas kaj deprimiĝas. Pli poste ŝi diris al mi, ke ŝi apud tiu barbaro komplete perdis emon manĝi kaj ke ŝi apenaŭ eltenis ne fuĝi. Mi do devis klarigi al ŝi, ke en lia kulturo tio ne nur ne estas maldeca, sed eĉ oni signas per tio, ke la manĝaĵo bongustas al oni, do temas pri la laŭdo de la dommastrino.

Donacoj. Ni kutimas post ricevo de iu donaco danki (unufoje) kaj tuj la donacon malfermi, ankoraŭ dum la ĉeesto de la donacinto kaj rigardi la enhavon. Sed tio estas en la priskribitaj landoj maldeca. Unue, la donaco devas esti tie perfekte pakita kaj devas esti transdonita en ioma kliniĝo kaj tenante ĝin per ambaŭ manoj. Same oni ankaŭ akceptas ĝin. Sekve la donacito kelkfoje dankas por ĝi, esprimas ĝojon de ĝi, sed metas ĝin flanken ne elpakitan. Estus tre maldece malfermi la donacon dum la ĉeesto de la donacinto! Tion mi trovis tre stranga, do en Japanio mi demandis pri la kialo. Mi ricevis la klarigon, ke tio ja gravas pro tio ke, se la donaco ne plaĉus al vi, vi ne montru tion per senvola gesto al la donacinto kaj per tio ne malgajigu lin aŭ ŝin.

Verŝado de trinkaĵoj el botelo. Ne nur en restoracio, sed ankaŭ en hejma medio, ne decas verŝi al si mem la trinkaĵon, aŭ eĉ meti unu botelon tre proksime al sia telero aŭ manĝujo, kvazaŭ vi volus montri *ĝi estas mia!* Ekzemple ni mendas kelkajn botelojn da biero. La kelnero enverŝos la gla-

sojn el unu botelo, kiam ĝi malplenas de la dua botelo ... kaj metos ilin mezen de la tablo. Se iu malplenigos sian glason, tiu devas atendi, ĝis iu rimarkos tion kaj replenigos ĝin. Dum la lastaj jaroj tio ne tro obstinas en Japanio, tamen, se vi volas esti bona kunestanto, bone observu kaj en la momento, se iu malplenigos la glason, dece proponu la plenigon kaj sen atendi la respondon faru.

Diferencoj inter unuopaj landoj

Mi promesis en la enkonduko de ĉi tiu ĉapitro, ke pri la manĝilaroj kaj la manieroj de manĝado mi skribos pli poste. Do jen:

Manĝilaro. Mi komencu per kulero. La ĉina estas el porcelano, ĝia tradicia ĉeranda dezajno estas rizo. La korea estas el metalo kaj japanoj tradicie tute ne uzadas kulerojn.

Bastonetoj ankaŭ konsiderinde diferencas. Mi ne parolas pri rapidmanĝejoj, kie oni en ĉiuj landoj ricevos simplajn lignajn bastonetojn por unu uzo, same kiel en flugmaŝinoj. Sed en la plejparto de la restoracioj kaj hejmoj oni obeas tradicion. La ĉinaj kaj japanaj estas plejparte lignaj, ofte tre bele ornamitaj. Sed, dum ĉe la japanaj estas en la suba parto tre maldikaj, kvazaŭ pikiloj, la ĉinaj estas sube ankaŭ iom pli maldikaj ol en la supra parto, tamen ne tiom. Kaj male, la tuta korea manĝilaro estas el metalo, do ankaŭ la bastonetoj. Krome, tiuj ne havas profilon rondan, kiel la ĉinaj kaj japanaj, sed platigitan.

Tamen, nun en okcidentstilaj hoteloj kaj restoracioj oni servas krom bastonetoj ankaŭ por ni kutiman manĝilaron kaj „usonece" aspektantajn homojn oni priservas tuj nur per „niaj" manĝilaroj, do turisto vivanta en okcidentstilaj hoteloj kutime la tradiciajn lokajn manĝilarojn eĉ ne renkontas dum la tuta turisma restado.

Manĝado. Rizon oni manĝas en Koreio per kulero, sed en Ĉinio kaj Japanio per bastonetoj. Ĉinoj kaj koreoj manĝas supon per kuleroj, sed en Japanio oni la supon trinkas. Tamen manĝante la tradician supon kun nudeloj kiel ĉefmanĝon oni manĝas nudelojn per bastonetoj kaj sekve trinkas la supon ankaŭ en Ĉinio. Rilate tion mi havas interesan sperton de la tempo, kiam mi gvidis en Tokio konversacian kurson de Esperanto. Mi



Klasilaj manĝilaroj (de maldekstre): ĉina, korea, japana. Dekstre nun oftaj universalaj por unu uzo

skribis unu tagon sur la tabulon en unu kolumnon manĝaĵojn kaj en la apudan trinkaĵojn.

Ĉiu, kiu iam instruis, scias, ke kvankam la instruisto estas turniĝanta al la tabulo, do dorse al la lernantoj, li sentas, ke en la klaso io ne estas en ordo. Mi do returniĝis kaj demandis, kio okazis. La respondo estis, ke mi faris eraron. Do mi ĉion atente relegis, sed vidis neniun eraron; tial mi demandis kiun.

Vi skribis supon inter la manĝaĵoj.

Nu, kio, ĝi ja estas manĝaĵo!

Post tio eksplodis rideto kaj la lernantoj rigardis min kvazaŭ strangulon. Mi tamen ne volis kapitulaci kaj diris al ili, ke survoje al la leciono mi manĝis en la bufedejo apud la lernejo bongustan legoman supon. Kaj denove rido.

Tio ja estis legomo en supo! Vi ja devis unue manĝi la legomon kaj sekve trinki la supon!

Tiun klarigon mi devis akcepti. Efektive, mi unue manĝis per bastonetoj la kuiritan legomon kaj poste trinkis de la bovlo la restantan supon. Kaj



Korea infana kapo ne bezonas subtenon...

per tio mi rimarkis, ke ne nur mi instruas al la lernantoj Esperanton, sed ankaŭ reciproke ili min pri la japana kulturo, nunmomente gastronomia.

Ĉetabla etiketo. Japanoj ĉetable prenas bovlon en la maldekstran manon kaj la dekstran uzas por manĝi per bastonetoj. Koreoj, same kiel ni teleron, lasas la bovlon kuŝi sur la tablo dum la tuta manĝado kaj iom kliniĝas al la tablo. Facile mi divenas eĉ du kialojn: japanoj tradicie manĝis sur la tero (tapiŝo), do estus tre malkomforte manĝi el la bovlo kuŝanta en la sama alteco, en kiu estas ilia sidtavolo, do tero. Sed koreoj ankaŭ sidas surtere, sed jam tradicie uzadis malaltajn tablojn. Krome, koreoj uzadas kuleron por manĝi rizon kaj supon, dum japanoj bastonetojn por manĝi la rizon kaj la supon ili trinkas.

Mi jam menciis, ke oni ne uzadas por la **transporto de infanoj** infanĉaretojn. Sed estas kaj precipe estis diferenco, kiel oni portas la infanojn. En Koreio la virinoj portas infanojn tradicie surdorse, dum japaninoj surbruste. Mi opinias, ke tio ankaŭ havas historian kialon. En Koreio virinoj

kutimis senpere post la nasko iri labori, plejparte surkampen, do la infano surbruste malhelpus al ilia laboro. Dum japaninoj tamen kutimis resti kun la infano pli longe hejme, do povis senprobleme portadi la infanon antaŭ si. Tamen, oni klarigis al mi, ke kvankam nun oni ne plu vidas en Japanio infanon surdorse de patrino, historie ankaŭ en Japanio oni portadis infanetojn tiel. Mi do notas tion, kvankam mi tion renkontis nur en Koreio.

Cetere, kiam mi vidis la koreajn infanojn surdorse, mi rememoris, kiel oni nin instruis, ke la malgrandaj infanoj ankoraŭ ne havas firme evoluigitan kolon, do ni devas ĉiam zorgi, ke la kapo estu ĉiumomente subtenata. Tiu regulo tamen ne validas por koreaj infanoj, kies kapo ofte svingiĝas dekstren maldekstren, suben, supren kaj iam eĉ dum tiu svingado la infaneto kontentige dormas. Por mi nekredeble.

Sidmaniero. En Ĉinio mi renkontiĝis nur kun sidado sur seĝoj, kiel ni ankaŭ kutimas. Sed mi supozas, ke tradicie ankaŭ en Ĉinio, same kiel ĝis nun en Koreio kaj Japanio la natura sidmaniero estis tio, kion ni (almenaŭ en Ĉeĥio) nomas sido laŭ turka maniero, nome kun la kruroj krucigitaj antaŭ si, do kun la genuoj antaŭen kaj piedoj kaŝitaj malantaŭe. Mi spertis ekzemple en korea familio, kie ni (ankaŭ miaj koreaj gastigantoj) sidis ĉe la tableto en komfortaj brakseĝoj kaj sofo, kiam venis maljuna panjo, ŝi interŝanĝis kun ni salutojn kaj pardonpete demandis, ĉu tio ne ĝenos nin, se ŝi eksidos „pli komforte“, kaj eksidis surtapiŝen kiel pli supre priskribite. Tio rememorigis al mi, kiam mi organizis vojaĝon tra Ĉeĥio por japanoj, ke pluraj el ili sidis en la aŭtobuso sur la busseĝo ankaŭ „pli komforte“, do kun la piedoj krucigitaj sur la seĝo sub si. Interese por mi estas, ke tiun sidmanieron japanoj nomas *justa sido*.

Tamen en Japanio dum pli festaj okazoj (kiel mi renkontis tion dum diservoj, en monaĥejoj ankaŭ ĉe labortablo aŭ en religia lernejo, aŭ dum te-ceremonio) la sidmaniero aspektas alimaniere, diference por viroj kaj virinoj. Ambaŭ estas surgenue, sed viroj ĉiam sidas havante la postaĵon sur la piedartikoj kun la pieddorso plate sur la planko (kion mi ne povis elteni), sed virinoj povas (sed ne devas) havi la sidmanieron iom pli simplan metante la krurojn flanken de si, kun la piedoj apud sia sidvango.

Skribo. Estas ĝenerale konate, ke la plej malnova skribo estas la ĉinaj signoj, nomataj kanĵi, kiuj estas ĝis nun uzataj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ





Japana festa sidmaniero:

Supre: baza

Maldekstre: pli komforta, permesita nur al virinoj

"동유럽은 여행하기 어려운 곳이다"는 상태에서 45일간의 여행을 마친 지금 "동유럽은 여행하기 좋은 곳이다"는 결론을 내리게 되었다. 그 이유는

첫째, 동유럽은 서유럽이나 미국•일본에 비해서 물가가 엄청나게 싸다. 일본가서 초라한 것보다 동유럽 가서 떳떳한 것이 훨씬 멋진 여행이라고 할 수 있다.

둘째, 서유럽보다 인심이 좋다. 부자보다 가난한 사람들이 더 잘 나누어 먹는다고 했던가. 20여년 이상이나 세계 각국에서 나그네 생활을 하였지만 떠나는 손님에게 점심을 싸주는 인정은 이번에 처음 느꼈다. 폴란드의 한 젊은이는 말했다. "손님은 집 안에서도 배불러야 하지만 돌아가는 도중에도 배고파서는 안된다."

Specimeno de korea skribo

en Japanio. La ĉinajn signojn transprenis por registro de sia parolado kaj la korea, kaj la japana lingvoj, kvankam nek por unu ili estas konvenaj. Tiel la skribo devis evolui por taŭgi al la propra lingvo, sed ĝia evoluo iris en ambaŭ landoj per alia vojo.

En Koreio jam la reĝo Seĵong komence de la 15a jarcento kreis bazon de propra originala skribo kaj iniciatis ĝian evoluon. Ĝi estas fonema kaj fonemojn apartenantajn al unu silabo oni skribas en kvadrateton kiel unu

ま え が き

外国の文化を知るにはまずその国の言語を知らなければならないというだれもが認めるあたりまえなことを，日本のもっとも近い隣国に関してあらためて強調しなければならない状況があります．槿域と呼ばれるむくげの花咲くこの隣国に対する日本人の関心が著しく高まったとはいえ，はたしてこの国を外国としてとらえているのか非常に疑わしい状況があります．ある人々はこの国の言語を学ぼうとさえしないで，この国についていとも安易に論じます．言語を通して外国としてのこの国の文化を理解することが今ほど要求されている時はありません．

本書は文字どおり朝鮮語の基礎を習得するための入門書として書かれました．学習人口が増えたとはいうものの，日本語と共通する漢字語が多く，日本語とシンタクスの似ている朝鮮語の場合，ともすれば新聞程度が読解できれば朝鮮語ができると思いこんでいる人も多いでしょうし，まるで文法の知識なしになんとはなしに片言を話す人もいるでしょうし，総じて学習者の水準は他の言語の学習者よりも決して高いとはいえないのが現状です．本書は段階を追ってできるだけ系統的に朝鮮語が学習できるよう配慮しました．本書は必ずしもやさしくはないかもしれませんが，一歩一歩きちんと学んでいけば，必ず本当の意味での基礎が得られるものと信じます．この国の文化を知るためにもまず言語から苦労してほしいものです．

朝鮮語のむずかしさはまず第１に発音にあります．朝鮮語は日本語やモンゴル語・トルコ語などと同じ膠着語ですから，語形の作り方それ自体は強調されるほどにはむずかしくありません．しかし語形が複雑に交替することがその特徴で，このため正書法はかなりむずかしいのです．本書は文字・発音・正書法の学習のためにかなりのページをさいてあります．むずかしさの第２点は文法的な形が極度に多く，それらが意味的に，また文体的に微妙なちがいを含んでいること です．本書には主として話しことばで多く用いられる文法的な 形を 中心に，

5

Specimeno de japana horizontala skribmaniero

apud la alia, tiel ankaŭ super sin. Do la korea skribo estas tre simple rekonebla, ĉar ĝi konsistas el vicoj de nekadritaj kvadratetoj, kiuj estas diversmaniere plenigitaj per signoj de fonemoj.

Kiam mi babilis kun korea amiko pri skriboj kaj nomis la korean komplika, kiun mi neniam kapablus lerni, li surprizis min per aserto, ke tiu ja estas multe pli simpla ol la latina, ĉar ĝi posedas nur 24 literojn, kiujn oni simple kunmetas en silabojn. Kiam mi reagis, ke tio estas simila nombro, kiun posedas ankaŭ la latina alfabeto, li forte malkonsentis. *La latina? Tiu*



ついこの間、フリートさん（ゲシュタポに逮捕されていた）が戻ってきて、すぐに結婚した。

72

一九四一年一〇月七日（火）
朝から好天気。午後も晴れ。
午後、エヴァとマニニへ行って、手押し車に乗って遊んだ。
午前、スラーヴェクに『二つの大洋をヨットで横断』を借りた。

一九四一年一〇月八日（水）
終日いい天気。
午前中、学校。午後、マニニ。セイタカアワダチソウを摘んだ。夜、リアンカがエヴァのスケッチを見にやってきた。

Specimeno de japan vertikala skribmaniero

ja havas proksimume cent literojn! Kaj li pravis, mi tute ne pripensis, ke oni devas lerni anstataŭ unu litero ĉiam tuj kvar: minusklan kaj majusklan por manskribi kaj minusklan kaj majusklan por povi legi la presitan tekston. Tiun komplikaĵon de la latina skribo mi rimarkis nur dum la dialogo kun tiu koreo fiera pri sia simpla kaj logika skribo!

Male en Japanio. La ĉinaj signoj, kiuj prezentas kompletajn vortojn, konserviĝis, kvankam nur por ĉefaj vortoj (pli-malpli respondantaj al substan-

tivoj, adjektivoj kaj verboj). Kaj tiuj estas kombinitaj en la frazo kun du silabaj alfabetoj: hiragana, kiu konvenas por la registro de origina japana lingvo, sed ne kapablas registri tiel nomatajn „fremdajn" vortojn (nejapanajn vortojn transprenitajn el aliaj lingvoj, ĉefe el la angla, aŭ nejapanajn nomojn). Al tiu celo servas la tria alfabeto, ankaŭ silaba, nomata katakana. Do la japanan tekston eblas simple distingi de la ceteraj signaj lingvoj, ĉar en ĝi videblas sinsekve kaj la komplikaj ĉinaj signoj, kaj la pli simplaj silabaj signoj de katakana kaj hiragana.

La japana skribmaniero eĉ pli komplikiĝas, ĉar ĝi uzas ĝis nun du sistemojn de skribo. Do vi povas vidi en japana librovendejo apud si librojn, kiuj estas skribitaj unu en kolumnoj de supre suben kaj de dekstre maldekstren, kaj aliajn skribitaj kiel per la latinaj literoj, do en linioj de maldekstre dekstren. Tial ĉe la unuaj estas la titolpaĝo malantaŭe (el nia vidpunkto, do pli precize ĉe kovrita libro montranta titolpaĝon estas ĝia spino dekstre), ĉe la duaj estas la libro aranĝita same kiel se ĝi estus skribita per latinaj literoj.

Sed tio ne estas ĉio. Se oni skribas la tekston vertikale, oni uzas por registri ciferojn la klasikajn ĉinajn signojn, sed se oni skribas horizontale oni uzas la arabajn ciferojn same kiel la latina skribo.

Estis por mi granda ĝuo observi japanon ĉe komputilo tajpi. Fakte li vere tajpis nur uzante silaban skribon, do hiraganan kaj katakanan. Ĉiam, kiam li skribis iun ĉefan vorton, aperis elektocele pluraj ĉinaj signoj kaj li elektis la ĝustan. Tial oni povas teorie skribi ĉiujn tekstojn sen tajpi ĉinajn signojn, sed praktike ili ne faras tion.

Ĉar en Ĉinio mi ne havis eblon konatiĝi kun la tajpmaniero, konatigis min kun ĝi mia ĉina amikino, tradukistino kaj interpretistino ĉeĥ-ĉina vivanta en Ĉeĥio Li HUANG (kiu en ĉi tiu libro prezentas la festajn japanajn sidmanierojn). Ŝi montris tion al mi per sia poŝtelefono. Ŝi skribas la vorton en la angla transskribo, do per latinaj literoj kaj sekve elektos en ofertataj signoj. Do la principo estas la sama, kiun uzadas japanoj, sed ĉinoj bezonas por tio latinajn literojn. Kiel mi poste eksciis de miaj japanaj amikoj, nun ankaŭ japanoj ofte uzadas la saman manieron pere de la latina transskribo de kanĵi nomata hepburn, precipe (sed ne nur) ĉe poŝtelefonoj.

Mi rekomendas antaŭ memstara vizito al Japanio sen ĉiĉerono almenaŭ pasive ellerni hiraganan (kion ankaŭ mi faris), ĉar ekzemple nomoj de

stacioj estas skribitaj en ĉinaj signoj, super aŭ sub tio ankaŭ en hiragana (bedaŭrinde ne ĉiam).

Religio. Kvankam mi ne estas lingvisto, mi tamen kuraĝis laike priskribi la tri skribmanierojn, kiel mi, nefakulo, perceptas ilin. Mi konscias, ke en mia priskribo estas iuj neprecizecoj, tamen mi estas konvinkita surbaze de miaj spertoj el la prelegoj pri miaj travivaĵoj en tiuj landoj, ke tio estas pozitive akceptata kiel la baza informo por kompletaj nekonantoj.

Multe pli komplikan taskon mi havas, se mi kuraĝas priskribi la religiojn en la tri landoj kaj fokusiĝi al la diferencoj inter ili. Do denove mi atentigas, ke miaj priskriboj estas ne nur subjektivaj, sed precipe ne reprezentaj, ĉar anstataŭ dediĉi la plej grandan spacon al la plej disvastigitaj religioj, mi priskribos miajn spertojn ĉe „malgrandaj" religioj, kiuj en iuj statistikoj eĉ estas neglektataj kaj do apenaŭ troveblaj. Mi tamen tiujn miajn spertojn provos enmeti en la sistemojn de la religioj regataj en la landoj inkluzive de tiuj plej multnombraj, do komence ĉi-loke mi prezentos nur koncizegan liston de la religioj, por ke miaj konkretaj rakontoj en la sekvaj ĉapitroj estu pli bone kompreneblaj.

La problemo ankaŭ estas, kio estas religio. Mi trovis plurajn difinojn, sed neniu kontentigas min. Laŭ mi aparteneco al iu religio signifas kredi al io, kion oni ne povas pruvi, nek eksperimente, nek statistike aŭ simile. Estas tre nebulaj limoj (laŭ mia laika kompreno) inter religio, filozofio kaj foje eĉ folkloro.

Krome, mi petas pardonon de ĉinoj, ke al la religio en Ĉinio mi dediĉos malpli da atento. Mi jam klarigis, ke Ĉinio malplej ampleksas en mia verko pro la fakto, ke por ekkoni tiun grandegan landon mi havis malplej da tempo. Kaj tio validas eĉ en pli granda skalo pri religioj, kiujn mi renkontis en Ĉinio vere nur supraĵe kiel iu ajn turisto venanta por kelkaj tagoj, dum en Koreio kaj Japanio mi havis pli da bonŝanco. Nu, jen la listigo de la religioj kun atentigo pri la diferencoj en la unuopaj landoj, almenaŭ laŭ mia kompreno.

Konfuceismo estas en Ĉinio kaj Japanio konsiderata pli kiel filozofio, etiko aŭ eĉ politika koncepto, tamen en Koreio ĝi havas statuson de religio.



Budhisma monaĥo

Budhismo estas transprenita de ĉinoj el Barato, ĝia lulilo, sed baldaŭ surloke adaptita. Sed ne eblas paroli pri unu budhismo en Ĉinio, ĉar ekzistas multaj skoloj de ĝi. El Ĉinio budhismon transprenis kaj Koreio, kaj Japanio, tiu precipe (sed ne nur) ĝian medit-skolon (zen-budhismon). Same kiel en Ĉinio, ankaŭ en ambaŭ landoj ekzistas apud si pluraj budhismaj skoloj. Mi havis la bonŝancon pli proksime konatiĝi kun ŭonbulismo bazita precipe sur budhismo en Koreio, kiu profunde impresis min.

Taoismo estas religio, kiu originas en budhismo, sed kiu ekestis jam en Ĉinio kaj kiu estas multe influita de loka popola kulto. Ĝi estas disvastigita precipe (sed ne nur) en Tajvano.

Ŝintoismo estas origina japana religio, kiu post la enpenetro de budhismo en Japanion pace kunvivis kun ĝi kaj eĉ transprenis ion de ĝi en sian doktrinon. Sed ankaŭ male, budhismo en Japanio estas influita de ŝintoismo. Multaj novaj religioj en Japanio fontas el ŝintoismo, inter ili ankaŭ



Taoisma monaĥo kun tipa harbulo

Oomoto, kiun mi havis la bonŝancon sufiĉe detale ekkoni kaj kiun mi vere admiras.

Kristanismo estas la plej disvastigita en Koreio, kie ĝi apartenas al la plej multnombraj religioj, apud budhismo. En Ĉinio mi renkontis nur unu kristanan preĝejon. Ĉiuokaze, kristanismo estas minoritata religio kaj en Ĉinio, kaj en Japanio, kie aliĝas al ĝi malpli ol 2 % de la loĝantoj.

Enkonduko al la sekvaj tri ĉapitroj

En la sekvaj ĉapitroj mi volas al vi, karaj legantoj, priskribi miajn travivaĵojn kaj impresojn el unuopaj landoj. Se iu atendas, ke mi priskribos vidindaĵojn kaj iliajn historiojn, geografion de la koncerna lando aŭ aliajn faktojn, kiuj kutimas esti en la libroj pri fremdaj landoj, tiuj seniluziiĝos. Mi ja ne volas multnombrigi tiuspecajn preskaŭ manlibrojn. Unue, mi ne kompetentas pri tio, plie, hodiaŭ povas ĉiu simple trovi tiujn faktojn ne nur en abunda literaturo, sed eĉ pli simple en la interreto.

Kiel mi jam menciis, mia celo estas kundividi kun vi miajn subjektivajn impresojn, kiel al mi efikis la priskribitaj landoj kaj precipe homoj vivantaj en ili. Pro tiu mia privata rigardo iuj miaj informoj en la tekstoj povas esti malprecizaj aŭ eĉ eraraj. Pri tio mi anticipe petas pardonon, sed tio ja estas normala eco de subjektivaj rigardoj.

Mi ankaŭ klarigu, ke per la termino „homoj" mi pensas ordinarajn homojn de diversaj profesioj, kun kiuj mi kontaktiĝis, do ne politikistojn kaj aliajn partojn de la politikaj sistemoj. Mi estas konvinkita, ke, se mi havus la ŝancon viziti Nordan Koreion kaj paroli tie kun ordinaruloj, mi amikiĝus ankaŭ kun ili.

En tiu interrilato mi volas klarigi, kial mi estas konvinkita, ke mi ekkonis la ĉinojn, koreojn kaj japanojn (sed ankaŭ homojn en aliaj landoj, pri kiuj mi ĉi tie ne skribas) pli bone ol la ceteraj vojaĝantoj. Mia komunikilo en ĉiuj landoj estis precipe (kvankam ne nur) Esperanto. Jes, mi uzadis de tempo al tempo ankaŭ la anglan, en Japanio eĉ la rusan kaj por mi surprize la ĉeĥan. Sed ĝuste pro tio mi eksentis la diferencon en la emo malfermi sin al la fremdulo, kiun mi renkontis ĉe la esperantistoj unuflanke kaj la ceteraj aliflanke. Ankaŭ tiuj estis decaj kaj helpemaj, tamen rilate min ne tiom malfermaj.

Mi cerbumis pri tio, kial influas la konduton de homoj la uzata komunikilo. Espereble mi malkovris tion. Unue, tiuj, kiuj eklernis Esperanton, estas en sia interno iumaniere specifaj jam pro la fakto, ke ili dediĉis sian tempon kaj energion por bone ellerni la lingvon, kiu portos al ili neniun materialan gajnon. Do paroli flue kun iu per Esperanto signifas kompreni, ke oni parolas kun idealisto aŭ almenaŭ humane bazita homo. Tio estas certe subkonscia sento. Nur post la elpenso de tiu mia teorio mi komencis observi tiurilate ankaŭ min mem, ĉar mi de tempo al tempo uzadas ankaŭ la anglan kaj la germanan en internaciaj rilatoj, kaj ankaŭ helpe de ili mi jam ekhavis eksterlande bonajn amikojn. Tamen mi konkludis, ke ankaŭ mi pli rapide kaj pli facile amikiĝas kun tiuj, kun kiuj mi komunikas en Esperanto, ol kun la ceteraj, kaj ankaŭ pretas pli frue paroli pri ĉiuj temoj pli malferme kaj pli sincere.

Mi ne estas fanatika disvastiganto de Esperanto, kiu opinius, ke ne eblas atingi la saman sincerecon kaj malfermitecon ĉe eksterlandaj amikoj ankaŭ helpe de alia lingvo. Certe tio eblas kaj ankaŭ mi spertis tion. Sed tio daŭras pli longe kaj por tio mi ne havis dum miaj vizitoj sufiĉe da tempo (kaj miasupoze ankaŭ la plejparto de aliaj vojaĝantoj ne havas). Do tio ne estas en kolizio kun la antaŭaj alineoj.

Impresoj el Ĉinio

Mi supozas, ke por iom ekkoni Ĉinion oni bezonus kelkajn jarojn. Bedaŭrinde mi havis je dispono nur iom pli ol kvar semajnojn, el kiuj dufoje unu semajnon en Tajvano. Tamen, ankaŭ Ĉinio lasis en mi multajn impresojn, preskaŭ senescepte pozitivajn, do mi havas pri kio skribi.

Kvankam mi unue konatiĝis kun Tajvano, mi komencos mian rakonton pri la Ĉina Popola Respubliko (ĈPR). La ĉefa kialo de la ununura dusemajna vojaĝo estis partopreno en la semajna Universala Kongreso (UK) en la jaro 2004 en Pekino, sed dum la antaŭa semajno ni esploris la unuan ĉinan ĉefurbon kaj verŝajne turisme la plej interesan teritorion, la urbon Ŝjiano kaj ties ĉirkaŭaĵon, sed ankaŭ plurajn aliajn interesajn lokojn. Klare, ke dum la kongresa semajno ni entreprenis ankaŭ eksterpekinajn ekskursojn, ekzemple al la Granda Muro. Tamen, mi ne povis ekkoni, sed nur iom gustumi la gigantan landon, ĈPR.

Kiel mi jam skribis en la enkonduko de ĉi tiu libro, ĉiam dum miaj vojaĝoj mi kunhavis grupon de turistoj kaj mi mem ĉiĉeronis ilin. Tio validis ankaŭ en la antaŭaj vizitoj de Tajvano kaj krom unu en ĉiuj miaj vojaĝoj al Japanio kaj ĉiuj al Koreio.

Sed en la jaro 1999 okazis grava ŝanĝo en la situacio de vojaĝentreprenoj en Ĉeĥio (fakte en la tuta Eŭropa Unio, laŭmemore). Post pluraj bankrotoj de vojaĝoficejoj oni enkondukis jurajn devojn de ĉiuj organizantoj de eksterlanda vojaĝado pri deviga asekuro kontraŭ bankroto. Tio ne estus problemo, se ĝi estus justa, alivorte se por ĉiuj regus la samaj kondiĉoj. Sed dum la grandegaj vojaĝoficejoj pagis la asekuron proks. 0,5 % de la prezo por klientoj, mi kiel ridinde malgranda vojaĝoficejo kaj do por la asekurejoj ne fidinda, devus pagi pli ol dekoble pli. Tiun ludon mi ne akceptis. Kial miaj klientoj, plejparte amikoj, devu pagi 5,5 % de la jam alta prezo por la ŝtelema asekurkompanio?

Mi fine trovis la solvon, kiu estis eĉ bona pro tio, ke mi povis akcepti pli multajn interesiĝantojn kaj gvidis nin profesia ĉiĉerono. Mi ŝanĝis la statuson de mia entrepreno. Anstataŭ vojaĝoficejo, kiu rajtis memstare organizi vojaĝojn kaj do ekde nun devus pagi la altan asekuron, mi fariĝis simpla vojaĝagentejo, kiu rajtis nur vendi vojaĝprodukojn de la vojaĝoficejoj, la veraj asekurigitaj organizantoj. Mi do mendis la servojn de la granda ĉeĥa vojaĝoficejo China Tours, kun kiu mi interkonsentis pri la programo, provizis ĝin per klientoj, kaj eĉ mendis ĝian profesian ĉiĉeronon por la turisma semajno. Fine nia UK-karavano al Pekino konsistis el 18 partoprenantoj el Ĉeĥio kaj Germanio. Mi havis kontrakton, ke anstataŭ ricevi la makleraĵon por la varbado de klientoj, mi partoprenos senpage, sed reciproke mi akceptis la taskon, ke mi dum la tuta ekskurso estos helpa ĉiĉerono kaj interpretisto ĉeĥa-Esperanta por la neĉeĥaj partoprenantoj. Tiu sistemo montriĝis taŭga, do mi same organizis la UK -karavanon al Japanio tri jarojn poste, kiun partoprenis eĉ 32 ĉeestantoj el 5 landoj. Sed reen al Ĉinio.

Alveno. La profesia ĉinologo kaj nia ĉiĉerono, Martin Hošek, loĝis tiutempe en Ĉinio, do ni la unuan fojon renkontis lin post nia surteriĝo en la flughaveno. Li estis tre afabla kaj helpema kaj ni tuj amikiĝis.

Kiam post longa flugo kaj transporto el la flughaveno ni atingis hotelon en la centro de Pekino, jam ni aperis en alia mondo. Kompare kun internaciaj hoteloj, kiujn mi vizitis en aliaj landoj, ŝajnis al ni ĉe la akceptejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo nekompareble pli da oficistoj kaj tamen la priservo de la klientoj iom pli longdaŭra. Sed finfine ni havis niajn ŝlosilojn de la ĉambroj, kiuj estis bone ekipitaj kaj do eblis enhejmiĝi kaj iom ripozi post la longa flugo.

Pro la bruo de ekstere mi tuj rigardis el la fenestro kaj ekvidis, ke apud nia hotelo oni konstruas novan domon, kaj en la konstruaĵo svarmas dekoj da laboristoj kaj ĉiuj ion faras. Mi ne povis imagi, kiel komplike devus esti kunordigi tiom da laboristoj en relative malgranda konstruaĵo, por ke ĉiuj havu ĉiam ion utilan por fari.

Fascinita mi do rigardis ilian evidente bone organizatan laboron, ĝis miajn okulojn altiris alia nekutimaĵo. Ĉe la strato flanke de la konstruejo mi vidis du virinojn labori ĉe kudromaŝinoj kaj ĉirkaŭ ili kelkajn klientojn tenantajn pantalonojn kaj ion, kion mi ne povis distingi. Kiel mi tuj supozis, ili surloke tuj kudris, kion la alvenantoj deziris. Kiel mi sekve eksciis,



Provo de pacienco: nia ĉiĉerono Martin Hošek ĉe la akceptejo

plejparte ili riparis disŝiritajn aŭ alimaniere difektitajn vestaĵojn. Vespere ili kaj iliaj kudromaŝinoj malaperis, sed matene ili jam sidis tie denove atendante novajn klientojn.

La unua promeno. Post iom da ripozcela tempo ni komune startis por la unua konatiĝo kun ĉinaj realaĵoj. De la unua momento mi estis tre surprizita, ĉar mi havis antaŭjuĝojn, ke Ĉinio estas iom stranga lando, kie la evoluo finiĝis en la tempo de la Kultura Revolucio aŭ eĉ jam komence de la regado de Mao Zedong. Plue, ke la ĉefa trafikilo estas biciklo kaj en ĥaoso inter miloj da bicikloj moviĝas aŭtomobiloj, ke homoj estas melankoliaj, ke proponataj varoj estas subnivelaj, ktp.

Sed surloke mi renkontis la malon. Jes biciklantoj estis multaj, sed ne pli ol ekzemple en Nederlando, kaj ili tute ne svarmis en ĥaoso. En la ĉefaj stratoj, kie trafikas amaso da aŭtomobiloj ili havas specialajn sufiĉe larĝajn vojojn nur por biciklantoj. Eĉ en flankaj stratoj, kie estas miksita trafiko de aŭtomobiloj kaj biciklantoj, ili sufiĉe bone akordiĝis. La homoj, kiujn ni renkontis, aspektis agrable, en modernaj grandmagazenoj



Subĉiela vestaĵriparejo

mi vidis la plej modernajn varojn kaj krome surprizis min la moderna arkitekturo.

Alia averto, kiu ne plenumiĝis, estis, ke en Pekino preskaŭ ne eblas spiri pro industria kaj trafika fumnebulo. Ĝin mi timis, ĉar mi suferas pro astmo. Sed verŝajne ni havis bonŝancon, ĉar mi havis neniujn spirproblemojn kaj rimarkis neniujn fumnebulojn, kvankam mi estas pri ili tre sentema. Male, ni ĝuis sunon kun pluvo nur dum unu posttagmezo. Mi per tio ne volas deklari, ke fumnebuloj ne ekzistas en Pekino, sed nur tion, ke mi ne spertis ilin, ĉar ili ne troviĝis tie eĉ dum unu tago de tiuj someraj du semajnoj, kiam ni tie restadis.

Post iom da ripozo ni komencis konatiĝi kun la urba centro. Nia unua renkontiĝo kun la antikva ĉina arkitekturo estis la Ĉiela Pordego, la loko, kien la ĉinaj imperiestroj kutimis veni preĝi por la bona rikolto, kutime dufoje jare. Ĝi efikis al ni vere nekutime. Ne temis pri iu unu pordego kiel eble la Triumfa Pordego en Parizo aŭ aliloke, sed pri aro da domoj kun la ĉefa templo en la mezo! La domoj havas plejparte cirkloforman horizontalan projekcion, estas konstruitaj el pentritaj traboj sen uzo de metalaj



La unua gastronomia sperto

najloj kaj la tegmentoj el tradicia ceramiko havas levitajn eĝojn kaj ĉiuj estas bluaj. Nu, vere ni troviĝis preskaŭ en fabelo.

De la Ĉiela Pordego, kiu tre impresis nin, ni zigzagis tra la stratetoj de la malnova Pekino al la Antaŭa Pordego. Nu, se mi skribis komence de ĉi tiu alineo, ke la Ĉiela Pordego tre impresis nin, tion mi povus ripeti plu kaj plu – do tio validas ankaŭ pri la pitoreskaj stratetoj, kie ni troviĝis vere kvazaŭ en teatraj kulisoj. Kaj fine de tiu nia unua promeno nin atendis plia miraklo, nome la jam menciita Antaŭa Pordego.

Ĉi tiu pordego, nomata ankaŭ la Pordego de Ĝusta Lumo, staras en la suda limo de la Placo de Ĉiela Trankvilo kaj ĝi servis kiel la enirpordego en la Imperiestran Urbon. Temas pri la plej alta pordego en Pekino (42 m) kaj ĝi estis konstruita en la jaro 1419. Post la admirado de la beleco de tiu pordego jam atendis nin konatiĝo kun alia parto de la ĉina kulturo, nome gastronomio.

Post la promeno ni do vizitis la unuan ĉinan restoracion, kiu ne surprizis min, ĉar ĝi aspektis simile, kiel ĉinaj restoracioj en Eŭropo. Nur en ĝi estis nekutime pli da spaco kaj grandaj tabloj, evidente celantaj priservi



Mao superrigardas la Placon de Ĉiela Paco

grupojn: ornamita per ĉinaj motivoj, tabloj kaj seĝoj kaj ĉio cetera „normala“ krom tio, ke la manĝolistoj estis nur en la ĉina lingvo kaj la stabanoj parolis nur ĉine. Kiel mi ĝojis, ke estas kun ni Martin, momente servanta kiel interpretisto. La manĝaĵo estis perfekte aspektanta kaj tre bongusta. Sed por renkonti pli tipajn ĉinajn restoraciojn ni ankoraŭ devis atendi.

Post la priskribo de nia unua tago en Pekino mi ne plu sekvos niajn esplorojn de Pekino kaj ties ĉirkaŭaĵo kronologie, sed mencios zigzage nur tiujn objektojn, kiuj pleje kaptis mian intereson.

Imperiestra Palaco kaj la Placo de Ĉiela Paco. La Imperiestra palaco en la vera centro de Pekino estas pli konata kiel la Malpermesita Urbo. Sed ĝi estis malpermesita por ordinaraj homoj en la erao de ĉinaj imperiestroj, nun male ĝi estas grava logilo de turistoj. Kaj per la Suda Pordego oni venas al la Tian'anmen Placo, pli konata kiel la Placo de Ĉiela Trankvilo, per siaj 440 mil kvadratmetroj la plej vasta placo de la mondo. Sed ĝi estas ne nur tre vasta, sed ankaŭ ege interesa. Mian intereson altiris kelkaj por mi nekutimaĵoj aŭ neatenditaĵoj. Inter miloj da turistoj estis ankaŭ pluraj lernejaj ekskursoj, tre bele distingeblaj laŭ siaj uniformoj kaj precipe koloraj



Viva statuo de policano

ĉapoj. Kaj kiam kelkaj rimarkis, ke mi fotas ilin, ili tre ĝoje kaj gaje pozis. Rigardu la bildon sur la paĝo 19.

La dua nepretervideblaĵo estas granda portreto de Mao Zedong, kiu rigardas la placon el la Pordego de Ĉiela Paco. Cetere, plia mia antaŭjuĝo, kun kiu mi veturis al Ĉinio, estis la supozo, ke Mao estas por nuntempaj ĉinoj negativa persono. Sed tion mi ne spertis. Kvankam ili konfesas, ke dum lia regado la homoj suferis pro malsato (kun ĉiama aldono, ke feliĉe nun ili fartas de jaro al jaro pli bone, kio ankaŭ surprizis min) kaj estis pluraj aliaj malagrablaĵoj, ili ne kulpigas pri tio la regadon de Mao, sed la tiaman ĝeneralan situacion.

Plu altiris mian atenton la policano proksime de mi, kiu estis bone videbla, ĉar li staris sur kvazaŭ statua fundamento, do la supraj partoj de lia staturo estis eĉ super la plej altaj personoj kiel mi. Ĉar li staris senmove, li vere kiel statuo aspektis. Mi cerbumis la kialon de tiu certe penoplena servo. Se li starus tie por kontroli la situacion, li ja devus havi pli da libero por movi sin kaj rigardi al ĉiuj flankoj. Nu, tio restis por mi enigmo.

Kiel jam menciite, Imperiestra Palaco egalas al Malpermesita Urbo. Tio bezonas klarigon. Sub la termino „palaco“ oni konsideras, almenaŭ



Malpermesita Urbo

en la meza Eŭropo, iun grandan kaj gravan domegon, sed ne tiel en Ĉinio (kaj same en Koreio kaj Japanio). Palaco konsistas ĉiam el pluraj „palacoj“ en nia eŭropa senco, parkoj aŭ ĝardenoj, kaj tiu tutaĵo, kutime ĉirkaŭita per barilo, estas nomata Palaco. Kaj la Imperiestran Palacon en Pekino mi trovis la plej impona fermita komplekso, kiun mi iam vidis dum miaj vojaĝoj. Male ol tiu en Tokio, kiu ankoraŭ servas kiel sidejo de la japana imperiestro kaj do nur parto de ĝi estas alirebla por turistoj, en tiu pekina ni povis promeni sen limoj, kion ni ankaŭ ĝuis. Ne nur tra la parto, kiu servis nur por la imperiestro kaj liaj plej proksimaj familio kaj stabanoj, sed ankaŭ tra tiu pli suba parto, kiu estis por la meza tavolo kaj imperiestra servistaro; ankaŭ ĝin mi trovis sufiĉe nobeleca.

Sed ne nur la Imperiestra Palaco kaj Placo de la Ĉiela Trankvilo estis interesaj, sed ankaŭ la eksteraĵo. Tiu ne pro la historio, sed pro la ekkono de nuna vivo de la personoj vivantaj el turistoj. Kaleŝoj por veturigi turistojn estis diversspecaj kaj relative multnombraj, sed ili havis sufiĉe da klientoj. Tamen pro la varmego, kiu regis dum nia vizito, la plej okupataj estis moviĝantaj vendistoj de boteligita akvo.



Niaj koleginoj ne rezistis la tenton



Rikiŝo kun motoro



Akvovendisto

Se mi jam parolas pri la etaj komercistoj, ili evidente vivis tre modeste, tamen ĉiuj aspektis tre kontente, estis ridetemaj kaj elbrilis el iliaj vizaĝoj pozitiveco. Se tio estus nur rilate nin, turistojn, mi supozus, ke temas pri profesia sinteno kaj strebo vendi sian varon. Sed mi ofte observis ilin, kiel ili sammaniere komunikis inter si ne sciante, ke ili estas observataj. Iliaj ofte moviĝantaj standoj evidente jam multon travivis, mi ne povas rememori, ĉu mi vidis almenaŭ iun novan.

Botanika Ĝardeno. Botaniko ne estas mia hobio, do kiam ni celis la Botanikan Ĝardenon, mi estis iom seniluziigita, ĉar mi supozis, ke tio estos por mi perdo de tempo, ja botanikaj ĝardenoj svarmas en la mondo kaj ili devas aspekti simile, do kial rigardi ĝin en Ĉinio. Se mi ne havus taskon de helpa ĉiĉerono kaj tradukisto, mi verŝajne rezignus kaj vagadus ie memstare. Sed kiel mi eraris! Mi ĝojis, ke mi partoprenis tiun viziton ne nur pro tio, ke mi vidis nekutimajn specojn de kreskaĵoj.



Migranta gazet-gîceto



Mia stando memoras multon



Vitra domego konsistanta de multaj salonegoj



Eĉ ne unu folion mi lasu ĉi tie



Surtegmenta ĝardeno

La grandega areo de 500 hektaroj ĉe la piedo de la monto Xiangshan (la Aroma Monto) estas disdividita al pli malgranda de la Akademio de Sciencoj kaj pli granda, urba. Sed eĉ tiun ni ne povis sufiĉe esplori, ĉar necesus havi je dispono ne plurajn horojn, sed tagojn. La tuta aspekto de la ĝardenoj (jes, la pluralo taŭgas, eĉ se nur por tiu urba), la lagetoj kun ĉarmaj altanoj, sed ankaŭ la monumenta vitrodomo, ktp., tre impresis min.

Sed ne nur tio. Denove nekutimaĵojn mi vidis. Ekzemple daŭre laborantajn ĝardenistojn; iuj iliaj agoj ŝajnis al mi eĉ troigitaj; ekzemple kiam mi vidis, ke ili estas en arbokrono kaj kolorigas branĉojn, aŭ kiam ili kun ĉareto, balailo kaj ŝovelilo forigis ĉiun folion de la padoj. Cetere, la pureco regis ĉie, ne nur en la botanika ĝardeno, sed ankaŭ sur la stratoj, trotuaroj, parkoj …

Min surprizis ankaŭ, ke eĉ sur la tegmentoj ni povis vidi partojn de ĝardeno, almenaŭ herbejon. Kaj homoj, precipe familioj kun infanoj kondutis tie tute nature, sen iu obeo de vojetoj. Estis videble, ke ili venis tien vere ĝui la vivon en la belega natura medio.



Ne fotu

Templo de la dormanta budho troviĝas proksime de la Botanika Ĝardeno. La bronza statuo de la kuŝanta budho longas 5,2 metrojn. Krom ĝi estas tie ankoraŭ 12 starantaj budhoj kaj pliaj statuoj. Kiam mi volis foti la kuŝantan budhon, kuris kontraŭ min la loka prizorganta oficisto kaj energie gestis, ke mi ne rajtas. Jen mi devas konfesi, ke sekve mi fariĝis trompulo. Mia kolego en alia flanko signis, ke mi restu, kaj deprenis fotilon kaj okulfrape prepariĝis foti. La oficisto tuj ekkuris al li kaj mi havis sufiĉe da tempo fari du fotojn. Espereble post tiom longa tempo mia „krimo" preskriptiĝis, tial mi jam povas publike konfesi ĝin. Kaj nur pro tio mi povas al vi montri la kuŝantan (laŭ iuj fontoj dormantan) budhon. Klare mi ĉiam respektas la preskribojn regantajn en ĉiuj galerioj kaj ekspozicioj kaj mi fotis sen fulmo malgraŭ nesufiĉa lumo.



Kuŝanta Budho

Ponto de Marko Polo. Mi skribis, ke dum nia restado regis bela, eĉ tro varma vetero. Tio estas vero, tamen kun unu escepto. Ĉe la ŝtona antikva Lugou-Ponto aŭ alinome la Ponto de Marko Polo trans la Yongding rivero. Ĝi estis konstruita en la jaro 1189, estas por tiu tempo ŝajne nenecese 7,5 m larĝa. Marko Polo priskribis ĝin kiel „la plej bonan ponton de la mondo". Kompreneble tiun historian perlon ni volis vidi kaj vidis. Sed ni memoros ion tute alian ol la aspekton de la ponto. Kiam ni alvenis al ĝi, fakte jam survoje, komencis pluveti, kaj kiam ni atingis la mezon de la ponto, la pluvo transformiĝis al pluvego. Ni do rapide kuris al la aro da giĉetoj, ne por butikumi, sed por almenaŭ iom kaŝiĝi, antaŭ ol la pluvo mildiĝos. Estis ironio, ĉar la rivero sub la ponto, kie devus flui akvo, estis tute seka kaj male ni, kiuj devus esti sekaj, estis abunde malsekigitaj. Certe vi komprenas, ke ni havis tute aliajn pensojn ol pri la historio kaj beleco de la antikva ponto. Nu, almenaŭ ni estis praktike instruitaj, ke eĉ en la suna Ĉinio povas pluvegi! Sed tio estis vere ununura pluvo dum la tutaj pli ol du semajnoj.



Ponto de Marko Polo



Mi volonte akceptis la "tegmenton"



Interesaj memoraĵoj ... sed ĉefe ĉi tie ne pluvas



Supren al la Granda Ĉina Muro komforte

Granda Muro. Pri la Granda Muro mi jam donis kelkajn informojn en la unua ĉapitro. Ĉi tie mi nepre ripetu, ke malgraŭ anticipe konataj informoj kaj fotoj oni ŝtoniĝas ekstarante sur ĝi. La indikoj pri la longo de la muro varias de 6000 ĝis 8850 km depende de tio, ĉu oni alkalkulas diversajn deflankiĝojn, el kiuj iuj estas malkovritaj antaŭ nelonge. La muro zigzagas diversmaniere, la aerdistanco inter la orienta kaj okcidenta ekstremaj punktoj estas „nur" 2700 km, kio estas proksimume la distanco inter Prago kaj Jerusalemo. Vere neimageble! Rekonstruitaj kaj do alireblaj por la turistoj estas nur kelkaj partoj de la muro kaj ni vizitis unu el ili proksiman al Pekino. Mi preferus grimpi al la supro surŝtupare (pli ol 200 relative altaj ŝtupoj), sed pro la manko da tempo ni ĉiuj devis uzi kabinan telferon, por ke restu al ni tempo por iom promeni supre de la muro.

Ĉar ni veturis tien merkrede dum la kongresa semajno, kiam estas tradicie ekskursa tago kaj la kongresejo estas fermita, ni renkontadis tie inter multnombraj turistoj ankaŭ plurajn esperantistojn bone ekkoneblajn, ĉar



Sur la Granda Ĉina Muro

preskaŭ ĉiuj portis la kongresan insignon. Do eĉ tie mi konatiĝis kun kelkaj kongresanoj, kiujn mi verŝajne en la kongresejo ne estus renkontinta.

La supra promeno estis kvazaŭ surŝosee, la supro larĝas 6 metrojn, kaj se ne estus de tempo al tempo ŝtuparoj pro krutaj deklivoj, mi preskaŭ atentus, ĉu ne alvenos aŭtomobilo. La gvatturoj estis duetaĝaj, ili servis ankaŭ por loĝado de la soldatoj. Nu, estis bele tie promeni kiel turisto, sed certe mi ne volus gustumi tie militservon, eĉ se nur en paca tempo! Sed certe eĉ pli teruraj estis kondiĉoj de la laboristoj, kiuj la muron konstruis. Oni diras, ke la muro estas *la plej longa tombejo en la mondo*, ĉar en ĝi estas entombigitaj miloj da laboristoj, kiuj mortis dum ĝia konstruado. Alia sinonimo por la muro estas *la muro de la larmoj*.

Nu, al la kompatinduloj ligitaj al la muro en antikvaj tempoj ni ne povis helpi, do post kelkaj momentoj de tiu cerbumado mi revenis al la admiro de la monumenta objektego kaj ĝuo de la promeno kun multaj ŝtuparoj kaj belega rigardo al la pitoreska montaro en la ĉirkaŭaĵo.



Pordego al la Templo Hongluo



Pandoj el ŝtono

Templo Hongluo. Survoje de la Granda Muro ni vizitis unu el la plej grandaj budhismaj centroj, la templon Hongluo, ekkonstruitan jam en la 7a jarcento. Tie ni la unuan fojon povis trairi bambuan arbaron kaj eĉ vidi pandojn – sed tiujn nur el ŝtono. En la propra templo la plej okulfrapaj estas tri grandaj budhoj, sed krome pluraj malpli grandaj kaj belege pentritaj muroj, kvazaŭ ĉielo. Kaj kiel ni jam alkutimiĝis, belegaj ĝardenoj.



Marmora ŝipo sur la lago Kunming



La Somera palaco de ĉinaj imperiestroj etendiĝas sur la areo de preskaŭ tri km^2, sed tri kvaronojn de tio okupas akvo en la formo de diversaj lagoj, lagetoj, insuloj kaj pontoj. En la restanta kvarono de la areo troviĝas preskaŭ 3000 diversaj arkitekturaĵoj, kelkaj vere unikaj. Krom ili estas tie vera raraĵo, nome marmora ŝipo dekoracianta la lagon Kunming. La Somera Palaco, kvankam ĝin uzadis pluraj imperiestroj, estas ankaŭ nomata Palaco de la imperiestrino Cixi. Ŝi lasis dufoje rekonstrui la palacon kaj ankaŭ konstrui tiun strangan ŝipon uzante por tiu celo monon, kiu devis servi por la ĉina marista armeo. Kiel multfoje, ankaŭ ĉi tie oni apenaŭ povis kredi realecon de tio, kion vidis la propraj okuloj.



Loĝĉambro de Mao Ce-tung



Altano apud la vilao Song Wu Yun

La Parko Xiangshan kaj la vilao Song Wu Yun. Mi ne plu strebos iel priskribi la parkon, ĉar mi devus nur ripeti la vortojn surprize belega, impona, pitoreskaj altanoj, ktp. Sed mi volas prezenti la apudan vilaon Song Wu Yun, kie kaŝita vivis kaj laboris Mao Zedong antaŭ ol deklari la Ĉinan Popolan Respublikon la 1an de oktobro 1949. Pluraj turistoj fotiĝis ĉe la granda bildo de Mao kaj ĉe la informaj memortabuloj, tamen min surprizis, ke la propraj ĉambroj estis tre modeste ekipitaj.



Trajnado al Ŝjiano

Ankoraŭ Pekino kun ĝia ĉirkaŭaĵo. Ni vidis plurajn interesaĵojn, kiuj certe valorus mencion, ekzemple la Turo de Tamburistoj, la strato Liou-Li-Chang kun multaj tre interesaj butikoj, inter kiuj la plej allogaj por miaj okuloj estis amasego da libroj, antikvaĵoj, bildoj, kaligrafaĵoj, …, infanĝardeno (iama Princdomo de Gongwang), veturado en rikŝoj, kiujn mi mem ne ĝuis, sed precipe niaj virinoj jes, ktp.

Trajnado al Ŝjiano estis granda travivaĵo kun pluraj surprizoj kaj pozitivaj kaj negativaj. Ni forlasis la hotelon kun malpli da valizoj, ĉar ni sciis, ke post tri tagoj ni denove revenos tien, do ĉion, kion ni ne bezonis, ni povis deponi en unu ĉambro. Kaj eĉ tiujn malpezigitajn valizojn ni ne devis porti, ĉar la servo de la hotelo promesis veturigi ilin al la Orienta Stacidomo, de kiu ni trajnis al Ŝjiano. Perfekte planite, sed ĝis la momento, kiam ni jam devis entrajniĝi kaj niaj valizoj ankoraŭ stagnis en iu ŝtopiĝo, kvankam ne malproksime de la stacidomo, kion al ni diris preskaŭ senĉese telefonanta Martin. Ĉar li parolis ĉine, kion mi ne komprenis, mi nur de la tono kaj vizaĝo ekkonis jam antaŭ lia sciigo, ke io ne estas en ordo.



Alveno al Ŝjiano: zorgoj de Martin pri niaj vaalizoj

Ni entrajniĝis kaj disiĝis en la kuŝkupeojn sen havi noktajn vestojn kaj higienajn bezonataĵojn. Martin kuradis ien kaj post iom da tempo, kiam la trajno jam ekveturis, li portis por ĉiu sapon, dentbroseton, dentopaston kaj mantukon. Kaj li plu ien iom nervoze telefonis. Ankoraŭ antaŭ ol deziri al ni bonan nokton li sciigis al ni, ke post kiam ni atingos Ŝjiano, niaj valizoj jam estos tie.

La ekipaĵo de la trajno superis ĉiujn miajn imagojn pri dumvojaĝa luksо: la necesejoj kaj lavopelvoj en rustorezista ŝtalo; kupeoj po 4 litoj, sed ĉiu havis sian privatecon pro kurtenoj; ĉe la piedoj ĉiu havis je dispono televidilon kun multaj programkanaloj, kompreneble kun aŭskultiloj por ne ĝeni la aliajn. Kvankam ĉiuj kanaloj (almenaŭ kiujn mi provis) estis en la ĉina, do por mi ne kompreneblaj, mi iomete esploris ilin kaj iom ĝuis la muzikon antaŭ ol ekdormi. Jes, ni veturis en la unua klaso, do mi komprenis, ke ne ĉiuj vagonoj en la trajno estas same lukse ekipitaj. Mi demandis pri la nivelo de la dua klaso kaj mi eksciis, ke ili estas malpli luksaj, tamen ankaŭ ili havas iom pli altan nivelon ol en la kutima duaklasa vojaĝado en Eŭropo. Sed tion mi ne povas konfirmi, ĉar mi persone en vagono de la dua klaso ne estis.

Kiam ni atingis la stacidomon de Ŝjiano, niaj valizoj jam vere tie atendis nin. Mi miris, sed ne temis pri miraklo, nek pri speciala flugo kun niaj valizoj. Ili venis per ekspresa trajno, kiu forveturis el Pekino pli malfrue tamen alvenis al Ŝjiano antaŭ la nia. Feliĉe ne plenumiĝis nia timo, ke ni devos travivi kelkajn tagojn en unu subpantalono.

ŜJIANO (Xian), la antaŭa ĉefurbo de la unuigita Ĉinio kun 3100 jaroj de sia konata historio, impresis min eĉ pli ol Pekino, kvankam la komparo apenaŭ eblas. Nun temas pri moderna urbego etendiĝanta sur pli ol 10 000 km^2, kun preskaŭ 6 milionoj da loĝantoj, tamen ĝia centro konservis sian historian etoson. Kaj kvankam ankaŭ Pekinon ni ekkonis kiel relative kosmopolitan urbon, tiu trajto eĉ pli elstaras ĉe Ŝjiano. Mi denove elektos nur kelkajn el tiuj tre allogaj lokoj. Eble la plej konataj estas la du budhismaj pagodoj, de Granda Ansero kaj de Malgranda Ansero. Ambaŭ estis konstruitaj antaŭ pli ol mil jaroj kaj travivis plurajn tertremojn. De tiu granda, sepetaĝa, al kies supro eblas grimpi, estas nekredeble bela rigardo al ĉiuj flankoj.



Pagodo de Malgranda Ansero



Supreniro al la rigardejo de la pagodo de Granda Ansero



Kanono sur urba murego

Urba Murego. La historia defendosistemo konsistanta el larĝa muro kaj gvatturoj iom similaj al tio, kion ni ekkonis en la kazo de la Granda Muro, tamen kun minimume du diferencoj, tre agrablaj por nunaj turistoj. Ĝi staras sur ebeno kaj estas komplete konservita, tial eblas ĝin ĉirkaŭiri ĝis la elirpunkto. Aŭ, ĉar tie eblas pruntepreni biciklojn, eblas ĉirkaŭveturi, kio estas pli tempoŝpara. Tion ankaŭ uzis unu membrino de nia grupo kaj tio ankaŭ tre logis min, tamen mia respondeco de la gvidanto ne permesis tion al mi. Ĉiu teknikaĵo ja povas panei kaj se mi restus kun nefunkcianta biciklo ie en la alia flanko de tiu 14 km longa surmurega ŝoseo, certe tio kaŭzus grandan problemon ne nur al mi, sed al la tuta grupo.

El la muro estas tre interesa rigardeblo ne nur al la antikva urbo, sed ankaŭ al la dua flanko, moderna urbo kun multaj parkoj. Simile kiel la Granda Muro pro sia longeco kaj sia nekredebla realigo spite al krutaj deklivoj de la montaroj, ankaŭ la Urba Muro en Ŝjiano estas monda unikaĵo, tiu pro la konserviĝo de sia tuto.



Eva Kopečná kiel ununura ĉirkaŭveturis la muregon

Islama kvartalo. Plia surprizo estis la spuroj de diversaj spiritaj skoloj. Ne tiom surprizis nin la budhismaj kaj taoismaj centroj, sed ni vidis ankaŭ ekzemple judan sinagogon. Sed kio plej surprizis min, tio estis la tuta islama kvartalo. Spertaj komercistoj tie, same kiel en aliaj turismaj centroj, alkutimiĝis al turistoj kaj proponis al ili aĉeti ĉion eblan. Kaj tie eblis multe pli ol aliloke marĉandi. Ili ĉiuj estis provizitaj per papero kaj krajono. Vi eĉ ne devis montri al io, sufiĉis al iu objekto rigardi pli longe ol du sekundojn kaj jam vi vidis antaŭ vi paperan slipeton kun prezo. Do estis preskaŭ sporta granĉo enmanigi la slipeton, trastreki la prezon kaj skribi multe pli malaltan. La ludo daŭris, ĉar la vendisto trastrekis tiun vian kaj enskribis novan, ktp... Io simila eblis ankaŭ en aliaj ĉinaj merkatoj, sed la plej ĉarmajn marĉandojn mi renkontis ĉi tie. Nu, mi ne nur marĉandis, sed ankaŭ aĉetis tie kelkajn bagatelaĵojn, laŭmemore lupeon kaj iun tukon kun ĉina dezajno.

Moskeon mi verŝajne pretervidus, ĉar mankis la tipa turo, minareto, kaj ĝi estis en ĉineca stilo. Feliĉe Martin ĉiam atentigis nin pri interesaĵoj, do ankaŭ tiuokaze.



Tion vi nepre aĉetu!



Sinagoho laŭ ĉina maniero



Detalo de la terakota armeo

Terakota Armeo troviĝas proks. 30 km oriente de Ŝjiano. Ĝin mi jam menciis antaŭe kaj do ne necesas priskribi, kiel impona estas rigardo al tiuj vicoj da soldatoj, sed ankaŭ da ĉevaloj kaj kaleŝoj. Multo estas ruinigita, sed eĉ tio, kio estas bone konservita, estas apenaŭ kredebla. Eblas vidi ilin en pluraj partoj, en parto unu, la plej granda, 210 m longa kaj 60 m larĝa, troviĝas 6000 figuroj de militistoj en vera grandeco, kutime 1,8 m altaj. Des pli mi miregis, kiam mi alproksimiĝis kaj atente observis unuopajn soldatojn. Mi trovis en tiu mia ĉirkaŭaĵo eĉ ne du el ili, kiuj estus la samaj. Vere tio aspektas, ke al la skulptistoj staris iuj vivaj soldatoj kiel modeloj kaj kompreneble ĉiuj estas originaloj.

Estas klare, ke la antaŭĉambroj similas bazaron, kiel ĉie proksime de turismaj allogaĵoj. Precipe oni vendas memoraĵojn, do miniaturojn de la soldatoj, ĉevalkaleŝojn, sed ankaŭ plurajn diversaĵojn ne rekte ligitajn al la historio de la loko. Sed krom tiuj komercaj ejoj tie estis ankaŭ valoraj kaj tre plaĉe aranĝitaj eksponaĵoj. Cetere, tie mi denove vidis „vivantan statuon", pli precize policanon, kiu staris sen eĉ la plej fajna moviĝo, kvankam mi staris antaŭ li kaj sufiĉe longe, eble eĉ iom provoke, rigardis lin. Sed neniu moviĝo. Nu, certe malfacila okupo, same kiel en la Placo de



Vendopretaj modeloj

Ĉiela Trankvilo en Pekino. En neniu alia loko mi vidis iujn similajn. Mi denove pripensis, ĉu li staras tie por protekti la ekpozicion, aŭ ĉu tio estas nur porturista atrakcio, kiel ĉe ŝtataj palacoj en multaj landoj.

La propra Universala Kongreso de Esperanto. La unuan fojon ni veturis al la kongresejo grupe. Ni uzis urban aŭtobuson, ĉar estis rekta linio tien de nia hotelo. Sed en postaj tagoj ni jam individue aŭ en malgrandaj grupetoj uzadis plejparte taksiojn, kiuj estis tie vere tre favorprezaj kaj trovi ilin ne estis problemo.

En la kongresejo atendis nin granda surprizo. Kvankam ni estis antaŭavertitaj, ke ni bezonos fotojn por la kongreskarto (permesilo eniri la kongresejon), ĝi neniel utilis al ni. Ni devis unue vici ĉe oficiala fotisto, ĉar estis nur li, kiu devis fari foton de ni; poste plenigi la formularon kaj atendi, ĝis ni ricevis nian kongresan nomŝildon, kiu jam enhavis niajn fotojn. Nur poste ni povis atendi ĉe la kutima kongresa akceptejo, kie ni ricevis la kongresmaterialon kontraŭ la anticipe ricevitaj aliĝkonfirmiloj. Tio estis ununura iom ĝena afero, tamen simple eltenebla, ĉar ĉiuj oficistoj estis tre afablaj.



Inaŭguro de la Universala Kongreso



Kongreskarto devis esti ĉiutempe videbla

Poste, ni jam povis pluiri en la kongresejon, libere moviĝi en ĝi kaj dediĉi nin al la kongresa programo. Mi ne priskribos la kongreson mem, ĝi estis interesa kiel ĉiuj UKoj, kiujn mi ĉeestis, sed la libro temas pri la landoj kaj iliaj popoloj, do mi fokusiĝos nur al la aferoj kunigitaj kun la ĉinaj realaĵoj.

Post la trarigardo de la kongresa libro, precipe la programo, mi iris iom vagadi tra la kongresejo. Ĝi estis tre reprezenta kaj taŭga, por ke en ĝi kongresumu pli ol 2000 partoprenantoj. Mi estis agrable surprizita eksciante, ke en la halo devus esti kelkaj lokoj kun la eblo uzi senpage interreton. Tio



Diligentaj okupantoj de la interreto, kiuj tamen ĉiam senvorte liberigis sian lokon



Retkafejo en Pekino

tre plezurigis min, sed kiam mi trovis ĝin, mi estis komence iom embarasita, ĉar ĉiuj lokoj estis okupitaj. Kelkajn okupis kongresanoj, du restantajn lokaj infanoj. Mi alproksimiĝis, ke mi do iom atendu kaj sekve kontrolu mian retkeston, sed en la momento, kiam mi alproksimiĝis, la infanoj elsaltis kaj liberigis la lokojn por mi. Ĉar por mi sufiĉis nur unu loko, la duan tuj ree ekokupis unu el la knaboj. Kaj tio ripetiĝis ĉiam, kiam mi volis retumi. Ĉiuj lokoj, kie ne sidis kongresanoj, estis okupitaj de infanoj, sed ili ĉiam tuj senvorte liberigis siajn seĝojn, kiam nur iom alproksimiĝis kongresano.

Ne temis nur pri tio, ke la interreto tie estis senpaga, nek ke ne eblus retumi ankaŭ aliloke. Krom en la kongresejo mi trovis du eblojn uzi interreton. Unue, en nia hotelo, sed tie ĝi estis nekredeble multekosta. Aŭ en la publika interretejo, kiun mi trovis promenante, kie la prezo estis male tre malalta, mi eĉ nomus ĝin nur simbola, sed ĉiam ĉiuj lokoj estis okupataj kaj jam atendis vico da pliaj interesiĝantoj, plejparte infanoj.

TAJVANO. Kiel jam klarigite, por la tajvananoj ĝi estas memstara respubliko, por la civitanoj (ne nur politikistoj) de la surkontinenta Ĉinio ĝi estas nedividebla parto de ĈPR, nur provizore regata de ribelantoj sub la protekto de Usono. Mi restas indiferenta kaj kliniĝas al neniu de ambaŭ opinioj. Ĉar mi volas resti neŭtrala ankaŭ formale, mi faris jenan kompromison. Mi ne enmetis ĝin kiel memstaran ĉapitron, sed envicigis ĝin en la ĉapitron pri Ĉinio (do unu Ĉinio). Tamen, por iom distingi ĝin de la ceteraj priskribitaj lokoj, mi vicigis ĝin finen, nur post la priskribo de miaj kongresaj impresoj.

Kvankam mi estis dufoje en Tajvano, ankaŭ tie mi ekkonis nur parteton de la lando, nome nur iom la ĉefurbon Tajpeo kaj la proksiman montetaran nacian parkon Yangmingshan, en kiu okazis la Dutaga Marŝfestivalo, parto de la Internacia Marŝa Ligo IML. Evidente mi estis tro kuraĝa, ĉar la restadon mi preparis iom facilanime sen ajna surloka helpanto, nek kun la helpo de iu, kiu tie jam estis (tio okazis antaŭ ol mi konatiĝis kun China Tours), nur helpe de informoj, kiujn mi trovis en la reto kaj aliaj informiloj, plejparte paperaj prospektoj. Kaj tial la unua vojaĝo kun la grupo de longdistancaj piedirantoj preskaŭ finiĝis per fiasko.

Mi mendis junulargastejon (la klientoj volis laŭeble malmultekostan restadon), kiu havis tre belan retejon, promesis pintajn servojn, kaj la po-

sedantino tre amike en la bona angla korespondis kun mi. Sed pro mia malsperteco min ne avertis, ke la retejo montras ridantajn posedantojn, promesas familiecan medion, sed montras neniun ĉambron, nek la akceptejon. Miabonŝance tio estis la lasta loko de nia vojaĝo post Koreio kaj Japanio, en kiuj ĉio perfekte funkciis kaj mi reciproke bone konatiĝis kun miaj klientoj kaj nia rilato kaj etoso estis vere amika. Mi tamen ne miris, ke ili faris preskaŭ revolucion.

Unue, la vojo de la urba finstacio al la gastejo ŝajnis al mi mallonga kaj laŭ la mapo klara kaj preskaŭ rekta, do ni iris piede kun la valizoj. Feliĉe ili estis sportemuloj. Mi ne gvidis ilin vere rekte, sed kun ioma neintencita plilongigo kaj la lokon ni atingis tre lacaj, tion ili ankoraŭ iel akceptis. Sed kiam ni alvenis al la domo, en kiu ni devus tranokti, mi teruriĝis. Ununura vere malbela domo en la strato, ene dratoj el muroj kaj kiam ni venis al la akceptejo kaj ekvidis la ĉambrojn sen pordoj, kun nur kurtenoj, kompreneble miaj amikoj komencis min per vortoj ataki, kion mi bone komprenis. Mi petis ilin, ke ili restu sidantaj kaj ripozu kaj kuregis serĉi alian tranokteblon. Mi trovis laŭ la mapo la plej proksiman hotelon, kiu estis plenokupita, la dua same, la tria povus loĝigi nur duonon de ni kaj kiam mi demandis pri iu alia, ĉar alian mi ne vidis en tiu urbokvartalo, ili diris al mi, ke en la ĉirkaŭaĵo estas neniu plia.

Mi feliĉe demandis, ĉu ili ne havas iujn matracojn, por ke iuj povu dormi surplanke. Tial mi eksciis, ke ili jes havas ankaŭ tradiciajn ĉambrojn meblitajn per matracoj, sen litoj, sed ilin oni ne kuraĝis oferti al mi. Mi ankoraŭ demandis pri la prezo, de kiu mia kapo iom svenis, rapide kalkulis, ĉu sufiĉas mia monrezervo, kiun mi feliĉe ne devis tuŝi en Koreio, nek en Japanio, kaj akceptis tion. Ja pli bone malprofiti ol travivi tiun honton kaj perdi ĝis tiam perfektan renomon. Mi revenis kaj diris al la grupo, ke ili sekvu min, sed la virino ĉe la akceptejo ne volis ellasi nin kaj postulis de mi pagon por la menditaj noktoj. Mi iomete diskutis kun ŝi kaj fine ni liberiĝis kaj mi fuĝis kiel trompulo, ĉar tiom da mono por pagi la hotelon multe pli kostan ol mi havis en mia buĝeto, kaj aldone ankaŭ tiun teruran tranoktejon, mi simple ne havis.

Tio estis mia ununura malbona travivaĵo en Tajvano, kiu makulis la komencon de la unua vojaĝo tie. Duan fojon mi jam rezervis tranoktojn rekte en tiu nia savhotelo, kiu eĉ havis rektan aŭtobusan konekton kun la flughavena busstacio do ĉio iris glate.

Ambaŭ niaj vizitoj al Tajvano estis ligitaj al la marŝfestivalo, do mi skribu iujn liniojn ankaŭ pri ĝi. Dum du sinsekvaj tagoj oni piediris laŭ sia elekto po 20, 30 aŭ 50 km. Mi elektis la plej facilan dudekkilometran itineron. Estas kutimo en tiuj festivaloj, ke la vojo estas alterne supren kaj suben. Sed dum la unua tago preskaŭ la tutan duonon ni devis iri nur supren kaj dume regis nekredeble varmega suna vetero. Do mi tiel ŝvitegis kaj laciĝis, ke mi eĉ pripensis rezigni la duan tagon. Fine mi solvis tion alimaniere. Mi elserĉis vendejon, kie mi vidis mallongan pantalonon el tre fajna ŝtofo, do mi esperis, ke portante ĝin anstataŭ mia longa pantalono mi eltenos la varmegon pli bone. Nur post kiam mi vestis min en ĝin matene, mi rimarkis, ke ne temas pri sporta mallonga pantalono, sed pri subvestaĵo. Nu, ĝi estis kolora kaj mi diris al mi, ke en la amaso de miloj da marŝantoj tio ne gravos.

Sed kia surprizo! Matene la duan tagon antaŭ la ekstarto okazis iu ceremonio kaj oni vokis min veni al la podio. Mi hezitis kaj strebis persvadi la organizantojn, ke mi pro mia nekonvena vestaĵo prefere restu sube, sed la respondo estis, ke tio ja ne gravas inter sportistoj. Do mi staris sur la podio en subpantalono (espereble ne ekkonebla de malproksime) inter dece kaj serioze vestitaj personoj, iuj eĉ kun kravatoj. Tiuj el ili, kiuj ankaŭ aktive partoprenis la marŝon, transvestiĝis nur post tiu ceremonio, pri kiu mi ne estis avertita. Mi tre miris, ĉar kutime simila ceremonio okazadas nur fine de la evento. Tamen jes, ankaŭ ĝi tie okazis, eĉ pli feste, kaj tie mi jam komprenis, ĉar oni parolis angle, sed dum tiu matena ceremonio mi estis kvazaŭ muta figuro, ĉar regis nur la ĉina. Mi aldonu, ke tiun matenan ceremonion partoprenis nur la partoprenantoj de la dudekkilometra itinero, ĉar tiuj, kiuj elektis marŝi 50 kaj 30 km jam estis survoje. Mi bedaŭris, ke mi ne donis al iu mian fotilon, por vidi, kiel mi aspektas sur la podio, sovaĝulo inter elegantuloj.

Krom ĝui la **IML** en la nacia parko, ni ankaŭ esploris la urbon Tajpeo. Ĝi estis komplika por orientiĝi pro rektangule kruciĝantaj stratoj, kiuj similis en niaj okuloj unu al la alia. Sed ni havis perfektajn mapojn kaj alkutimiĝis. La trafiko estis same densa kiel en Pekino, sed ĉi tie ne bicikloj, sed mopedoj estis la ĉefaj unuspuraj trafikiloj, kiuj vere svarmis en la tuta urbo.

Nia unua plej impona celo estis la nubskrapulo Tajpeo 101, kiu ĵus estis atinginta sian pinton, sed ankoraŭ ne estis malfermita al la publiko. Ĝi



Ĉeĥa grupo de marŝantoj dum oficiala fermo en Tajvano

konkeris plurajn rekordojn: ĝi estis la unua konstruaĵo en la mondo, kiu atingis altecon de pli ol duonkilometro (508 m), fariĝis la plej alta en la mondo (ĝis la jaro 2007, kiam ĝi estis superita de Burĝ Ĥalifa en Dubajo). Sian nomon ĝi ricevis de la nombro de siaj etaĝoj, 101. Starante antaŭ ĝi kaj rigardante la supron mi eĉ eksentis kapturniĝon.



Maŭzoleo de Ĉiang Kai-ŝek

Alia nepre menciinda loko estas la maŭzoleo de Ĉiang Kai-ŝek, kiun vere valoras viziti ankaŭ interne. Ene estas modeste, sed elegante ekipita ĉefa salonego kaj ankaŭ la koridoroj kun multaj decaj ornamaĵoj kaj informoj. Efikas impone ne nur la propra maŭzoleo, sed la tuta komplekso kun granda placo kaj monumenta enirpordego.

Survoje al la maŭzoleo mi malkovris sekreton de unu mistero, kiu turmentis mian kapon, nome la bariloj faritaj el bambuoj. Ne nur mi admiris, kiel ili estis same dikaj,



Kortego de la maŭzoleo



„Bambua“ barilo el betono

sed ankaŭ mi ne povis kompreni, kiel ili estas kunmetitaj. Ĉar ĉie ili estis nealpaŝeblaj pro densaj arbustoj antaŭ ili, mi devis atendi. Finfine mi malkovris la sekreton, ĉar ni preteriris parte damaĝitan barilon, kiu malkaŝis al ni, ke la bambuoj estas faritaj el betono aŭ simila materialo! Sed ili tiel fidele similis al naturaj bambuoj, ke mi tute ne imagis, ke ili povas esti artefaritaĵoj.



Panjo kun filino, ĉarma duopo

Kultura vespero por la eksterlandaj partoprenantoj okazis ambaŭkaze fine de la evento. Ĝi prezentis la lokan kulturon kaj mi devas rememori almenaŭ unu. Fine de la programo grupo de ĉarmaj junaj virinoj en tradiciaj kostumoj prezentis indiĝenajn dancojn, por mi temis pri nekutimaj kaj dancmaniero kaj muziko. Post sia findancado la knabinoj diskuris inter la publikon kaj ĉiu elektis iun viron kaj invitis lin danci. Mi havis la bonŝancon, ke min invitis la plej bela kaj tre simpatia junulino, kun kiu mi ne nur agrable dancis kaj dume babilis, sed ni restis babilantaj ankoraŭ post la dancfiniĝo. Ŝi prezentis al mi sian panjon, gvidantinon de la dancgrupo, kiun mi divenus esti ŝia fratino ol patrino. Ni interŝanĝis niajn nomkartojn kaj promesis al ni skribi, ĉar la sekvan tagon, nian lastan en Tajvano, ŝi estis okupita. Sed kiel okazadas en similaj okazoj, oni restis nur ĉe la intenco kaj nek mi skribis al ŝi, nek de ŝi mi ricevis iun mesaĝon. Sed bela rememoro al tiuj du ĉarmulinoj (la studentino kun sia panjo) restis al mi kiel agrabla rememoro.

La vivo surstrate. Mi ne volas priskribi senhejmulojn, tiujn mi renkontis nek en ĈPR, nek en Tajvano, sed mencii tion, ke homoj kutimas konduti kaj vivi surstrate, same kiel ni ekzemple en privata ĝardeno. Kiel ekzemplon mi montru almenaŭ ĉinan ŝakon rande de frekventata strato.



Kaj la filino elektis min por danci!



Ĉinaj ŝakoj surstrate



En malgranda gemuta restoracio

Gastronomiaj spertoj. Mian unuan sperton kun la ĉina restoracio mi jam menciis. Ĝi estis la unuan vesperon en Pekino kaj ĝi pli aŭ malpli similis viziton al ĉina restoracio ie ajn en la mondo. Sed sekve mi eksciis, ke tio estis vere nur priservejo por turismaj grupoj.

Multe pli plaĉis al mi malgrandaj restoracioj, kaj en Pekino, kaj en Ŝjiano, kie estis nur malmultaj rondaj tabloj, kaj kie oni povis ĝui ne nur la ĉinan manĝon, sed ankaŭ la etoson de la ĉina manĝado. La sistemon de moviĝanta ronda tabulo super la ronda tablo mi jam priskribis en la dua ĉapitro. Mi aldonu, ke antaŭ si ĉiu havis negrandan teleron, sur kiun oni metis la bongustaĵojn de la supra tabulo, manĝis, aldonis ion alian, ktp.

Ni ekkonis la neatenditan ĉinan afablecon flanke de la restoraci-stabanoj, kiam ni envenis posttagmeze, ie flanke de Pekino, en restoracion kaj volis eksidi, sed oni informis nin, ke ili nun havas paŭzon, por ke ankaŭ ili povu finfine tagmanĝi. Tamen, kiam ili ekkomprenis, ke ni ankoraŭ ne tagmanĝis, estas malsataj kaj ĝojas finfine ekvidi restoracion, ili proponis al ni, ke ni povas modeste kunmanĝi, se por ni sufiĉos la samo, kion ili tagmanĝos. Ni tre volonte konsentis, ja estis eĉ interese ekscii, kiel manĝas



Tagmanĝo kune kun la dungitoj de granda restoracio

la dungitoj de sufiĉe granda restoracio. Ni do estis tute kontentaj. Ne nur pro tio, ke ni povis satiĝi, sed la manĝo estis vere bongusta; rizo kun io nedifinebla, sed tre bongusta kaj multe da legomo.

Aliajn du gastronomiajn travivaĵojn mi havis en Tajpeo. La unua estas el merkato, kie mi vidis en granda vitra ujo grandan serpenton. Mi rigardis ĝin kaj cerbumis, ĉu ĝi estas varo por vendi, ĉu ornamaĵo, aŭ ĉu temas pri nutraĵo. La vendisto alvenis al mi kaj montris ion, kion mi deĉifris kiel „bongustaĵo“ kaj invitis min internen. Ĉio per gestoj, ĉar nia komuna lingvo estis nur manoj kaj gestoj de la vizaĝo. Mi scivoleme eniris kaj eksciis, ke en la malantaŭo ne estas nur vendejo, sed ankaŭ malgranda manĝejo kun etaj tabloj kaj seĝoj sen dorsapogiloj. Kaj kiam mi ĉirkaŭrigardis, mi vidis tranĉitajn partojn de serpentoj por vendi kaj kelkajn potojn, en kiuj io kuiriĝis. La odoro estis por mi tute nekutima, sed mi ne povis decidi, ĉu ĝi efikas al mia nazo kiel eta fiodoro aŭ eta bonodoro.

Nia man- kaj gest-komunikado daŭris, ĉar li havis neniun alian klienton ol min. Mi unue malakceptis aĉeti ion por manĝi, ĉar mi havis antaŭjuĝojn manĝi serpentojn. Sed post kiam li ofertis al mi peceton kaj ĝi bongustis,

mi mendis *iom.* Tiu *iom* fariĝis eble preskaŭ duonkilogramo, sed ĝi vere bongustis kaj mi formanĝis la tuton. Mi ne plu rememoras la prezon, sed mi bone memoras mian timon, ke li uzos la okazon kapti *riĉan okcidentan* turiston kaj la prezo estos astronomia. Tamen ĝi estis vere modera.

Tute alian gastronomian rememoron mi havas de mia lasta vespermanĝo de mia dua vizito al Tajvano. Tiun lastan vesperon mi lasis al ĉiuj libera, kaj ankaŭ mi volis libere ĝui ĝin. Ĉar restis al mi sufiĉe granda sumo de tajvanaj dolaroj, mi decidis manĝi en iu luksa restoracio. Mi iris laŭlonge de iu ĉefa strato kaj rigardis restoraciojn, ĝis mi vidis tra fenestro veran lukson kaj surprize pli ol duonon de la tabloj okupitaj, kio en tiuj antaŭaj ne estis. Estas mia kutimo, ke mi ĉiam preferas en nekonata urbo restoraciojn, kie estas multaj homoj, ĉar tio signifas, ke oni tie servas bongustajn manĝojn kaj krome la prezoj ne estas troigitaj. Do mi ne hezitis kaj eniris.

Mi eksidis ĉe libera tablo, tuj venis tre bela kelnerino kaj kun kliniĝo donis al mi menuon. Laŭ la nivelo de la restoracio mi esperis, ke ĝi estos, krom en la ĉina, almenaŭ en la angla, sed ne estis. Tial mi vokis ŝin kaj komencis internacian komunikadon provante ĉiujn lingvojn, kiujn mi iom posedas. Ŝi simpatie ridetis kaj parolis al mi plu ĉine. Poste ŝi foriris, venis kelnero perfekte vestita, kliniĝis kaj alparolis min – ĉine. Mi jam eksentis senesperon sed mi ekhavis ideon! Mi rigardis al la proksimaj tabloj kaj sur unu staris aparato, en kiu brulis fajreto kaj super ĝi pendis bela fiŝo. Ĉar mi estas fiŝŝatanto, mi montris al ĝi kaj per gestoj mendis la samon. La ĉefo foriris post multaj kliniĝoj, okulfrape ĝojigita.

Post momento aperis denove la kelnerino, kiu portis grandan pleton kaj sur ĝi plurajn telerojn kun io. Mi jam sciis, ke oni mendas kaj pagas nur ĉefpladon, sed ricevas kutime plurajn aldonaĵojn. Do mi elektis teleron kun iuj rostitaj nuksoj kaj komencis antaŭmanĝi. La gusto estis agrabla, sed por mi tute nekutima. Tiutempe mi ankoraŭ bezonis okulvitrojn nur por legi, kaj ĉar mi estis scivolema, kion mi manĝas, mi elprenis ilin por bone vidi, kion mi havas surtelere. Kaj mi miris. Tiuj „nuksoj" havis elitrojn, okulojn kaj piedetojn! La unuan fojon en mia vivo mi manĝis rostitajn skarabojn.

Mi diris al mi, ke, se ili bongustis al mi ĝis nun, do ja devas bongusti plu. Sed ne! Tial mi ekkomprenis, ke ankaŭ mi suferas pro antaŭjuĝoj. Mi simple ne plu povis manĝi ilin, do mi almenaŭ pakis kelkajn en buŝtukon



Neforgesebla pekina anasaĵo



Pekina anasaĵo jam surtable

por povi hejme fanfaroni, kion mi manĝis. Sed tio ne funkciis, ĉar la skaraboj komplete putriĝis kaj mi devis forĵeti ilin.

Por la lasta gastronomia travivaĵo mi resaltu al la lasta vespermanĝo en Pekino por fini per la plej konata ĉina specialaĵo. Tie ni komune vizitis specialan restoracion, kie oni priservis nur pekinan anasaĵon. La vespermanĝo estis vera gastronomia koncerto kun instrukcio, kiel manĝi ĉiujn partojn de la menuo. Kompreneble denove ĉe rondaj tabloj cirkulis diversaj menupartetoj. Kelnero kunportis kompletan anasaĵon sur tableto kun radetoj kaj antaŭ niaj okuloj eltranĉadis de ĝi malgrandajn pecetojn kaj sekve la telerojn kun ili metis sur la turniĝantan diskon. Sur aliaj teleroj estis priservataj specialaj tre maldikaj patkukoj, diversaj freŝaj legomoj kaj speciala saŭco *hoisin*. Nu, efektive pekina anasaĵo bongustas en Pekino pli bone ol en ĉina restoracio en Eŭropo, eĉ se ĝi estus preparita precize same. Certe pro tio, ke neniu eŭropa ĉina restoracio povas liveri la aldonan etoson.

Impresoj el Koreio

Kiel mi jam menciis enkonduke, mia unua vizito al Koreio estis samtempe mia unua vojaĝo tiel longa orienten. Tio estis subita uzo de bonŝanco en la tempo, kiam mi dronis en laboro, ĉar mi komencis funkciigi nove fonditan privatan entreprenon. Krome mi ankoraŭ havis iujn instrudevojn en la universitato, tial la vojaĝo ne povis esti prokrastita, ĉar dum la instrumonatoj mi ne plu povus liberiĝi.

Mi do tro haste preparis min. La plej grava parto de mia valizo estis boteloj da likvoro Beĥerovka, kiu ĉe mi tre bongustis al mia korea invitanto, profesoro de tradicia korea medicino Puramo CHONG. Mi sciis, ke li tie min atendos kaj ne minacos mia perdiĝo, do mi ne zorgis pri praktikaj preparoj de la vojaĝo. Mi ja sciis, ke tie oni manĝas alimaniere, sed eĉ ne provis manipuli bastonetojn, kiujn mi tenis enmane la unuan fojon en la flugmaŝino celanta Seulon kaj tie nesukcese komencis provi manĝigi min pere de ili. Sed mi rezignis kaj daŭrigis per eŭropa manĝilaro, ĉar mi ricevis ambaŭ.

Kiam mi alteriĝis en la seula flughaveno Gimpo kaj trairis la kontrolon, tuj mi ekvidis junulon tenantan ŝildon kun verda stelo kaj mia nomo. Temis pri la amiko de Puramo, CHOE Taesok, kiu multe helpis al mi kaj kun kiu ni baldaŭ amikiĝis. Cetere, kvankam mi vidis, ke li laboregas en sia oficejo de mateno ĝis ofte malfruvespero, kiam ajn mi venis al li kaj petis ion, li ĉiam liberiĝis kaj volonte dediĉis sian tempon al mi.

Li veturigis min al la privata kliniko de Puramo en Gwangmyeong, la sudokcidenta antaŭurbo de Seulo. Tie aperis por momento Puramo klarigante, ke li ankoraŭ havas konsulthorojn, do ke mi intertempe enhejmiĝu en la gastĉambro. Tien min gvidis Taesok, montris al mi la bezonatajn higienajn ĉambretojn kaj lasis min aranĝi miajn aĵojn kaj iom ripozi.



Kun la geedzoj CHONG ĉe la klinika akceptejo

Mi tuj rimarkis, ke sur la akceptejo havas Puramo kiel ĝisosta esperantisto ŝildon en Esperanto BONVENON, ĉe kiu mi dum la unua okazo fotiĝis kun li kaj lia edzino Namsook.

Ne timu, ke mi tiel detale priskribos ĉiujn alvenojn en novan medion, sed komprenu, ke ĉi tiu unua estis por mi vere nova kaj surpriza sperto kaj tial ĝi profunde eniris en mian memoron. Post kiam Puramo liberiĝis, li venis sincere min bonvenigi kaj invitis min vespermanĝi. Dum la vespermanĝo mi konatiĝis kun lia tre bela, ridema kaj simpatia edzino, kun kiu mi bedaŭrinde ne povis rekte komunikiĝi, sed nur per gestoj kaj helpe de manoj, ĉar ni havis neniun komunan lingvon.

La vespermanĝo estis abunda, sed feliĉe por mi, ĉiuj partoj de la menuo troviĝis meze de la tablo kaj ni memstare transigis al sia telero por manĝi kion ajn laŭ sia gusto. Estis tie krom rizo kelkaj specoj da fiŝo, fermentigitaj legomoj (poste mi eksciis, ke temas pri la korea specialaĵo, kimĉio), kaj pluraj aliaj manĝaĵoj. Mi devas konfesi, ke la nekutima spicaĵo odoris por mi nekutime, eĉ iom malagrable. Krome mi ne vere malsatis, do mi nur gustumis peceton da fiŝaĵo kaj iom da rizo. Tie mi ankaŭ la unuan fojon vidis metalajn bastonetojn kaj estis instrukciata, kiel teni ilin por povi min manĝigi.

Vespere mi kun Puramo en tre agrabla amika etoso babilis kaj venis vico ankaŭ al la kunportita Beĥerovka. Mi tute ne kutimas trinki fortajn alkoholaĵojn, fakte por ĝojigi min sufiĉas biero kaj vino. Sed kompreneble kun Puramo mi tostis kaj mirige, la likvoro eĉ bongustis al mi kaj komune ni baldaŭ malplenigis du botelojn.

Tiun agrablan vesperon tamen sekvis por mi malpli agrabla nokto, ĉar verŝajne pro nekutimeco al alkoholo kaj ankaŭ, ĉar mi suferis nelonge an-



CHOE Taesok ĉe sia labortablo

taŭ mia vojaĝo pro inflamo de stomaka parieto, mi havis grandan stomakan doloratakon. Mi nevole iom laŭte veis, ankaŭ en la antaŭĉambro survoje al la necesejo, kio vekis Puramon kaj li demandis, kio okazis al mi. Aŭskultinte, ke mi havas stomakdoloron, li tuj proponis al mi, ke ni iru suben en lian kuracejon kaj ke li aplikos al mi akupunkturan helpon. Kiam mi rigardis liajn dormemajn okulojn kaj nestabilajn paŝojn de la persono sub influo de alkoholo, mi energie malakceptis tion kaj eĉ verŝajne iom ofendis lin, ĉar mi diris, ke mi timas, ke sub la influo de tiu Beĥerovka li povus min piki erare en alian punkton kaj produkti de mi impotenton, kion mi ja ne deziras.

Parenteze: eĉ post pli ol unu jaro, kiam mia edzino Stanjo restadis en Seulo (tie ŝi dumtage gvidis someran konversacian kurson por la universitataj studentoj de la ĉeĥa kaj vespere en Seula Esperanto-Kulturcentro konversacian kurson de Esperanto) Puramo kelkfoje parolrevenis al nia unua seula vespero kaj strebis konvinki ŝin, ke li ne estas drinkulo kaj nur escepte ni tiun vesperon iom troigis la kvanton de la trinkita Beĥerovka.

Se mi jam menciis la restadon de Stanjo en Seulo, mi aldonu, kiel al ŝi Puramo per sia akupunkturo efektive helpis. Ŝi de tempo al tempo sufera-

dis pro nuka rigidiĝo, tial ŝi ne povis turni la kapon al unu flanko. Kutime la kuracado ĉe ni daŭris unu semajnon. Sed helpe de la akupunkturaj pikoj de Puramo jam post la unua apliko ŝi sentis tre senteblan pliboniĝon kaj post la dua jam povis movi la kapon sen ajna limigo.

Sed reen al miaj travivaĵoj. Ne plu mi enmetos miajn rememorojn en la tempa sinsekvo de miaj sep vizitoj al Koreio, sed mi strebos almenaŭ iomete grupigi ilin laŭteme, kio verŝajne kontribuos al pli logika konatiĝo kun la lando por tiuj, kiuj havas pri ĝi minimuman aŭ eĉ neniun scion.

Gastronomio. Kiel mi jam klarigis, Koreio estis la unua orientazia lando, kiun mi vizitis.Pro la neatendita invito kaj nedispono de tempo por prepariĝi al novaj realaĵoj, kiuj atendas min, multo kaŭzis al mi gravajn surprizojn. La unuaj estis vere malsimilaj manĝoj, ol kiujn mi renkontis ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj landoj de la mondo, kiujn mi antaŭe vizitis. Mi ne estas kontraŭanto de spicaĵoj. Ekzemple hungara kuirmaniero, pri kiu oni ĉe ni kutimas diradi, ke en ĝi oni troigas akrajn spicaĵojn, al mi tre bongustas. Sed kion mi travivis en Koreio rilate al spicitaĵoj, tio igis min ne plu fanfaroni, ke mi ŝatas (aŭ almenaŭ toleras) akre spicitajn nutraĵojn.

La unua manĝo, kiun mi, akompanate de Taesok gustumis en korea restoracio, estis supo. Ĝin mi ricevis varmegan, do mi malrapide kirlis ĝin per kulero kaj atendis, ĝis ĝia temperaturo konvenos por ĝin manĝi. Sed la tempo pasis kaj la supo ŝajnis al mi plu varmega. Taesok miris kaj asertis, ke tio ne eblas, ja li jam havis tiun sian formanĝitan. Nu, mi provis manĝi kaj ekkomprenis, ke la supo min pikas ne pro sia varmego, sed pro la akrega spicaĵo. Kiam mi heroe formanĝis ĝin preskaŭ ĝis la fundo, mi ekvidis kial: sube estis minimume dek malgrandaj, tre pikigaj paprikoj.

Kaj simila sperto, ke mi preskaŭ ne povis, aŭ eĉ tute ne povis manĝi, validas ankaŭ pri la korea nacia manĝaĵo – kimĉio. Ĝi estas pikanta, por mi ofte tro pikanta salato preparita el peklita fermentigita legomo kaj pluraj aldonaĵoj. Ĝi ne ĉiam, sed tre ofte por mi estis apenaŭ manĝebla ĝuste pro sia akra pikanteco. Ĝin oni aldonas al preskaŭ senescepte ĉiuj ĉefaj manĝoj, iam en aparta pelveto, sed ofte ne nur en la saman teleron apud la ĉefmanĝo, sed eĉ supren al ĝi. Tial mi ofte petis *no kimĉi*, kio kutime kaŭzis, ke oni aŭdante *kimĉi* donis al mi duoblan porcion de ĝi. Nu, nun estas kimĉio senprobleme aĉetebla ankaŭ ĉe ni kaj ankaŭ mi aĉetadas kaj manĝas ĝin, sed tiu eŭropa kimĉio neniam estas tiel pikiga kiel tiu, kiun mi renkontis

en Koreio. Mi ankaŭ eksciis, ke koreoj apenaŭ pretas manĝi ion sen kimĉio, tial vojaĝante ili ofte kunportas ĝin en tubetoj en formo de pasto kaj aldonas ĝin al preskaŭ ĉio, do ankaŭ al niaj eŭropaj manĝoj.

La unua vespermanĝo en tradicia korea restoracio ankaŭ estis por mi neforgesebla travivaĵo. Kiam dum mia unua vizito al Koreio Puramo invitis min kaj kelkajn plurajn personojn al proksima restoracio, mi ne imagis, kio atendas min. Surprize mi rigardis la unuan fojon malaltajn tablojn, ĉirkaŭitajn de sidkusenoj kaj ekkomprenis, ke ne eblas alia solvo ol eksidi al la tableto kun krucitaj kruroj kiel la ceteraj. Nu, bone, iel mi sukcesis miajn preskaŭ du metrojn faldi kaj eksidi, sed tuj dekomence mi sentis de tiu por mi nekutima sidmaniero doloron ne nur en la kruroj. Nu, mi eltenis tion, kvankam mi devis tre zorgi, por ke miaj grimacoj ne montru mian korpan turmentiĝon. Mi ne plu rememoras, kion ni manĝis, nek pri kio ni dume babilis, nur iom nebule mi memoras, kiel mallerte mi ankoraŭ regis la bastonetojn, ĉar la impreso de miaj suferoj pro la sidmaniero transigis ĉiujn aliaj impresojn, kvankam tiuj preskaŭ certe estis multe pli agrablaj.

Nu jes, ĉio havas sian finon, mi pensis, ankaŭ mia sidsuferado finiĝos kaj mi jam tre ĝojatendis la momenton, kiam post la vespermanĝo mi povos denove rektigi miajn krurojn. Sed ho ve! Kiam venis tiu momento ĝoje atendata, mi eksciis, ke miaj kruroj ne obeas min kaj daŭris tro longe ol mi ekstaris. Kaj kio estis eĉ pli terura por mi, tio tamen estis amuza por miaj kompanianoj. Estis la fakto, ke post la unua provo ekiri mi stumblis kaj balanciĝis kaj se feliĉe ne estus apude muro, verŝajne mi estus falinta.

Interesan kaj por mi iom nekutiman trajton de konduto de dungitoj en koreastila restoracio, kiun mi rimarkis, estis ilia simpatia senpereco. Ekzemple en restoracio, kie ĉe iuj tabloj sidis gastoj kaj manĝis, la kuiristino venis kun siaj bezonataĵoj al libera tablo kaj tie senprobleme preparis la manĝon.

Alia surprizo atendis min, kiam Puramo invitis min kaj Choe Taesokon en iun restoracion, kie oni priservis nur unu specon da manĝaĵo, sed tre raran. Ni eniris tien babilante kaj mi ne demandis, pri kiu specialaĵo temas. Puramo ion mendis koree, kaj nia parolado sekvis. Post iom da tempo la kelnero alportis por ni iom nekutime altajn manĝujojn kaj nur post tiam mi ĉirkaŭrigardis kaj vidis similajn ujojn ankaŭ antaŭ la personoj ĉe aliaj tabloj. Mi prenis bastonetojn, rigardis la internon de la manĝujo, kaj konsterniĝis. Tie troviĝis malgrandaj vivantaj polpoj, kiuj diversmaniere



La manĝopreparado inter gastoj

moviĝis. Mi rigardis, kiel homoj manĝas ilin kun nekredebla lerteco, oni kaptis per bastonetoj la korpon de polpo, enmetis ĝin en la buŝon dum la brakoj de la kompatinda besteto ankoraŭ moviĝis ekstere.

Mi rigardis Puramon kaj petis, ke li ne ofendiĝu, sed mi ne povas manĝi tion. Li klarigis al mi, ke mi ne timu, ke ili estas tre zorge purigitaj, al kio mi reagis, ke ne pro la timo de malpureco, sed mi ne povas mortigi per miaj dentoj vivan estaĵon kaj manĝi ĝin, ĉar mi konsiderus min barbaro. Tio iom ekscitis lin kaj responde li demandis, ĉu manĝante kadavrojn de bestoj mi ne konsideras min barbaro?!

Dume Taesok flustris al mi, ke estas granda honoro por li, ja pro mi ankaŭ li estis invitita al tiu eksternormala kaj tre multekosta restoracio kaj mi nepre ne malakceptu la bonkore proponitan bongustaĵon. Mi denove pardonpetis ambaŭ kaj petis Taesokon, ke li manĝu ankaŭ mian porcion, ĉar mi vere ne kapablas. Tion li volonte plenumis kaj survoje de la restoracio mi aĉetis ion por manĝi surstrate. Feliĉe estas tie multaj vendejetoj kun bazaj nutraĵoj kaj bezonataĵoj malfermitaj 24 horojn tage.

Mi ankaŭ rememoru la unuan matenmanĝon en la kliniko de Puramo. Kiam mi estis invitita al matenmanĝo, Puramo jam estis en sia konsultejo

kaj mi manĝis komune kun kvar aŭ kvin liaj flegistinoj kaj oficistinoj. Ĉar kiel ĉefa manĝo estis denove rizo, do por mi nekutimaĵo, kaj al tio pluraj aldonaĵoj, inter ili fiŝoj, mi demandis, ĉu estas ĝenerala kutimo en Koreio manĝi ankaŭ matene rizon. Ili rigardis min kurioze kaj unu jesis kaj tuj demandis *Kaj kion matenmanĝas vi en Eŭropo?* Mi strebis klarigi, ke regas diversaj kutimoj, sed plejparte la matenmanĝo konsistas el pano kun butero kaj al tio diversaj nutraĵoj, ovoj, kolbasoj, fromaĝo, dolĉa fruktokonfitaĵo aŭ mielo, … Ilia reago vere tre surprizis min, ĉar ili preskaŭ unuvoĉe reagis *Panon, ĉiutage panon? Tio devas esti terura!* Sed manĝi trifoje ĉiutage rizon estas kompreneble normale! Kiam mi sekve aĉetis tion, kion oni nomis pano, mi ne plu tiom miris. Temis pri diversaj, plejparte dolĉaj bakaĵoj por mi ne tro bongustaj. Tamen, en la centro de Seulo ekzistis ankaŭ bakejoj, kie oni vendis francan panon kaj dum miaj venontaj vizitoj al Koreio tiuj jam estis aĉeteblaj ankaŭ en multaj lokoj ekster la urba centro.

Post tiu ekscio, ke pano ne estas kutima manĝaĵo en Koreio, mi demandis Puramon pri la traduko de la baza kristana preĝo en la korean, ĉar ja ĝi enhavas inter alie *nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ*, ĉu oni en la korea preĝas pri ĉiutaga rizo, aŭ kiel. Kaj do mi eksciis, ke oni preĝas *nian manĝon ĉiutagan*, kio ŝajnas al mi eĉ pli trafa, ĉar ja se oni preĝante petas pri pano, oni celas ne konkrete panon, sed iun ajn manĝaĵojn por ne devi malsati.

Por mi ne vere tuj komprenebla estis la peto de Puramo, ke mi neniam aĉetu fromaĝon aŭ eĉ enmetu ĝin en la fridujon, ĉar lia edzino la odoron de fromaĝo tute ne povas toleri kaj ŝi fartus tre malbone. Mi demandis, ĉu tio validas por tiuj specoj de fromaĝo, kiuj estas forte aromaj, aŭ eĉ por malmolaj fromaĝoj, kiuj ne odoras. Li respondis, ke tio validas por ĉiuj specoj de fromaĝoj, ĉar por ŝi odoraĉas ĉiuj. Kvankam mi estas fromaĝŝateganto, mi memkomprene respektis tion kaj manĝis fromaĝon eĉ ne ekstere, por ke ĝi ne estu sentebla el mia buŝo post la reveno. Eble decas aldoni, ke kvankam la familio de Puramo kun du infanoj loĝas en proksima granda loĝejo, ankaŭ en la kliniko kun kuirejo, manĝejo, ĉambroj por gastoj kaj en unu por ili la edzino ofte estadis.

Alia gastronomia sperto, kiun mi renkontis en Koreio, kaj laŭ kiu mi rekomendus konduti ĉie en la mondo, montras efikan batalon kontraŭ malŝparo de nutraĵoj. Ni estis en restoracio kun memserveja tablo. Oni pagis ĉe la enirejo fiksan sumon kaj povis manĝi kiom ajn oni volis. Tio ja

estas relative ofta kutimaĵo ankaŭ en aliaj landoj. Sed ĉi tie regis speciala regulo: se iu ne formanĝis ĉion, kion li aŭ ŝi metis sur sian teleron kaj redonis la teleron kun eĉ malgranda nutraĵpostrestaĵo, tiu devis enmeti en specialan sigelitan vitran ujon ĉe la elirejo ankoraŭfoje la saman sumon, kiun oni pagis enirante la restoracion. Se mi bone rememoras, tiel kolektita mono estis destinita por subteno de malriĉuloj. Vere admirinde kaj sekvinde.



Televid-turo kun turniĝanta restoracio

Vespera Seulo de supre. Unu posttagmezon post siaj konsulthoroj Puramo volis veturigi min al la pinto de la monto Namsan en la centro de Seulo, kies dominanton kreas televida Seul-turo, 236 m alta. Krom tio, ke ĝi servas kiel televida dissendostacio kaj enhavas kvar etaĝojn de belvidejoj, en la plej lasta belvidetaĝo estas lokita turniĝanta restoracio. Do dummanĝante oni povas ĝui la tutan urbon desupre. Kiel mi jam menciis, ni ekveturis posttagmeze, eble je la kvina, kaj la distanco ne estis longa, sed pro nekredebla ŝtopiĝo survoja, kiu multe pli ofte starigis nin ol malrapide ŝovis nin antaŭen, ni venis al la pinto de la monto nur kiam jam mallumiĝis. Sed mi ne bedaŭras tion, ĉar mi supozas, ke la beleco de la lumigita urbo rigardata kun bongusta manĝaĵo estis verŝajne eĉ pli ĉarma ol se ni estus vidintaj ĝin dum la taglumo. Ĉar unu turniĝo de la restoracio daŭras 48 minutojn, ni havis la bonŝancon manĝante ĝui vere ĉiujn flankojn de la urbo.

Orientiĝo en la metroostacio kaj buslinio. Mi preskaŭ ne uzadis metroon, ĉar de la privata kliniko de Puramo, lokita en la antaŭurbo Gwangmyeong trafikis rekta buslinio en la centron de Seulo, ununura loko, kie



Suda pordego

mi dum mia unua vizito al Koreio vagadis memstare. Al ĉiuj aliaj lokoj veturigis min per aŭto aŭ la gastiganto Puramo, aŭ Taesok. Tamen mi havas neforgeseblajn rememorojn kaj pri metroo, kaj pri busveturado.

En la Seula Esperanto-Kulturcentro, pri kiu mi ankoraŭ skribos, mi konatiĝis kun la kanadano Barry Savage, kiu tiutempe kun sia korea edzino vivis en Seulo kaj kiu proponis al mi, ke ni la venontan tagon renkontiĝu kaj promenu komune. Kaj tuj li proponis, ke ni renkontiĝu en konkreta metroostacio. Mi demandis kie, ĉar en la stacio mi neniam estis kaj mi ne povis imagi, kiel ni povus trovi unu la alian inter amaso da vojaĝantoj en nekonata kaj certe komplika metroosistemo. Sed li anstataŭ respondi rigardis la horloĝon kaj rapide adiaŭiĝis, ĉar li jam devis iri kaj finis per la vortoj *Do morgaŭ je tiu kaj tiu horo en tiu kaj tiu metroostacio* – kaj malaperis.

Mi estis embarasita, sed malgraŭ mia nekredemo, ke iu hazardo helpos al ni trovi unu la alian, mi iris venonttage en la ĝusta tempo al la difinita metroostacio. Kiam mi vidis la amason da homoj celantaj la stacion kaj forlasantan ĝin, eĉ mia ĝis tiam minimuma kredemo al iu feliĉa hazarda renkontiĝo vaporiĝis. Tamen mi eniris la stacion kaj ŝtuparveturis suben. Kiam mi venis al la perono, mi tuj ekvidis malproksime de mi super miloj

da kapoj la ridetantan kolegon svingantan sian manon al mi. Nu, jes, mi forgesis, ke ni du preskaŭ dumetraj personoj alte elstaros super la malgrandstaturaj koreoj kaj do senprobleme vidos nin reciproke.

Tute alian interesan travivaĵon mi havis en la linia aŭtobuso. Mi sciis la numeron de la aŭtobuso, ankaŭ sciis, kie elbusiĝi kaj survoje reen enbusiĝi, la loko de la haltejo estis bone trovebla, ĉar ĝi estis ĉe unu el la ĉefaj seulaj vidindaĵoj Namdaemun (Suda Pordego), do mi ne supozis, ke mi povus havi iujn problemojn kun revojaĝo.

Sed mi havis, ĉar la stacio estis en strato kun unudirekta trafiko. Kiam mi decidis reveni, mi notis, ke mi jes scias la numeron de la aŭtobuso, sed mi ne scias kiun direkton mi veturu! Do mi decidiĝis demandi la ŝoforon. Ja kvankam mi ne scipovas la korean, kun la senvorta komunikado mi jam havis spertojn. Post kiam alvenis la buso kun mia numero, mi duoneniris ĝin kaj surŝtupare demandis la ŝoforon *Gwangmyeong*? kaj klare montris per mano antaŭen kaj supozis, ke estas klare, ke mi demandas, ĉu estas la ĝusta direkto al Gwangmyeong. Sed el la vizaĝo de la ŝoforo mi vidis, ke li estas komplete embarasita kaj ne scias, kion mi deziras. En tiu momento mi rememoris, ke mi havas nomkarton de Puramo, do mi montris ĝin al li, sed stulte la flankon skribitan per la latina skribo, kiu klaris al mi. Li longe rigardis ĝin, sekve min, sed senvorte kaj sen iu helpema gesto. Mi do ekkomprenis mian eraron kaj turnis la nomkarton al la korea skribo kaj li tuj ridetis kaj diris *Gwangmyeong* kaj montris, ke mi eniru, ĉar li veturis la por mi ĝustan direkton. Mistero tamen por mi estis, ke mi aŭdis precize la samon, kion ankaŭ mi komence diris al li, do kial li ne komprenis? Kiam mi rakontis tion al Puramo, li diris al mi ridante, ke mia prononco estas tute falsa kaj ĝi eĉ povas havi alian signifon (mi forgesis kian). Tial mi ekkomprenis, ke kun miaj oreloj mi ne povus lerni la korean, kiam mi ne kapablas distingi inter la prononco de Gwangmyeong de la ŝoforo kaj Puramo disde tiu mia.

En Seula Esperanto-Kulturcentro. Mi jam menciis la Seulan Esperanto-Kulturcentron, kie mi renkontiĝis kun Barry. Kun la ĉefo de la centro LEE Jungkee mi konatiĝis jam en la jaro 1989 en la UK en Brighton kaj ekde tiam ni havis amikajn rilatojn. Mi sciis, ke li instruas Esperanton en sia centro al multaj grupoj kaj ke li estas tre aktiva en la Esperanto-movado, do estas klare, ke estante en Seulo mi vizitis ankaŭ lin.



LEE Jungkee en sia oficejo

Krom la interesa renkontiĝo tie kun Barry mi tie ankaŭ partoprenis la kurson por progresintoj, konatiĝis kun pluraj novaj koreaj esperantistoj kaj ankaŭ havis kun ili interesajn diskutojn. Kaj mi tuj menciu, ke Jungkee sekve multe helpis al mi, kiam mi organizis tien ekskursojn, ĉu al la UK en la jaro 1994, ĉu pli poste por la longdistancaj piedturistoj. Cetere, iu universitata studento de la ĉeĥa, kiu lernis tie Esperanton, proponis al mi, ke mi aŭ iu bona ĉeĥa esperantisto venu venontferie al Seulo por gvidi tie la ĉeĥan konversacian kurson por la studentoj (onidire kutima libervola dumferia ripetado) kaj vespere gvidu en la



Meze de la partoprenantoj de la konversacia kurso

Esperanto-Kulturcentro konversacian kurson de Esperanto. Kaj li ankaŭ aldonis, ke la studentoj kovros ĉiujn elspezojn kunligitajn kun la restado de la instruisto. Mi klarigis, ke pro la amaso da taskoj kunligitaj kun la komenca agado de mia privata firmao mi mem certe ne povos veni, sed ke mi informos ĉeĥajn spertajn esperantistojn kaj eble iun trovos. Tuj mi mesaĝis tion al mia edzino Stanjo, kaj sciante, ke ŝi volonte instruas la ĉeĥan al eksterlandanoj (i. a. ŝi verkis la manlibron *Baza ĉeĥa konversacio* kaj dum la UK en Prago gvidis la kurson *La ĉeĥa eksprese*) kaj do mi supozis, ke tio logos ŝin, mi en la sama fakso avertis ŝin, ke ŝi certe ne rekomendu sin mem, ĉar la kondiĉoj ĉi tie ne estas simplaj. Tion mi skribis ne pro tio, ke mi ne dezirus al ŝi la ekkonon de tiu bela urbo kaj lando, sed ĉar mi jam mem renkontis problemojn kun la komunikado kaj sciis, ke ŝi kun malsufiĉa scipovo de la angla havus eĉ pli grandajn problemojn ol mi. Tamen, ŝia senhezita respondo estis *Instrui tien veturos mi.* Kaj tiel ankaŭ okazis.

Utileco de la angla. Kiam mi jam menciis kiel malavantaĝon de Stanjo, ke ŝi ne bone regis la anglan, mi ankaŭ klarigu, kiel la angla povas utili en Koreio, malgraŭ tio, ke komprenas ĝin preskaŭ neniu, al kiu vi turniĝas. Kaj tamen ĝi utilas! La tipa situacio aspektas jene: se oni bezonas iun informon aŭ helpon, oni turnu sin al ajna persono kaj alparolu lin aŭ ŝin angle, sed gravas, ke sufiĉe laŭte, por ke ankaŭ la homoj en la ĉirkaŭaĵo ekaŭdu tion kaj almenaŭ ekkomprenu, ke la strebo komuniki estas en la angla. La alparolito kun la probablo 99 % montros al vi per gestoj nekomprenon. Tamen, kun la probablo certe pli alta ol 50 % alpaŝos al vi iu junul(in)o el la ĉirkaŭaĵo kaj alparolos vin angle, ĉu vi bezonas helpon, ke li aŭ ŝi estas je dispono. Nu, ĉar laŭ mia pritakso la probablo, ke iu tia afablulo estas proksime, estas pli ol 50 %, klaras, ke se vi ne sukcesos kaj ripetos tion post ioma tempo, preskaŭ certe jam iu helpemulo ekaperos. Eblas do resumi, ke koreoj ĝenerale parolas nur la korean lingvon, sed iu el tiuj malmultaj edukitaj junuloj, kiuj la anglan scipovas, mirakle de ie ekaperos kaj volonte mem aliĝos kaj proponos helpon. Kiam mi en similaj situacioj kun ili iom babilis, mi eksciis, ke ili estas feliĉaj povante praktiki la lernatan anglan ankaŭ kun iu alia ol kun sia instruisto.

La angla kaj la soldatservo. Se mi jam skribas pri la angla, mi en tiu kunteksto menciu alian sperton, kiun mi ekhavis lige al la Korea Dutaga



Mi volonte eksidis al la libera loko apud soldatino

Marŝo, parto de IML, pri kiu mi skribos pli poste. Ĝin partoprenis ankaŭ kelkaj grupoj de soldatoj. Kiam mi vidis unu grupon en la tribuno sekvi la akompanan programon kaj apud ĉarma soldatino liberan spacon, mi demandis, ĉu la loko liberas, eksidis apud ŝin kaj komencis kun ŝi konversacii.

Ŝajnis al mi, ke ŝi ne tre volonte respondas miajn demandojn kaj mi eksupozis, ke la kialo estas la najbareco de ŝiaj kolegoj. Mi do invitis ŝin al la proksima glaciaĵejo, kion ŝi volonte akceptis, kaj efektive, tie ŝi sen apudaj oreloj de la kolegoj parolis multe pli libere. Min interesis precipe, kial ŝi aliĝis al la armeo. Ŝi klarigis al mi, ke junulinoj kutime aliĝas al la armeo pro du kialoj. Ili ricevas perfektan konon de la angla, kiun oni en la universitato neniam povus atingi, kaj krome ili ekhavas aliajn fakajn scipovojn, kiujn oni povas bone uzi en la sekva civila vivo. Mi demandis plu, ĉu por junuloj la soldatservo estas deviga kaj kiel mi supozis, ĝi estas, por proksimume unu jaro kaj duono. Tamen, multaj junuloj ĝin libervole plilongigas kun bonŝanco servi komune kun usonaj soldatoj pro la samaj kialoj, kiel ankaŭ ŝi soldatiĝis. Nu, la glaciaĵumado ne daŭris longe kaj mi eksentis, ke ŝi jam emas reveni al siaj kolegoj, do ni adiaŭis nin kaj mi ne plu akompanis ŝin.

Korea Dutaga Marŝo. Kvankam ĝi ne havas en la nomo la terminon festivalo, ĝi estas vere grava festivalo por ŝatantoj de longdistancaj piedturistoj. Verdire, kvankam por mi tiuspeca amasa turismado de dekmiloj da promenantoj ne estas tiel alloga kiel piedekskursoj en pli malgrandaj grupoj, mi trovis pozitivaĵojn ankaŭ en ĝi.

La propra itinero gvidis tra belega regiono de nacia parko najbare de la urbo Wuhan kaj ni povis survoje vidi ne nur belan pejzaĝon, sed ankaŭ tre interesajn arkitekturaĵojn, ĉu religiajn, ĉu civilajn.

Kvankam por kolekti punktojn de IML la plej mallonga itinero estas 20 km, ekzistas ankaŭ porinfanaj itineroj 10 kaj 5 km, do oni povis vidi ne nur familiojn kun infanoj, sed eĉ personojn surdorse portantajn bebojn. Estis entute kelkdek mil partoprenantoj, tamen ne estis ĥaoso tiel granda, kiel oni supozus, ĉar ĉiu kategorio havis apartan starton, do tiuj, kiuj planis iri 50 km startis jam je la 6a, kaj ĉiam post unu horo tiuj, kiuj aliĝis al 30, 20, 10, kaj finfine por 5 km je la 10a horo.

Kvankam mi vidis dum miaj vojaĝoj plurfoje rizajn kampojn, la unuan fojon mi vidis ilin tiel komplekse, ke en iuj ĝuste okazis rikolto, do parto ankoraŭ restis nerikoltita, parto jes, sed apude ankaŭ aliajn kampojn, jam post la rikolto. Kion mi vidis la unuan fojon, tio estis maniero sekigi rizajn grajnojn surŝosee.

Dum la propra marŝo oni kutimis pormomente kuniĝi kun nekonataj personoj babilante, kaj precipe ni „ekzotuloj" estis ofte dumvoje alparolataj. El tiuj hazardaj dumpromenaj renkontiĝoj mi havas minimume du rememorojn, kiuj eble valoras mencion. Alparolis min iu knabino, eble inter 12 kaj 15 jaroj, kaj kiel preskaŭ ĉiuj, demandis, de kiu lando mi estas, ktp. Ĝis venis la demando, kiel aĝa mi estas. Mi respondis, ke 60, sed tiumomente ŝi rigardis min kvazaŭ iun monstron el alia galaksio, elbuŝigis iun strangan sonon kaj rapide min forlasis. Mi ne miras, ke ili ne kapablas diveni la aĝon de eŭropanoj, ja ankaŭ mi ne kuraĝus diveni la aĝon de ili, sed ĉu ŝin terurigis, ke ŝi apudmarŝas kun tiu nekredebla maljunulo aŭ io alia, tion mi ne plu ekscios.

Alia renkontiĝo estis iom pli amuza kaj eĉ por mi instrua. Mi apudiĝis al iu sola virino, miasupoze koreino, sed kiel mi poste eksciis, japana muzikinstruistino. En kutima interŝanĝo de la informoj ŝi ne komprenis, de kiu lando mi estas, kaj demandis, kie estas tiu por ŝi nekonata lando Ĉeĥio aŭ Ĉeĥa Respubliko. Sed kiam mi diris *Praha* ŝi tuj reagis *Ho jes, Ĉeĥoslovakio*,



La itinero de IML gvidis eĉ tra monaĥejo…



… kaj tra bela pejzaĝo preter interesaj homaj kreaĵoj



La marŝon partoprenis ankaŭ infanoj



Oni trairis ankaŭ rizajn kampojn



La rizsekigo limigas surŝosean trafikon

kaj komencis al mi mallaŭte kanti arion de la simfonia poemo Vultava de Bedřich Smetana. Mi estis ĝojigita, ke mi renkontis tiel for de mia lando iun, kiu tiel bone konas verkon de la ĉeĥa komponisto, kaj tuj diris *Vultava* por montri, ke mi rekonis ĝin. Sed ŝi rigardis min kun ioma malestimo en la vizaĝo kaj diris *Ne, Moldau*. Mi strebis klarigi al ŝi, ke la originala nomo de la verko estas Vultava, kio estas la ĉeĥa nomo de la rivero trafluanta Pragon, kaj Moldau estas la nomo de la sama rivero, sed en la germana lingvo. Ĉu ŝi kredis al mi aŭ ne, mi ne scias. Sed dum tiu dialogo mi ekkomprenis, ke la ĉeĥaj klasikaj komponaĵoj kaj verŝajne ankaŭ aliaj kulturaĵoj disvastiĝis en la mondon ne rekte, sed pere de la germana, do tial oni konas ilin ne sub la originalaj, sed sub la germanaj titoloj.



Gvidantino de matena gimnastikado

Akompana programo de IML. Same agrabla kiel la propra turismumado tra la bela naturo estis la akompana programo, plena de diversaj amuzaj programeroj, muziko de ĉiuj specoj, prezentaĵoj de diversaj baletoj kaj dancoj. Ĉio ĉi okazis en la granda stadiono, kie okazis kaj startoj kaj celoj de la marŝoj, kaj en ĝia proksima ĉirkaŭaĵo. Cetere, ĉiumatene oni povis gimnastiki (kaj multaj vere gimnastikis) sub la gvido de ĉarmaj junulinoj. Tiu gvidata matena gimnastikado kelkfoje ripetiĝis, por ke ĝin povu partopreni kaj tiuj, kiuj ekstartis frumatene al la plej longa itinero, sed ankaŭ tiuj, kiuj elektis pli mallongan, do venis al la stadiono pli malfrue.

Ne mankis ankaŭ programeroj edukaj, ĉefe rilatantaj al historio, inkluzive de granda ekspozicio pri la Korea Milito. Krom informtabuloj kun multaj fotoj kaj klarigaj tekstoj estis ekspoziciataj ankaŭ armiloj uzitaj dum la Korea Milito, inkluzive de pezaj armiloj kiel tankoj, kiuj estis en la fokuso ĉefe de infanoj.



Ekspozicio pri la Korea Milito



Infanojn plej interesis la milit-tekniko



Monumento de la falintaj nederlandaj soldatoj



Metado de floroj

Krome okazis ankaŭ memoriga programo kun metado de floroj ĉe la proksima monumento omaĝe al la rememoro de la falintaj nederlandaj soldatoj, kiuj batalis en la Korea Milito en la trupoj de Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ mi metis al ĝi florbukedon nome de la grupo de la ĉeĥaj partoprenantoj, sed mi ne plu rememoras, ĉu eblis aĉeti ĝin survoje, aŭ ĉu mi eĉ ricevis ĝin por tiu celo de la organizantoj.

Neatendita intervjuo. Dum nia unua partopreno de la korea marŝo nia grupo estis en la centro de la intereso pro du kialoj: Ĉeĥio estis la unua postkomunisma lando, kiu estis akceptita al IML kaj due, kvankam por la plejparto ni plu estis el Ĉeĥoslovakio, la organizantoj konsciis pri ĝia paca disiĝo al du memstaraj landoj. Tio trafis ankaŭ min persone, kiam alpaŝis al mi iu juna virino, ĉu mi pretas al ŝi respondi kelkajn demandojn. Mi volonte jesis, sed en tiu momento aperis pliaj du personoj kun kamerao kaj mikrofono, kion sekvis sufiĉe longa intervjuo.

Mi devas konfesi, ke mia angla sufiĉas por senprobleme priparoli, kion mi bezonas, kaj dum la diversaj neformalaj dialogoj aŭ eĉ formalaj trakta-



Intervjuo por la Korea televido

doj en mia fako mi ne havas problemojn, sed ĝi certe ne havas sufiĉan nivelon por iuj oficialaĵoj kiel intervjuo pri plejparte politikaj temoj, pri kiuj mi ne kutimas paroli en fremdaj lingvoj, do mian vortprovizon mi sentis nesufiĉa. Tamen, mi jam ne povis fuĝi kaj la intervjuo eĉ interesis min, ĉar mi ankaŭ eksciis pri multaj imagoj de la korea redaktorino, iam iom strangaj, pri la situacio en meza Eŭropo kaj precipe en mia malgranda Patrujo. La temoj estis multaj: la vivo dum la regado de komunistoj, la mirakla sensanga ŝanĝo de la politika sistemo kaj eĉ paca disdivido de Ĉeĥoslovakio, la prezidento Havel, liaj verkoj kaj politika agado, sed ankaŭ nia kulturo, ekonomio inkluzive de la privatigo de ŝtataj entreprenoj, eduksistemo, ktp. Mi tute ne sciis, ke temas pri la redakta stabo de tutlanda korea televidstacio, ĝis mi eksciis la sekvantan tagon de iu koreo, ke li vidis min en la televido kaj ke la intervjuo kun mi daŭris preskaŭ duonhoron! Nu, mi bedaŭras, ke mi ne vidis tion kaj ne aŭdis, kiel mi sonas dublita en la korean.



En la rolo de la ĉefo de gardsoldatoj

En la rolo de soldatreganto. Dum iu promeno kun la grupo de marŝemuloj en la centro de Seulo mi havis unuflanke la seulan urbodomon, aliflanke verŝajne la plej faman kaj belan palacon Deogsugung. Mi ion rakontis al la grupo, unue pri la urbodomo, poste pri la palaco, kiun mi planis kun ili viziti, kaj post la sekve priskribita aventuro vizitis. Multaj homoj intertempe amasiĝis antaŭ la pordego al la palaco.

Subite venis al mi iom feste vestita virino kaj diris al mi per gestoj, ke mi akompanu ŝin. Mi ektimis supozante, ke oni ne avertis min, se en Seulo ankaŭ estas malpermeso ĉiĉeroni krom licenciitaj ĉiĉeronoj kiel ekzemple en Parizo aŭ Vieno, kaj jam mi prepariĝis al tio, ke mi verŝajne pagos iun punon. Sed kiam ni envenis malantaŭ la pordegon, ŝi donis al mi festan vestaĵon kun ĉapo kaj montris, ke mi vestu min en ĝin kaj per proksimume dek anglaj vortoj kaj multe da gestoj ŝi klarigis al mi, ke mi kunludu en io. Kiel mi nur sekve ekkomprenis, mia devo estis per tamburo regi la festan ŝanĝon de iuj soldatgrupoj. Mi strebis klarigi, ke mi ja ne scias, kiam mi



Antaŭ la enirejo en la palacon Deoksugung



Urbodomo de Seulo



Ene de Deoksugung

batu la tamburon, sed ŝi klarigis, ke mi nur rigardu ŝian manon. Kiam ŝi levos unu fingron, mi batu unufoje, se du fingrojn, do dufoje. Kaj tiel okazis, kaj do du trupoj da soldatoj marŝis kaj turnis sin obeeme laŭ miaj ordonoj.

Post kiam mi redonis la vestaĵon, ricevis iun memoraĵon por mia servo kaj revenis al la grupo, mi sentis fieron, ke mi aspektas vere elegante, se ŝi elektis ĝuste min. Sed ho ve! Kiam mi rakontis tion al miaj koreaj amikoj, ili ridis, ke la kialo estis tute alia; ke mi probable estis la plej alta persono en la ĉirkaŭaĵo kaj tio fascinas koreojn, do certe tial ŝi elektis min. Nu bone, do ne pro beleco aŭ eleganteco, sed pro la alto! Tio tamen ne deprenas de mi tre bonan rememoron, kiel mi sekvis la virinon kun la timo pro verŝajna puno kaj anstataŭ tio mi fariĝis por momento ĉefo de koreaj soldatoj.

Ankoraŭ al la urbodomo. Kiel vi povas vidi sur la bildo, antaŭ ĝi estis plenplena parkumejo. Sed tio ne plu estas. Nun estas antaŭ la urbodomo agrabla parko kaj la aŭtoj malaperis en subteran parkumdomon. Kaj tiuspecajn ŝanĝojn al pli agrabla vivo en la urbego mi renkontis dum la jaroj, kiam mi vizitadis Koreion, multajn.



Kvazaŭ filma stelo

Infanoj. Ĝenerale ĉe infanoj estas tre simpatia la trajto, kiel ili estas direktaj kaj neformalaj. Mi jam menciis, ke mi estas longstatura, kio kaŭzis, ke inter mallongstaturaj koreoj mi aspektis kvazaŭ monstro. Kaj tion mi plej bone ekkomprenis el la vizaĝoj de infanoj.

Okazis al mi en iu librovendejo, kie mi trarigardis iun bildlibron, kiam mi rimarkis, ke subite kontraŭ mi ŝtoniĝis malgranda knabo, rigardis min kun malfermita buŝo kaj komplete neglektis admonojn de sia panjo, kvankam li rigardante min ankaŭ surdiĝus. La patrino tiris lin malantaŭ bretaron, por ke ni ne plu vidu unu la alian, sed mi ankoraŭ longe ne povis forgesi lian surprizegitan vizaĝon, post kiam li ekvidis min.

Alian travivaĵon mi havis en la subĉiela muzeo. Kiam grupo de ekskursantaj infanoj rimarkis min, ili ĉirkaŭis min, kaj per gestoj petis miajn subskribojn. Nu, kion oni ne faru por plezurigi infanojn, des pli kiam mi povis por momento konsideri min mondfama filmstelulo!

Parolante pri infanoj mi devas mencii ankaŭ ilian kutimon paŭzi ene de ekskurso. Tion mi renkontis plurfoje, do ne temas nur pri iu troigita disciplino de unu grupo havanta tre severan instruiston aŭ gvidanton. Kiam la



Pikniko de lernejanoj



Punbenko estis por la infanoj tre alloga

infanoj ekhavis paŭzon en sia programo, ili ĉiuj elprenis el siaj dorsosakoj kovrilojn, surmetis ilin sur la herbejon, antaŭ ol eksidi sur ilin demetis ŝuojn kaj metis ilin apude, nur poste demetis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj komencis manĝi kaj dume babili. Mi pripensis, kiel oni kondutas, se pluvas aŭ la herbejo estas malseka, sed tio somere verŝajne okazadas tre malofte en Koreio.

Certe ne estas surprize, ke inter la eksponaĵoj en la menciita subĉiela muzeo plej allogis infanojn punbenko kaj ĉiu volis esti malhonorata en ĝi kaj batata, aŭ male bati alian „krimulon". Volonta punbatonto estis ankaŭ ilia instruisto. Ĉu li ankaŭ kuŝigis sin sur la pilorion por lasi sin malhonorigi de siaj lernantoj, mi ne vidis, sed mi dubas pri tio.

Iom pri la religioj. Kiel mi jam menciis, en Koreio (male ol en Ĉinio kaj Japanio) konfuceismo estas konsiderata religio, sed bedaŭrinde dum miaj restadoj mi ne venis en kontakton kun ĝi.

La unua religia instanco, kiun mi vizitis, estis klasika budhisma templo en Seulo. Kiam mi demetis la ŝuojn en la antaŭĉambro, mi iom hezitis, kien meti ilin. Ja mi bone sciis, ke neniu povus erare preni miajn anstataŭ siajn, ĉar certe neniu koreo posedas ŝuograndecon 47! Tamen mi iom timetis, ĉu iu prenus eble nur unu kiel nekredeblan unikaĵon, por povi montri al amikoj, kiel granda ŝuo povas ekzisti. Tiukaze mi estus en senrezulta situacio, ĉar la ŝuoj de mia grandeco certe en Koreio ne estas vendataj. Kvankam estis klare, ke la probablo, ke mi ne retrovus miajn ŝuojn, proksimiĝas al nulo, mi metis ilin en la plej altan breton tiel, ke ne estu tuj rimarkebla ilia grandeco.

En la templo mem mi iom rigardis la preĝantajn personojn kaj kiam mi vidis, ke neniu ŝajnas senti sin ĝenata de mi, eĉ kiam mi deprenis fotilon, mi eĉ kuraĝis fari kelkajn fotojn. Mi observis, ĉu mi ekvidos iun monaĥon aŭ spiritan gvidanton por povi kun li iom konversacii, sed bedaŭrinde aperis neniu, nur simplaj preĝemuloj (preskaŭ senescepte inaj). Do mi foriris kun la intenco iam reveni, sed tio ne plu okazis.

La duan religion, kun kiu mi jam havis multe pli da ŝancoj konatiĝi pli proksime, estas ŭonbulismo (wonbulgyo), bazita precipe sur budhismo. Ĝi estas relative nova religio fondita en 1916 en Koreio. Mi estis bonŝanca, ĉar dum iu mia restado en Koreio (sen grupo) okazis kongreso de Korea Esperanto-Asocio ĝuste en Iksan, kie situas la ĉefsidejo de ŭonbulismo,



Antaŭ ol eniri la budhisman templon



En budhisma templo



Enveturo en la centron de ŭonbulismo



Diagramo de la doktrino de ŭonbulismo

sed ankaŭ la universitato Wonkwang apartenanta al la ŭonbulisma religio. Ni veturis tien peraŭte kun Puramo kaj Taesok kaj krom la tre interesa programo de la kongreso mi povis konatiĝi ankaŭ iom pli proksime kun la instruo de ŭonbulismo kaj eĉ kun ĝiaj spiritaj gvidantoj, inkluzive de la ĉefmajstro (religia estro) Jwasan.

La simbolo de ŭonbulismo estas unu cirklo kaj la ĉefa slogano *Jam progresas materio, ni disvolvu la spiriton.* Same kiel la ceteraj religioj, ankaŭ la instruo de ŭonbulismo postulas de la kredantoj detenon de multaj agoj. Sed ekzemple kompare kun la kristanisma dekalogo ĝi ŝajnas al mi pli sincera, kion mi



Baza instruo de ŭonbulismo ankaŭ en la ĉeĥa

montru je unu ekzemplo: en dekalogo estas unusence ordonite *Ne mortigu!*, tamen en la nomo de Dio oni multfoje mortigis malamikojn en militoj (sed ne nur) kaj pastroj benas novajn armilojn, ke ili estu efikaj mortigiloj. Similan ordonon havas ankaŭ ŭonbulisma kredo, tamen ĝi sonas *Ne mortigu, se vi ne havas gravegan kialon!* Do ĝi jam antaŭvidas, ke povas ekzisti situacioj, kiam oni povas iun mortigi, ĉu en sindefendo, ĉu …

Iom da imago pri la doktrino de tiu religio oni povas ekhavi rigardante la diagramon.

Cetere, mia akompananto kaj tiutempe jam amiko Taesok tradukis la *Fundamentan Instruon de Ŭonbulismo* en Esperanton kaj de lia traduko ĝi jam estis plu tradukita en plurajn lingvojn kaj aperis libroforme, ĉiam dulingve en la korea kaj la cellingvo. Kaj mi estis demandata, ĉu mi, ĉeĥa eldonisto, pretas ĝin eldoni ankaŭ same dulingve en la korea kaj la ĉeĥa kaj eĉ la respondeculo de la internacia fako de la ŭonbulisma ĉefsidejo ofertis la eldonon finance subteni, se mi certan parton senpage disponigos al bibliotekoj. Ni faris kontrakton, la tekston tradukis Karel Kraft, la libro aperis kaj ĝi ankoraŭ estas je dispono.

La trian religion, kun kiu mi iom konatiĝis, kvankam nur nerekte, estas kristanismo. Kiel mi jam menciis, ĝi estas vere disvastiĝinta el la koncernaj tri landoj nur en Koreio kaj la nombro eĉ superas tiujn de budhismo. Pli konkrete mi trovis, ke budhistoj estas 22 %, kristanoj 28 % (de tio 21 % da protestantoj, 7 % da katolikoj) kaj duono de koreoj deklaras sin nekredantoj. Plejparto de koreaj kristanoj estas presbiterianoj, al kiuj apartenas ankaŭ la familio de Puramo.

Dimanĉe matene la edzino de Puramo foriris al la diservo kaj ŝi revenis nur posttagmeze. Min interesis, ĉu la diservo estas tiel longa, aŭ ĉu ŝi havis



Universitato Seokyong

ankaŭ alian celon dumvoje. Nu, ŝi kiel membro de la preĝeja ĥoruso havis tiudimanĉe ankaŭ kantekzercon por la venontsemajna diservo. Sed, eĉ se tiu ne okazus, kiel mi eksciis, la kristanoj kutime ne partoprenas dimanĉe nur la propran diservon kaj restas tie por komunaj bibliaj studoj, sed ankaŭ por komune manĝi kaj ĝui la amikan socion de kunkredantoj.

Prelego en la universitato Seokyong. Unu el miaj koreaj amikoj, profesoro pri ekonomiko SO Gilsu, kiu gastis ĉe mi kaj lian Esperantan prelegon en la Ekonomika Universitato en Prago pri la ekonomiaj sukcesoj de Koreio, unu el tiel nomataj „aziaj tigroj", mi alterne kun Zdeněk Pluhař interpretis en la ĉeĥan. Li invitis min reciproke prelegi en universitato en Seulo. Tio efektiviĝis en la universitato Seokyong, en kiu li instruis, kaj la temo estis *Velura revolucio en Ĉeĥoslovakio kaj paca disiĝo al du landoj*.

Al la prelego min akompanis Taesok kaj jam la vojo estis interesa. Ni veturis per metroo al la plej proksima stacio al la universitato kaj de tie per taksio. Veturigis nin simpatia taksiŝoforino, bone reganta la anglan kaj simpatie konversacianta. Mi sidis apud ŝi kaj Taesok malantaŭe. Kiam mi

devis pagi, ŝi diris al mi precize duoblan sumon ol kiu estis montrita sur la ekrano de la taksimetro. Mi demandis ŝin, kial mi ne pagu la sumon montratan kaj ŝi respondis, ke ĵus estis duobligitaj la tarifoj kaj ke ŝi ankoraŭ ne havas la taksimetron ĝustigitan.

En tiu momento enmiksiĝis Taesok kaj komencis konversacii kun ŝi kaj la konversacio baldaŭ transformiĝis al disputo, post kiu mi pagis precize tiom, kiom montris la ekrano. Ĉar ili parolis koree, mi komprenis nenion, do nur ekster la taksio mi demandis lin pri kio temis. Li diris al mi, ke temis pri trompulino, ĉar se vere okazus tiom abrupta prezaltiĝo certe pri tio li scius de televido, ĵurnaloj aŭ simile, do li admonis ŝin, ke ŝi ne faru tian malbonan reputacion al koreoj kaj ne ŝtelu. Kaj ŝi strebis silentigi lin per la vortoj *Vi ne enmiksiĝu, tiuj usonanoj havas sufiĉe da mono*. Poste li ankoraŭ strebis konvinki ŝin, ke ne ĉiuj okcidentanoj estas riĉaj usonanoj kaj ke mi estas el Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥion neniu konis), kaj ke la vivonivelo en mia lando estas simila kiel en Koreio, ĝis ŝi jam senvorte fingromontris al mi la ekranon kaj mi pagis la ĝustan sumon. Mi do devis ridi, ke (ne la unuan fojon) mi fariĝis *riĉa usonano*.

Kiam ni eniris la universitaton, ĉie en la koridoroj estis diskutantaj grupoj de studentoj kaj ni eksciis, ke ĝuste hodiaŭ okazas studenta striko. Oni informis min, ke la striko estas direktita kontraŭ la fondinto de tiu privata universitato, kiu maljuste administracias ĝin. Tial mi timis, ke verŝajne ne okazos mia eblo konatiĝi kun koreaj studentoj per prelego kaj sekva diskuto. Tiumomente jam aperis So Gilsu, bonvenigis nin kaj invitis nin eniri. Mi demandis, ĉu la prelego tamen okazos, malgraŭ la striko – kaj li respondis, ke kompreneble, ĉar liaj studentoj neniam strikas.

La atentemo de la studentoj kaj la vigla diskuto superis miajn atendojn. Estis evidente, ke ili estis bone preparitaj de sia profesoro kaj sciis multon kaj pri la ŝanĝo de nia politika kaj ekonomia sistemoj, kaj pri la disiĝo de Ĉeĥoslovakio. Mi parolis en Esperanto kaj ilia profesoro So interpretis tion en la korean kaj male, kio certe fluis pli glate, ol se ni estus diskutantaj en la angla. Kaj en la diskuto ili interesiĝis ne nur pri la ĉeĥaj realaĵoj, sed ankaŭ pri nia komunikilo, la internacia lingvo Esperanto. Kian intereson ili havis, tion montras, ke la prelego estis planita por unu horo, sed ni adiaŭiĝis nur post pli ol du horoj.

Mi aldonu, ke tre plaĉis al mi la sidlokoj por studentoj, ĉar ĉiu sidis sola kaj havis sian relativan privatecon. Tamen, kiam mi provis eksidi en ĝin



La studenta loko por mi iom malgrandas



Profesoro SO Gilsu (dekstre) neformale

(la seĝo firme kunigita kun la tablo) mi konstatis, ke ĝi vere ne taŭgas por homoj de mia alteco. Ne nur ke daŭris iom da tempo ĝis mi sukcesis iel faldiĝi en la sidlokon, sed mi ne kapablas imagi, ke mi devus tie daŭre sidi kaj aktive partopreni la instruhoron.



Prelego de LEE Chong Yeong en la ĉeĥa

Formulo de profesoro LEE Chong-Yeong. Kun la konata korea fakulo en la branĉo de merkatiko, profesoro instruinta en la fakultato de komerco kaj ekonomiko de la seula universitato Kyungpook (forpasinta en la jaro 2008) mi renkontiĝis persone en Koreio nur unufoje okaze de la kongreso de Korea Esperanto-Asocio, kies prezidanto li estis tiutempe; sed ni konis nin bone kiel kolegoj ene de la UEA-komitato. En iu UK mi aŭskultis lian prelegon kun la nomo *Formulo de ekonomia sukceso* kun la subtitolo *Dudeka sperto el Azio* pri ekonomia miraklo de kelkaj tiel nomataj aziaj tigroj (Tchai-wan, Suda Koreio, Honkongo, Singapuro, sed por mi surprize li envicigis inter ilin ankaŭ Ĉinion). Lia prelego tiel forte kaptis mian intereson, ke mi petis lin pri la kopirajto eldoni ĝin en la ĉeĥa traduko. Li konsentis, mi ĝin tradukis kaj eldonis libretforme.

Lian rigardon al la mirakla ekonomia supreniro de la nomitaj landoj eblas resumi en la formulon Ekonomia sukceso = diligenta laboro + grandaj ŝparoj + malaltaj impostoj + minimumaj intervenoj de la ŝtato. Tio estas kompreneble tre simpligita. En sekva analizo li montris, ke la procezo havas ankaŭ siajn kaŝitajn problemojn, pri kiuj oni ne rajtas forgesi.

Estas interese, ke kiam ni intrepretis post kelkaj jaroj en Prago la prelegon de prof. So Gilsu je la sama temo, kio estas menciita antaŭe, tiu kun la menciita formulo de prof. Lee multtrajte kongruis, tamen li vidis kiel unu el gravaj parametroj ankaŭ unu nacion, per kio li celis ankaŭ neniujn aliajn kvotojn (sekso, minoritatoj, ktp.), do por postenoj konsideri nur naturan



Folkloristino SEOK Ju-seon

elekton de elitoj (politikaj, ekonomiaj, manaĝeraj, sciencaj), do nur la kvalifikojn de kandidatoj. Estis interese ankaŭ kompari la analizojn de ambaŭ profesoroj agantaj en diversaj universitatoj. Krom la parametro unu nacio ili preskaŭ en ĉio akordiĝis.

Ĉe folkloristino d-ino **SEOK Ju-seon**. Ŝi estas elstara klerulino pri tradicia korea folkloro precipe pri tradiciaj vestoj, kaj pentristino. Ŝi eldonis plurajn fakajn librojn, kiujn ŝi mem bele ilustris. Mi havis okazon konatiĝi kun ŝi danke al Jungkee. Ŝia frato D. M. Seok estis fame konata esploristo de papilioj kaj esperantisto. Ni renkontiĝis en la Memormuzeo Seok Juseon fondita jam en la jaro 1981 ene de la Universitato Dankook. La renkontiĝo kaj parolado kun tiu nobla, modesta kaj tre saĝa damo lasis ĉe mi neforgeseblan impreson.

Komercado. Mi mencios eĉ tian kutiman agadon, kiel estas simpla vendado kaj aĉetado, ĉar ankaŭ en ĝi mi trovis iujn por mi nekutimaĵojn. Mi ne skribos pri grandaj vendejoj en ĉefaj stratoj, ĉar tiuj aspektas same kiel ĉie en la mondo. Min tre logis ĉarmaj mallarĝaj stratoj, plenaj de mal-



Tipa strateto en Seulo

grandaj vendejoj, inter ili ankaŭ iuj pli grandaj. Min tre mirigis, ke restis apenaŭ spaco, por ke traveturu aŭto, do en la plejparto de la landoj temus pri piedira zono aŭ almenaŭ unudirekta strato, sed ne en Seulo. En tiuj mallarĝaj stratetoj plenaj de varo ankaŭ ekstere, aŭtoj trafikis, kvankam ne ofte, tamen ambaŭdirekte kaj mi ne komprenis, kiel ili kapablis iel sukcesi sen kolizii, kaze ke du veturis kontraŭ si.

Alimaniere min impresis du grandaj merkatoj, la fiŝmerkato kaj la plej granda seula merkato nomata laŭ la jam menciita proksima pordego Namdaemun. Kiam mi vizitis la fiŝmerkaton, mi konstatis, ke ĝi estas preskaŭ certe la plej granda, kiun mi iam vidis, kaj krome ankaŭ la varieco de la ofertataj fiŝoj kaj aliaj maraĵoj estis por mi neimageblaj. Krom la varo por vendi kaj forporti estas tie ankaŭ multaj ofertoj de fiŝmanĝaĵoj por surloka konsumado. Nu, min logis gustumi iujn nekutimaĵojn por mi, sed mi devas konfesi, ke la odoro de krudaj fiŝaĵoj estis por mi malagrabla. Tial mi ne nur ne gustumis iujn bonaspektantajn bongustaĵojn, sed eĉ ne restis longe en la fiŝmerkato, kvankam mi trovis ĝin ege interesa.

Same la merkato Nandaemun apartenas al la plej grandaj, kiujn mi ĝis tiam vizitis. Do kvankam mi ne planis ion aĉeti, mi vagadis en ĝi tien kaj



Kutima vespera trolumigo

reen kaj kun intereso observis la dialogojn inter aĉetantoj kaj vendistoj, kvankam mi nenion komprenis. Kaj mi admiris la por mi nekomprenebLan realaĵon, ke mi vidis tie multajn giĉetojn, kiuj ofertis preskaŭ precize la samon kaj klientoj mankis. Nu, verŝajne tamen ili devis iom profiti, alimaniere ili tie ne estus. Bedaŭrinde, mi vagadis tra tiu mertkato nur dumtage ne sciante, ke multe pli interesa ĝi estas nokte.

Iun vesperon, kiam ni sidis kaj babilis kun Puramo kaj lia edzino, ŝi proksimume noktomeze adiaŭiĝis kaj foriris, kio min ne surprizis. Certe pro la fakto, ke ŝi ne povis kunbabili pro lingvaj malhelpoj kaj devis ĉiam atendi la tradukon, tio por ŝi ne estis tre amuza. Sed mi ekmiris nur kiam Puramo klarigis al mi, ke ŝi iras butikumi en la merkatejon. Mi mirege demandis *Nun, noktomeze?* Kaj nur poste mi eksciis, ke post noktomezo oni en difinitaj tagoj senteble malaltigas la prezojn, kio logas multajn aĉetantojn, precipe virinojn. Kiam mi demandis, ĉu Namsook havas iun konkretan planon, kion ŝi deziras aĉeti, li respondis, ke precize li ne scias, sed preskaŭ certe ne. Sed malgraŭ tio, ĉiam kiam ŝi vizitas la noktan merkaton, ŝi ion kunportas kun la bona sento, ke ŝi ŝparis, eĉ kiam ŝi aĉetis ion, kion



Apudstrataj vendistinoj de legomoj

ŝi ne bezonis. Nu, tio ne mirigis min, ĉar tio estas verŝajne komuna eco de virinoj en multaj landoj.

Ankaŭ aliajn por mi nekutimajn komercistinojn mi vidis, nome virinojn sidantajn sur la trotuaro surtere, sub si havante nur iun tapiŝeton, kaj vendantajn plejparte legomojn kaj fruktojn. Estis interese, ke se iu haltis ĉe ili kaj volis ion aĉeti, ili ne ekstaris por povi komforte paroli kun la aĉetonto, sed male, tiu devis aŭ kliniĝi al ili, aŭ, pli ofte, eksidi kaŭre al siaj kalkanoj. En tiu por mi tiom stranga pozicio oni faris sian komercon kaj nur poste la aĉetinto ekstaris kaj foriris.

Skribante pri la surstrata komercado mi devas mencii ankaŭ enigmon, kiun mi longe ne komprenis, nome kiam mi vidis longan vicon de giĉetoj kun tabletoj kaj seĝoj por la gastoj, ofertantaj manĝojn laŭŝajne tre similajn se ne la samajn, sed ĉe ili neniujn klientojn. Mi vidis tion ripete ekzemple apud la metroostacio ĉe la limo inter Seulo kaj Gwangmyeong, ĝuste tie, kie mi havis renkontiĝon kun Barry. *Kiamaniere ili povas vivteni sin, se ili vane atendas aĉetontojn?* mi cerbumis. Tamen la enigmo malsekretiĝis, kiam mi preteriris iam post la tagmezo. Mi rimarkis, ke subite ekape-



Giĉetoj kun manĝaĵoj

ris amasego da homoj kvazaŭ ili falus el la ĉielo, ili rapide ekokupis ĉiujn giĉetojn, pluraj nesufiĉe rapidaj devis atendi, kelkaj forportis sian aĉetitan manĝon, iuj eksidis kaj konsumis ĝin surloke, sed post iom da tempo la spaco apud la giĉetoj estis denove malplenaj. Nu, ŝajnas ke manĝopaŭzoj en proksimaj oficejoj aŭ produktejoj sufiĉas por vivteni la multajn surstratajn manĝaĵvendistojn.

Strateto de drinkado kaj amo. Se mi bone rememoras, sufiĉe proksime de la kliniko de Puramo mi hazarde eniris strateton, kien oni eniras celante drinkadon kaj fizikan amon. Ĉe ĉiu fenestro atendis iu ridetanta junulino, kiu logis preterirantajn virojn eniri kaj ĝui drinkadon, sed ankaŭ ŝian amoarton. Mi vagadis malrapide de unu fenestro al la alia, ĝis mi trovis sufiĉe da kuraĝo kaj kun unu ĉarma junulino, kiu alparolis min angle, mi komencis iom konversacii. Mirakle, ŝi parolis la anglan bone (mi supozis, ke tiuspecan metion entreprenas kutime needukitaj knabinoj) do ni interŝanĝis kelkajn frazojn kaj al mia demando, ĉu ŝi havas ankaŭ alian okupon, ŝi kun rido respondis, ke ŝi studas en universitato. Dume ŝi malfermis la pordon, por ke mi povu eniri. Post tiam mi certe malgajigis ŝin, kiam



Strato de amo

mi reagis, ke mi nur promenas, deziris al ŝi bonŝancon kaj rapide adiaŭiĝis. Sed ankoraŭ sufiĉe longe mi pensis pri tiu ĉarma studentino, kiu verŝajne per sia korpo gajnas monon por povi studi. Certe tio ne estas specialaĵo de Koreio, sed mi renkontis tiun fenomenon nur tie, tial mi envicigis ĝin ĉi tien. Poste mi priparolis tion kun Puramo, kiu preskaŭ ne kredis tion, ĉar laŭ li se la studentino estas juna kaj bela, ŝi kutimas gajni monon por sia studado en pli luksaj kondiĉoj. Sed mi povas nur atesti, kion mi travivis. Se ŝi estis escepto, tion mi ne scias.

Subĉiela muzeo. La subĉiela muzeo Hanguk Minsokchon (Korea Folklora Vilaĝo) iom sude de Seulo estas muzeo viva, ĉar ĉiam tie io okazadas. Ĝi vere ravis min, ĉar en ne tro granda teritorio oni povas lerni multon pri la vivo de koreoj en la pasinteco, konatiĝi kun diversaj tradiciaj metioj kaj spekti multajn spektaklojn de popolmuziko kaj popoldancoj kaj ankaŭ aliajn prezentaĵojn, inter ili ankaŭ plurajn por infanoj. Por tio servas bela rondforma areno.

Mi jam menciis en la teksto pri la infanoj, kiel ili ĝuis ekzemple la pilorion. Nun mi fokusiĝu iom al la allogaĵoj por plenkreskuloj. La historiajn



Prezentado de tradiciaj metioj



Lageto en subĉiela muzeo



Grupo de marŝemuloj ĉe la kapo de Budho

kaj ofte ne plu ekzistantajn metiojn oni ne prezentas per bildoj kaj priskriboj, sed estas tie vivaj personoj, kiuj ofte devis ellerni tion por povi demonstri la tutan procezon, kiel iu materialo sen modernaj iloj estas transformata al iu utila produkto. Krome oni povas vidi tradiciajn domojn kun ankaŭ tradicia interna ekipaĵo. Tion uzadas ankaŭ filmistoj. Ĝuste dum unu el miaj vizitoj de tiu muzeo estis unu bela historia domo fermita, ĉar oni tie filmis iun historian serion, kion ni sekve eksciis. Krome ni ekvidis eliri la aktorojn en historiaj soldatvestaĵoj. Krom interesaj kulturaj eventoj en la areno kaj ĉio jam priskribita ne eblas ne mencii la belan parkon kun lageto, sur kiu flosas historia velŝipo kun figuro surkaje, aspektanta kvazaŭ ankaŭ li estus vivanta.

Kiam mi kun la helpo de Jungkee gvidis tien la unuan grupon de la marŝamantoj, ni devis lui apartan aŭtobuson, ĉar la konekto tien per publika transporto ne estis bona. Tamen kun la dua grupo jam la transporto estis simpla, ĉar intertempe oni plilongigis la metroosistemon kaj de la plej proksima metroostacio kursadis sufiĉe ofte senpaga buso ĝis la enirejo en la muzeon. Sed la unua vojaĝo kun la devo de uzo de aparta aŭtobuso havis ankaŭ avantaĝon, ke survoje reen ni povis paŭzi ĉe bela budhisma sanktejo Ŭauĝong-sa kie ni fotiĝis antaŭ la granda budha kapo eligita el la tero (Jungkee plej maldekstre).

Puramo CHONG. La nomon de mia amiko Puramo, kiu per sia invito de mi en Koreion komence de la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento fakte kaŭzis mian ekinteresiĝon pri Koreio kaj sekve ankaŭ pri tiuj ceteraj priskribitaj landoj, mi jam plurfoje menciis. Sed li meritas pli detalan prezenton, per kiu mi volas fini la ĉapitron pri Koreio.

Puramo, propranome CHONG Won Cho (* 1952) uzas en Esperanto la nomon Puramo. Kiel filo de renoma koreamedicina kuracisto jam de sia infanaĝo li lernis la arton de sia patro kaj sub lia influo decidis iri laŭ liaj spuroj. Li diplomiĝis en 1981, magistriĝis en 1983 kaj doktoriĝis en 1991, ĉio ĉi pri korea medicino ĉe la universitato Kyunghee en Seulo. Li fondis kaj mem gvidas privatan klinikon, en kiu mi gastis, sed en ĝi li ne nur kuracas malsanulojn, sed inter siaj dungitaj kuracistoj li jam edukis pliajn al majstreco en sia fako. Li estras la Instituton de Korea Kompleksia Medicino kaj estas prezidanto de la Internacia Naturscienca Asocio (I.N.A.), krome ankaŭ profesoro ĉe la universitato Kingspark en Virginio, Usono. Kaj kio certe portas al li apartan ĝojon, ankaŭ lia filo Hoyun iras en la spuroj de siaj patro kaj avo kaj ankaŭ li jam estas sukcesa koreamedicina kuracisto.



Libro de Puramo Chong eldonita de KAVA-PECH

La verkon de Puramo *Kompleksia medicino kaj Saam akupunkturo* mi eldonis kaj en Esperanto (en la traduko de Choe Taesok el la korea originalo) kaj ankaŭ en la ĉeĥa traduko fare de Zdeněk Pluhař. Pri ambaŭ mi estas tre dankema al la aŭtoro, ĉar ne nur, ke mi ricevis de li senpage la kopirajton, sed li eĉ finance subtenis ambaŭ eldonojn.

Krom lia kariero, kiu certe meritas admiron, mi volas prezenti lin ankaŭ kiel nekredeble amikan kaj afablan personon, kion cetere atentema leganto jam eksentis de la pli supraj alineoj de ĉi tiu libro. Jen kelkaj detaloj, kiujn mi sukcesis ri-



Puramo ĉe hejma frizistino

marki dum nia kunestado. Mi jam skribis, ke mi loĝis dum mia unua restado en Koreio en la gastĉambro de lia kliniko. Sed mi estis invitita ankaŭ en lian loĝejon. Kiam ni eniris la unuan fojon, mi tuj rimarkis kiel la centran objekton de ilia loĝoĉambro enĉambran biciklon. Ĉar mi ĝuste en tiu tempo pripensis ĝian aĉeton, mi demandis, ĉu li uzadas ĝin ĉiutage. Li sincere respondis *Jes, kompreneble! Tiel.* Kaj li pendigis al ĝia stirilo sian elmetitan jakon.

El aliaj al mi simpatiaj ecoj de Puramo mi menciu ankoraŭ kelkajn. La ceteraj simile sukcesplenaj



Puramo kun la panjo



Nia grupo en la atendejo de la kliniko de Puramo

personoj kiel li certe lasas profesiulojn zorgi pri sia aspekto. Sed kiel atestas la foto de mi farita, eĉ pri hararo de Puramo zorgas lia edzino. Kaj ankaŭ ŝi meritas laŭdon, ĉar neniu divenus vidante lin, ke li ne havas hararanĝon faritan en iu renoma harsalono.

Ankaŭ lian konduton rilate al sia panjo mi admiris, kvankam mi nenion komprenis, pri kio ili parolis. Mi jam menciis, ke kiam ŝi envenis kaj ni sidis sur brakseĝoj kaj sofoj, ŝi eksidis „pli komforte“ surplanke. Sed mi aldonu, ke kiam Puramo ĉeestis, li tuj eksidis kontraŭ ŝin ankaŭ surplanken. Ĉu tiu sidmaniero estas ankaŭ por li pli komforta ol sidi en brakseĝo mi ne demandis.

Ankoraŭ unu travivaĵon mi devas mencii. Kiam mi gvidis al Koreio la grupon de longmarŝantoj, mi petis Puramon, ĉu ni povus viziti lian klinikon kaj ĉu li povus montri ĝin al ni kaj diri iujn vortojn pri ĝi kaj pri la korea medicino. Li volonte jesis, ni interkonsentis pri la tago kaj tempo, kiam li jam estos libera. Aŭ ni venis iom pli frue, aŭ iu lia paciento bezonis pli da tempo, tion mi ne plu rememoras, sed kiam ni alvenis, li



Kun Puramo, Jeong OK kaj Harald en tradicia restoracio



Gustumado de la loka manĝaĵo en tradicia medio

ankoraŭ havis iun en sia konsultejo. Li haste bonvenigis nin kaj petis, ke ni iom atendu, ĝis li liberiĝos, sed eĉ tio estis por ni tre agrabla tempo. Ni povis uzi en la atendejo diversajn komfortajn sidmeblojn, inkluzive de masaĝ-brakseĝoj.

Kiam Puramo venis, li montris al ni ĉion, ankaŭ la vastan stokejon de diversaj teoj miksitaj laŭ siaj propraj receptoj, en kiu regis neimageble agrabla odoro, kaj pacience respondis multajn demandojn. Mi ĝis tiam konsideris akupunkturon kiel lian plej oftan kuracmetodon, sed nur dum tiu fakekskurso mi eksciis, ke fakte eĉ pli ofte li uzadas kuracadon per diversaj konvenaj kuracherboj, kompreneble ofte en kombino kun akupunkturo kaj iam ankaŭ kun masaĝmaŝinoj. Li ankaŭ respondis al la demando, kiujn malsanojn li kuracas. Do ni eksciis, ke precipe internajn malsanojn, kiel ekzemple tiujn de stomako, hepato, pulmo, bronĥito, virinajn malsanojn kaj simile.

Post kiam mi dankis al li pro la afabla akcepto, li surprizis min per frazo, ke li invitas nin al tipa korea manĝejo por vespermanĝi. Mi ne tradukis tion kaj flustris al li, ke ili ne volos manĝi en certe multekosta restoracio kaj mi ne havas en buĝeto manĝaĵojn, do kvankam estus tre agrable kunesti ankoraŭ kun li, li komprenu mian malakcepton. Li tuj respondis, ke li ja diris, ke li invitas nin, do ke mi ne zorgu pri pago, kiu estas la afero de invitanto. Por vespermanĝi kun ni li invitis ankaŭ sian germanan staĝiston Harald Schicke kun edzino Yeong Ok, miajn amikojn, kiujn mi jam relative longe ne renkontis. Tial mi havis eblon babili ankaŭ kun ili, en longa distanco de niaj najbaraj landoj.

Tiel Puramo ne nur ebligis al ni senpagan fakan ekskurson en la kliniko, sed eĉ invitis nin ĉiujn en koreastilan restoracion, kiun alimaniere miaj klientoj ne ekkonus kaj kiu certe estis por ili neforgesebla travivaĵo. Ĉi tiu publikigo de la neatendita invito de la tuta grupo estu iuspeca ankoraŭfoja danko al Puramo pro lia afableco kaj malavareco, kiun li plurfoje montris rilate min.

Impresoj el Japanio

La sekva rakontado pri la travivaĵoj el Japanio denove baziĝas je miaj impresoj. Ĉi-kaze mi kredas, ke tiuj estas la plej fidindaj, ĉar kolektitaj dum miaj 10 vojaĝoj ene de dekkvin jaroj. Tamen ankaŭ ili estas nur miaj pure subjektivaj rigardoj, kiuj ne ĉiam devas esti identaj kun la vera realeco.

Religio estas en Japanio unu el la plej interesaj fenomenoj. Kiel vi povas vidi en multaj statistikoj, la nombro de la kredantoj (pli volonte mi uzus la terminon praktikantoj) de religioj estas multe pli granda ol de la japana civitanaro. Ne temas pri eraroj en la statistikoj, sed pri la fenomeno en aliaj landoj nekomprenebla, nome ke japanoj kutime konfesas kelkajn religiojn kaj ili konsideras tion neniel stranga. Plejparto de japanoj naskiĝas kiel ŝintoistoj. La infanoj estas tuj enskribitaj en iun ŝintoisman sanktejon, en ĝi oni festas gratulindajn eventojn, kiel ekzemple tri- kvin- kaj sepjariĝojn kaj ankaŭ alvenon de nova jaro, kaj al ĝi ili restas fidelaj dum la tuta vivo. Pluraj japanoj poste frekventas kristanajn lernejojn kaj, eĉ kiam tio ne estas kondiĉo, ili lasas sin bapti kaj do fariĝas kristanoj. Kaj kiel plenkreskuloj ili aliĝas al iu budhisma komunumo kaj plejparto de japanoj mortas kiel budhistoj.

Kvankam tio estas por ni apenaŭ kredebla, mi mem vidis en loĝĉambroj de familioj, kiujn mi vizitis, kaj la budhisman altaron kaj (kutime sub la plafono) ŝintoisman; kaj la loĝantoj preĝas alterne ĉe ambaŭ, precipe en festotagoj de tiuj religioj kaj ĉe tiu budhisma ankaŭ en datreventagoj de la forpaso de iuj proksimaj parencoj. Mi dirus, ke la japanoj ne tiom interesiĝas pri la doktrinoj de la religioj kiom pri la devoj plenumi ties difinitan ritaron.

Simile formala parto de ilia religia agado estas oferado, aŭ pli precize oferto de oferaĵo, konsistanta el manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Kiam dioj la ofe-



Ĉe la hejma budhisma altaro

raĵon ne deprenos, ĝin sekve formanĝos la ĉeestantoj. Ekzemple ĉe la nova religio Oomoto baziĝanta je ŝintoismo, pri kiu mi ankoraŭ skribos pli detale, oni havas jam antaŭ la diservo preparitajn tablojn kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, al kiuj oni aldonos tiujn neforprenitajn de la dioj kaj la spiritan travivaĵon dum la diservo oni finas per travivaĵo gastronomia. Mi supozas, ke tiel estas ĉe la plejparto, se ne ĉe ĉiuj religiaj komunumoj kaj ŝintoismaj kaj budhismaj.

Mi ne sukcesis pli proksime konatiĝi kun budhismaj kaj kristanaj religioj en Japanio, krom kiel normala turisto, do deekstere. Nur



Hejma ŝintoisma altaro



Akceptejo de budhisma monaĥejo



Unu el multaj budhismaj festenoj



Ĝardeno en unu el zen-budhismaj monaĥejoj

unufoje mi preskaŭ sukcesis esti akceptita en unu monaĥejo, sed post proksimume duonhora atendado ĉe la akceptejo mi eksciis, ke tio ne eblas. Mi tamen renkontis plurajn budhismajn festenojn, kiuj ĉiam estis preskaŭ manifestacio de belegaj kostumoj. Krome, mi admiris belege faritajn ŝtonajn ĝardenojn, tre ofte bildigantaj maron kun insuloj. Ili troviĝis precipe en monaĥejoj, kaj ĉar mi vizitis ilin en la tempo, kiam tie svarmis turistoj, mi ne renkontis tie meditantajn monaĥojn.

Mi vizitis ankaŭ tri kristanajn preĝejojn, ĉiam ili estis malgrandaj kaj preskaŭ nerimarkeblaj, apartenantaj al la plej disvastigita eklezio, nome baptisma. La baptisma eklezio estas la plej disvastigita en Japanio, tamen ne ununura, sed mi neniujn spurojn de alia kristana religio renkontis. Ĉiuj tri preĝejoj estis alireblaj, do mi povis trarigardi ankaŭ ilian internaĵon. Mi



Altaro de baptista preĝejo en Tokio

tamen ne estis bonŝanca tie iun renkonti, ne nur pastoron, sed ankaŭ ne iun ĉeestantan kredanton.

Alta vivonivelo kaj alta nombro de memmortigoj. Ĝenerale oni supozas, ke japanoj havas unu el la plej altaj vivoniveloj en la mondo. Kaj se vi rigardos japanojn ekster ilia lando, certe vi konfirmos tion. Ili kutimas tranokti en la plej luksaj hoteloj, deziras ke ilia hotelĉambro estu sufiĉe granda, ilia kvartaga ekskurso eŭropen enhavas kutime viziton de tri landoj, ili kunhavas la plej modernajn fotilojn kaj aliajn elektronikaĵojn, ktp. Sed hejme ili estas multe pli ŝparemaj (pri la ŝparado de energio pli poste), iliaj loĝejoj estas modestaj, eĉ ĉe universitata profesoro mi vidis anstataŭ ŝrankoj vestaĵtenilojn kun tola kovrilo, kiujn oni uzadas en Eŭropo en grandaj tendoj. Tio tamen ne validas ĝenerale, mi vizitis ankaŭ relative grandajn familiajn domojn tre bele meblitajn, sed tiuj estas malpli ol ekzemple en Ĉeĥio.

Sed, la vivonivelo ne estas difinita nur per tio, ĉu oni povas permesi al si aĉetadi ĉiam la plej modernajn elektronikaĵojn! Sufiĉas kompari, kiom da libera tempo havas japanoj kompare kun la nombro de libera tempo kie ajn en Eŭropo kaj konsideri la labortempon. Tio validas ankaŭ por infanoj, kiuj estas enorme pezigitaj en la lernejoj, postlernejaj lecionoj (ĉar ĉiuj japanoj deziras, ke iliaj infanoj nepre havu universitatnivelan edukon), kaj tiel plu. Do ne mirige, ke Japanio apartenas al la landoj kun la plej multnombraj memmortigoj en la mondo.

Mi do venis al la konkludo ke, se mi konsideras kiel la ekonomian flankon (kiu estas en Japanio certe unu el la plej altaj), tiel ankaŭ eblojn de uzo de sia libera tempo por ĝui siajn hobiojn kaj dediĉi sin al familio, la meza kvalito de la vivo estas ĉe ni minimume samalta, se ne pli alta ol en Japanio.

Eble eĉ troigita afableco kaj malantaŭ ĝi (ĉu ofte?) hipokriteco. Japanoj, ŝajnas al mi sen escepto, estas tre afablaj kiel inter si reciproke, tiel ankaŭ al fremduloj, al kiuj ili krome estas tre toleremaj. Sed tio ne signifas, ke en ilia interno iam ne furoras impulsa ekscito. Sed tion oni ne ekkonos ĉe ili, ĉar ilia masko de afableco ĉion kovras. Ĉu eble ĝuste tio, ke ili siajn emociojn ne ellasas eksteriĝi, povas gvidi al psikaj malsanoj aŭ eĉ al memmortigo, kiel mi priskribis tion en la antaŭa alineo? Mi ne scias, mi ne estas psikologo kaj ne volas ĝin ŝajnigi, temas nur pri mia laika opinio.

Tamen de tempo al tempo okazadas, ke ankaŭ japano malfermas sian maskon, ĉu nevole, ĉu antaŭ sia amiko. Mi montros ekzemplojn de ambaŭ kazoj.

Ĉu vere? oni diras japane *A so desuka?*, kion japanoj uzadas ofte, do mi sukcesis memori tion. Unufoje mia akompanantino babilis kun sia amikino, kiun ni hazarde renkontis, kaj mi rimarkis, ke de tempo al tempo ili preskaŭ nevideble rigardetas min. Estis do klare, ke ili parolas pri mi. Mi do pro mia ŝercemo enmiksiĝis dum paŭzeto de ilia babilado per *A so desuka?*, kaj ekvidis ilian konsterniĝon; kaj mia kolegino, esperantistino, demandis, ĉu mi komprenas japane. Mi respondis laŭ la vero, ke ne, ke mi nur memoras la ofte ripetatan japanan demandon.Certe tio ilin trankviligis!

Unu tagon gvidis min mia amiko Joŝimi UMEDA en liceon, kie li instruis, kaj enkoridore ni renkontiĝis kun iu el liaj kolegoj. Ambaŭ ekstaris unu kontraŭ la alia kaj mi estis atestanto de la plej longaj kaj plej profundaj kliniĝoj, kiujn mi ĝis tiam vidis, kaj de mallonga ŝajne tre afabla dialogo, kiun mi ne komprenis. Kiam ili adiaŭis sin mi diris al Joŝimi, ke ili certe devas esti tre proksimaj amikoj. Sed li mirigis min dirante, ke temas pri la plej danĝera fiulo en la lernejo. Laŭ iliaj maskoj tute ne eblis ekkoni ilian tre verŝajne reciprokan antipation, kaj mi certe ne malkovrus ĝin eĉ se mi komprenus ilian mallongan dialogon.

Gardita privateco kaj kial ne por mi. En la libroj pri Japanio kaj rakontoj de vizitintoj de Japanio vi povas ofte legi, kiel japanoj estas afablaj kaj gastemaj, ke ili volonte invitas vin al gastejo, sed neniam ili invitas vin hejmen, ĉar sian privatecon ili forte gardas. Kiel mi jam menciis en la enkonduko al la tri lastaj ĉapitroj, tio ne validis rilate al mi. Ne nur, ke mi vizitis multajn familiojn de esperantistoj kaj ofte ĉe ili ankaŭ tranoktis, sed akompanata de esperantistaj amikoj mi povis viziti ankaŭ hejmojn de iliaj parencoj kaj amikoj. Mi ne ripetos la kialojn de tiu mia impreso, ke tio, kio malfermas ne nur pordojn, sed ankaŭ korojn de japanoj estas nia komuna idealoplena lingvo Esperanto. Sed mi esperas, ke mi sukcesos almenaŭ ion de tio, kion mi ekkonis en japanaj familioj, prezenti en ĉi tiu teksto.

Rapide ŝanĝiĝantaj valoroj. La valoroj, kiujn oni konsideras tre gravaj, aŭ eĉ decidigaj, varias tra la tempo ĉie en la mondo. Sed mi supozas, ke nenie tiel rapide kaj ofte eĉ en la malon, kiel en Japanio dum la lastaj jardekoj.

Estas ĝenerale konate, ke japanoj estas ligitaj al sia firmao, kiu fariĝas por ili kvazaŭ familio. Kiam oni ĉe iu dungiĝas, oni restas al ĝi fidela ĝis sia pensiiĝo. Sed kiel mi eksciis en la jam menciita liceo, la demandoj de la studentoj en la fina studjaro (ĉi tie plejparte inaj) al la varbantoj de firmaoj, kiuj tradicie venadas antaŭ la fino de la studado proponi al ili laborlokojn, nekredeble rapide ŝanĝiĝas. Antaŭ kelkaj jardekoj ili interesiĝis pri la speco de la laboro kaj neniam pri la alto de salajro, kiel longaj estas la laborhoroj, ĉu estas ĉiujare rajto havi libertempon kaj kiom da tagoj, kiuj estas kondiĉoj por povi foriri de la firmao se ili ne estos tie kontentaj, kaj similaj, kiuj nun estas tute normalaj.

Kiel defendon por tiuj novtempaj kandidatoj por la proponataj postenoj mi devas mencii, ke jes, tiuj demandoj antaŭe ne venadis, sed aliflanke la firmaoj kondutis al siaj dungitoj kvazaŭ ili estus iliaj gepatroj. Ne ekzistis eblo maldungi iun, se li aŭ ŝi ne faris grandan malbonaĵon. En Japanio ne ekzistis senhejmuloj, dum nun estas ekzemple en Tokio tiuj malfeliĉuloj videblaj, kaj senlaboreco jam estas normala fenomeno ankaŭ en Japanio. Tial, se ne plu estas certeco, ke la firmao zorgos pri siaj dungitoj eĉ en la tempoj, kiam ĝi estas en malfacilaĵoj, ne mirige, ke la interesiĝantoj por iu posteno demandas ankaŭ pri ebloj de foriro siavole kaj pri aliaj kondiĉoj menciitaj.

El la liceo mi havas ankoraŭ alian menciendan travivaĵon. Kiam Joŝimi gvidis min en iun komputilejon, mi vidis tie diligente laboregi kelkajn knabinojn, kvankam estis tagmeza paŭzo por manĝi. Mi rimarkis, ke videblas, kiel japaninoj estas ekstreme diligentaj, se ili laboras eĉ anstataŭ manĝi. Sed mi ricevis klarigon, ke tio estas ne japanaj, sed ĉinaj studentinoj ĝuantaj japanan stipendion, kiuj vere laboregas timante perdon de la stipendio kaj devon reveni hejmen. Kaj se mi volas vidi kiel la tagmanĝan paŭzon trapasas la japanaj studentinoj, li gvidos min en kantinon. Post mia jeso li gvidis min en subteretaĝon, kie jam en koridoro ni vidis grupetojn de knabinoj sidantaj plejparte surplanke en cirkloj, meze de ili estis ladskatolo simila al la trilitra de fermentintaj kukumoj. Ili plejparte fumis, la ladskatoloj servis kiel cindrujoj, iuj dume manĝis kaj trinkis, kaj precipe ĉiuj laŭte babiladis. Sed mi estis atentigita, ke tio ne signifas, ke ili ne estas diligentaj. Ankaŭ ili diligente lernas eĉ ekster siaj studhoroj, sed la tagmezon ili kutimas ĝui tiamaniere.

Ankoraŭ hodiaŭ videblas en Japanio manko da emancipitaj virinoj, simile kiel en Koreio, kvankam ankaŭ tio rapide ŝanĝiĝas. Eĉ multiĝas

virinoj, kiuj ne edziniĝas kaj planite restas solaj por povi fari profesian karieron.

Mi estas atestanto eĉ de tre interesa fenomeno kiel la geedza paro, ambaŭ esperantistoj kaj alte edukitaj, kongruigis sian konduton al la ekstera situacio, en kiu ili troviĝis. Kiam mi renkontis ilin en Eŭropo, s-ro profesoro galante kondutis rilate sian edzinon, portis valizon, dece gestis, ke ŝi trairu pordon la unua, ktp. Sed kiam mi iris kun ili en Tokio celante ilian loĝejon, ŝi portis valizon, apud ŝi iris li nenionportanta, en la domon kaj loĝejon eniris li unua kaj ŝi la lasta, do estis klare, ke Li estas la ĉefo. Sed tio subite ŝanĝiĝis en la momento, kiam ili fermis la loĝejan pordon. En la loĝejo videble regis Ŝi kaj li (jam kun minuskla l) sengrumble plenumis ŝiajn instrukciojn. Mi loĝis ĉe ili kelkajn tagojn, do ne temis pri iu rara momenta okazaĵo.

Mi enketis tion ĉe kelkaj japanaj amikoj, kiuj konfirmis, ke de la viro estas tradicie atendate prizorgi la familion per mono kaj do ekster la hejmo li estas majstro, sed la enspezitan monon li transdonas al sia edzino, kiu decidas kiel ĝin utiligi – tiel ŝi fariĝas majstro de la mastrumado, do en la spaco de ilia hejmo tio inkluzivas ankaŭ regadon de la edzo, se li estas hejme (kio ne tro oftas). Ĉar mi havas tiun informon de tri sendependaj fontoj, mi kredas, ke se tio ne estas ĝenerala vero, do almenaŭ tio proksimiĝas al la vero en pliparto de japanaj familioj.

NARA estas la unua ĉefurbo de la unuiĝinta Japanio. Ĝi estis fondita en la jaro 710 kaj en ĝi troviĝas neimagebla nombro da konservitaj vidindaĵoj, kompreneble plej multe da budhismaj temploj kaj ŝintoismaj sanktejoj. Kun siaj 370 miloj da loĝantoj ĝi apartenas en Japanio al malgrandaj kaj trankvilaj urboj kaj ĝi estas vera paradizo por turistoj.

Tódai-ĵi (Orienta granda templo) estas templo en Nara preskaŭ komplete detruita per tertremo. Ĝiaj pluraj partoj estis plu nerenovigitaj kaj malrapide ripariĝis helpe de monkolekto (la stato en 2007, kiam mi vizitis ĝin kun la grupo de esperantistoj; tre verŝajne nun ĝi jam estas komplete renovigita).

La ĉefa domego jam tamen estis tute nova. Ĝi estas la plej granda ligna konstruaĵo en la mondo kaj en ĝi estas lokita granda statuo de Budha, la plej granda bronza statuo en la mondo. Unu objekto kaj du mondaj rekor-



La ĉefa domo de la templo Tódai-ĵi



Nia kontribuo por la renovigo de la templo



Budhisma templo Kófuku-ĵi

doj! Por imago: la alto de la sidanta budho estas 14,98 m kaj ĝia pezo estas preskaŭ 500 mil kg.

Ankaŭ nia grupo de esperantistoj, partoprenantoj de la Universala Kongreso en Jokohamo kontribuis al la finkonstruo de la Templo Todai-ĵi per aĉeto de tegolo. Ĝi jam certe estas enkonstruita rememorante nian viziton, kun bela surskribo per peniko fare de Margit Turková. Dum la skribo de la signoj de la landoj, el kiuj membris partoprenantoj de nia 32-persona grupo, estas forgesita HU. Sed espereble niaj amikoj el Hungario, la familio Slezák (ne estantaj en la foto), tion al ni pardonos. Cetere, post la enkonstruo de la tegolo en la tegmenton la teksto ne plu videblas.

Kófuku-ĵi estas la ĉeftemplo de la budhisma skolo Hosso konstruita en la jaroj 710 ĝis 730. La ĉefobjekto de adorado estas en ĝi la historia Budho Ŝakjamunio. Elstaran dominanton kreas la kvinetaĝa pagodo, kiu per sia alto 50,1 m estas la dua plej alta pagodo en Japanio. Eble ne necesas emfazi, ke krom la interno de tiu impona templo ni admiris ankaŭ la bele aranĝitan eksteraĵon, en kiu estas la domoj de tiu templo lokigitaj.



Enirpordego en la ŝintoisman sanktejon Kasuga



Sonorilo en Kasuga

Ŝintoisma sanktejo Kasuga. Post prezento de du elstaraj budhismaj temploj mi volas prezenti almenaŭ unu ŝintoisman sanktejon, Kasuga, fonditan en la jaro 768. Fabelsimile efikas amaso da lanternoj pendantaj preter vojoj. Tiujn ni tamen ne vidis lumantaj, ĉar oni lumigas ilin nur unufoje jare en la festo mantóró (en februaro). Plia interesaĵo, kiu altiris nian atenton, estis grandega sonorilo. Mi tre ŝatus aŭdi ĝian sonon, sed tion oni al mi ne plenumis.

Heroldoj de dioj. Al grandaj allogaĵoj de turistoj en Nara apartenas ne nur la multnombraj temploj kaj sanktejoj, sed ankaŭ domestikitaj



Heroldoj de dioj homojn ne timas

cervetoj ŝika konsiderataj ŝikaj heroldoj de dioj. Ili libere moviĝas inter homoj en eksteraj areoj de multaj temploj kaj sanktejoj, sed oni povas ilin renkonti ankaŭ en la centra urba parko. La cervetojn oni rajtas nutri, tamen nur per specialaj biskvitoj, kiujn eblas tiucele aĉeti en multaj vendoaŭtomatoj.

Kun unu grego da cervetoj mi havas ne tre bonan sperton. Mi aĉetis por ili skatolon da biskvitoj, do la permesitan kaj atente pakitan nutraĵon, ĉe la templo Kófuku-ĵi. Mi transdonis fotilon al mia amikino Fejfi kaj petis ŝin, ke ŝi fotu min dum mi nutros la cervetojn. Sed dume la plej proksima grego rimarkis la konatan skatolon, ĉirkaŭis min kaj emfaze postulis sian frandaĵon. Sed mi ne povis trovi, kiel malfermi la paketon, pro kio la cervetoj komencis senpacience puŝi miajn krurojn. Tio nervozigis min ĝis tiu grado, ke mi komplete perdis kapablon serĉi ĝustan manieron, kiel liberigi la biskvitojn. Post kiam unu senteble mordis mian femuron, mi panike iel disŝiris la paketon kaj verŝis la tutan enhavon for de mi. Per tio mi liberiĝis kaj ili komplete perdis intereson pri mi, sed mia fotistino ne sukcesis bildigi tion. Do sen havi foton pri mia batalo kun la heroldoj de dioj restis al mi nur rememoroj en mia kapo.



Budhisma templo Kijomizu-dera

KIOTO, la dua ĉefurbo de Japanio (794–1868) estas ofte nomata *Miljara ĉefurbo*. Nuntempe temas pri moderna urbo kun proksimume 1,5 milionoj da loĝantoj, kiu estas konsiderata kultura centro de Japanio. Ĝi estas parto de la triurbo Ósaka-Kóbe-Kioto, nomata kune Kansajo. Tamen, malgraŭ sia moderneco ĝi havas bone konservitan sian historian centron kun amaso da antikvaj memorindaĵoj. Cetere, inter ĝiaj 16 ĝemelurboj el la tuta mondo estas ankaŭ la ĉeĥa ĉefurbo Prago.

Templo Kijomizu-dera, ankaŭ nomata Otowasan Kijomizudera situas sur teraltaĵo en orienta parto de Kioto. Ĝi estas impone granda ligna konstruaĵo, kies historio komenciĝas en la jaro 798, sed ĝia nuna stato devenas de la jaro 1633. El la terasego oni povas ĝui la rigardon al preskaŭ tuta Kioto.

Kiel mi jam menciis en alia loko, japanoj kutimas aliĝi al iu komunumo kaj de budhismo, kaj de ŝintoismo. Tial ofte troviĝas en najbareco de budhismaj temploj almenaŭ malgrandaj ŝintoismaj sanktejoj kaj male. Tiel estas ankaŭ kaze de Kijomizu-dera, sed la najbara ŝinto-sanktejo mem estas ankaŭ impona kaj alloga, do ne estis simple forlasi ĝin.



Ŝintoisma sanktejo najbare al Kijomizu-dera

En Kioto mi vizitis dum miaj vojaĝoj ankaŭ plurajn aliajn vidindaĵojn inkluzive de malnova imperiestra palaco, sed mi volas de tiu belega urbo prezenti ankaŭ aliajn interesaĵojn.

Ĉe la templo Kijomizu-dera mi renkontis la unuan fojon tradician malfermitan kafejon, kiun mi trovis vere ĉarman. Ĝi estis en formo de ĉeloj kun malaltaj tabletoj, kiuj estas pli tipaj por Koreio, sed la planko estis kovrita per tipa japana tatamo. Tial klaras, ke la vizitantoj devis demeti ŝuojn kaj eniri al sia loko en ŝtrumpetoj. Ĉi tiu kafejo havis ankoraŭ unu gravan avantaĝon. Ĝi situis tiel, ke el ĝi eblis observi ne nur la urbon Kioto, sed en la fono ankaŭ la montaron Kii, konatan pro siaj multaj pilgrimpadoj.

Danke al la fakto, ke mia japana amiko Yas KAWAMURA en la tempo de mia vizito estis estro de la akceptejo en tradicia japanstila hotelo, mi havis okazon enrigardi ankaŭ ĝin. Tie mi ekkonis, ke kvankam japanoj tradicie ne uzadis tablojn kaj ĉion inkluzive de manĝoj plenumis surtapiŝe, nuntempe estas iliaj tradiciaj ejoj ekipitaj per similaj tabloj, kiujn mi renkontis en Koreio. Tion al mi konfirmis miaj pliaj vizitoj de similaj ejoj.

Por ne resti nur ĉe historiaj vidindaĵoj, mi menciu ankaŭ ion, kio atakis mian atenton per sia supermoderneco. Kioto fieras pro la plej



Tradicia ripozejo en eksteraĵo de Kijomizu-dera

moderna fervoja stacidomo en Japanio. Ĝi estas konstruita ne nur tre praktike por la trafiko, sed ankaŭ la orientiĝo en tiu grandega kelketaĝa komplekso estas relative simpla kaj krome ĝi estas vere eleganta. Kaj por ni, kiuj ne komprenas la japanan, estas agrable, ke preskaŭ ĉiuj surskriboj estas tie krom en la japana ankaŭ en la angla, kio en Japanio estas preskaŭ escepto. Mi pro scivolemo suprenveturis sur moviĝantaj ŝtuparoj ĝis la supro. Tio ne estis en la lastan etaĝon, kiel mi supozis, sed sur la tegmenton, kvankam pli taŭgas skribi en la surtegmentan parkon, ĉar krom helikoptera surteriĝejo ĝi estis vera parko kun benkoj por povi ripozi kaj relative grandaj arboj.

Plia surprizo en Kioto (ne en la centro) por mi estis la sistemo de elektraj kondukiloj, kiu ŝajnis al mi komplete ĥaosa kaj mi pensis pri tio, kion dirus pri tio niaj revizi-teknikistoj. Poste mi vidis similajn sistemojn ankaŭ en aliaj urboj, aŭ pli precize antaŭurboj kaj vilaĝoj, do mi komencis interesiĝi pri la kialo de tiuj strangaĵoj. Kaj mi eksciis, ke pro la oftaj tertremoj estas lokigo de kabloj en la teron tre multekosta, ĉar ili devas esti skurezistaj. Tial en nedense prikonstruita areo oni gvidas kablojn en aero. Kaj tiu sistemo, kiu ŝajnas al mi ĥaosa kaj certe ne estas estetike plaĉa, es-



Tradicie ekipita hotelĉambro



Elektra instalaĵo por mi nekutima



Tegmento de la stacidomo

tas tre praktike konstruita por povi ĝin kiel eble plej rapide renovigi post neniiĝo per tertremo.

Ankoraŭ Kioto. Fine de miaj rememoroj pri Kioto mi revenu al mia unua vizito de ĝi (la dua de Japanio), kiam mi jam estis iomete konatigita kun la specialaĵoj de tiu lando, tamen iam mirigita. Jen ekzemplo: mi promenis kun japana esperantistino en unu el la belaj parkoj kiam mi, kafamanto, ekrevis pri taso da kafo. Mi do haltis ĉe unu trinkaĵaŭtomato, kiuj en Japanio abundas, kaj proponis kafon ankaŭ al mia akompanantino. Ŝi la kafon malakceptis dirante, ke ŝi kunhavas sian teon, tamen ankaŭ ŝi bonvole akceptis ripozpaŭzon. Mi do aĉetis kafon nur por mi, ni eksidis al benko kaj trinkante babilis.

Post mallonga ripozo ni leviĝis kaj mi, kun la malplena plasta pokalo enmane, vane serĉis en la ĉirkaŭaĵo rubaĵujon. Ĉar miaj okuloj trovis neniun, mi metis la pokalon sur la supron de la aŭtomato kaj ni ekdaŭrigis nian promenon. Sed post momento mia amikino subite rekuris al la aŭtomato kaj mi vidis, ke ŝi saltadas strebante kapti la kafujon, kion ŝi nur preskaŭ sukcesis pro sia malalta staturo. Mi do ankaŭ revenis, donis al ŝi la



Moderna stacidomo en Kioto

pokalon kun la demando, por kio ŝi bezonas ĝin. Kaj jam supozante, ke mi kondutis malĝuste, mi klarigis, ke mi serĉis rubaĵujon, sed nur ne vidante ĝin mi metis la ujon al la supro. Sekve mi estis instruita, ke en Japanio tute ne ekzistas rubaĵujoj. Kiu ion elportos el sia hejmo, tion li ankaŭ alportas reen. Kaj tio validas ankaŭ por la pakmaterialoj de survoje aĉetitaj kaj forkonsumitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Kaj ŝi elmetis el sia dorsosako plastan sakon, en kiu ŝi jam havis iom da rubaĵoj kaj enmetis en ĝin mian pokalon kaj nia promeno ekdaŭris. Mi nur pripensis, kio okazus en iu ajn eŭropa urbo, se oni forigus ĉiujn rubaĵujojn!

UĴI (urbo inter Nara kaj Kioto). Turisme la plej allogaj en Uĵi estas ŝintoisma sanktejo Uĵigami kaj budhisma templo Bjódóin, kaj la plej fama loka produkto ofte aĉetata ankaŭ de turistoj estas diversaj specoj de teo. Sed por mi, eldonisto, estis la plej interesa la ponto trans la samnoma rivero Uĵi, kie okazis cetere la plej sanga batalo de samurajoj, kun la memormonumento de MURASAKI Ŝikibu (970–1019). Ŝi estis kortega sinjorino en la imperiestra kortego kaj verkistino. Ŝia romano *La rakontaro*



Monumento de MURASAKI Ŝikibu

de Genĝi estas onidire la unua verkita romano, pro kio ŝi estas indikita en pluraj fontoj kiel fondinto de la literatura ĝenro romano.

KAMAKURA estas la tria ĉefurbo de Japanio (1185–1333). Kvankam la malpotenca imperiestro kun sia kortegaro plu rezidis en Kioto, en Japanio reale regis ŝoguno, la supera ĉefo de samurajoj, kiu setlis en Kamakura. Pro tio estas dum ĉi tiu tempoperiodo konsideratajn ĉefurboj de Japanio kaj Kioto (formale) kaj Kamakura (fakte).

La plej fama allogaĵo de Kamakura estas Granda Budho, kiun eblas kontraŭ modera enirpago trarigardi ankaŭ de interne, kion mi kompreneble profitis. Nur ene de tiu kavernosimila interno mi ekkomprenis ne nur la grandiozecon de tiu statua verko, sed precipe la nekredeblan teknikan arton, kiun devis pruvi la konstruintoj.

Plia neevitebla vidindaĵo en Kamakura estas sakura aleo komenciĝanta per ŝintoisma torijo. Ĝi estas la plej interesa aleo, kiun mi iam ie vidis. Mi nur bedaŭris, ke mi ne estis tie dum printempo, kiam la sakuroj floras kaj kiam ĝi devas esti eĉ pli alloga.



Granda Budho rigardas al Kamakura kaj svarmantaj turistoj



Enirejo en sakuran aleon en Kamakura



Rigardo el la turo al la regattejo



Belvidturo en la insulo Enoŝima

Enoŝima. Al Kamakura gvidis min kaj kelkajn amikojn el nia kongresgrupo mia multjara japana amikino Hisako SANO. Krom ŝi partoprenis ankaŭ ŝiaj samklubanoj. Ili rekomendis al ni, kiam ni jam estas en Kamakura, viziti ankaŭ tre proksiman insuleton Enoŝima. Ni obeis la konsilon kaj ne bedaŭris tion. Post la trarigardo de la vidindaĵoj en la urbo Kamakura ni ekestis en natura paradizo, kiun eĉ emfazis la rigardo el la belvidturo. El ĝi estis ankaŭ bone videbla regattejo, okazaĵo de olimpikaj ludoj en 1964.



Unu el la kvartaloj de ĉielskrapantoj

TOKIO, nuntempa ĉefurbo de Japanio, nomiĝis ĝis la jaro 1868 Edo. La nomŝanĝo okazis en la tempo, kiam en ĝin transloĝiĝis la kortego de la imperiestro el Kioto kaj jam antaŭe la ŝoguno kun siaj samurajoj el Kamakura. Per tio Tokio fariĝis unusola ĉefurbo de Japanio.

Tokion mi vizitis ene de ĉiuj miaj vojaĝoj al Japanio, do dekfoje, kvankam iam nur tre mallonge. Ekzemple okaze de jam menciita UK nur por unutaga ekskurso el Jokohamo, sed tiam sub gvido de sperta ĉeĥa ĉiĉerono kaj japanologo David Hochman, aganta en la universitato en Sapporo, de kiu mi eksciis plurajn informojn, kiujn mi dum la naŭ antaŭaj vizitoj ne rimarkis.

Mi ne scias, ĉu ĉiuj vizitintoj de Tokio konsentos kun mi, sed laŭ mi estas tri ĉefaj lokoj, kiuj karakterizas tiun mirindan urbon. Ilin ĉiu devus viziti, eĉ se li aŭ ŝi estas en Tokio minimuman tempon. Temas pri Asakusa, Ŝinĝuku kaj Ginza kun la teatro kabuko.

Asakusa estas urba kvartalo, kiu estas pruvo, kiel eblas kunigi novajn kaj malnovajn elementojn. La plej majesta estas sendiskute la budhisma templo Sensó-ĝi kaj belega pordego Kaminarinon kun pendanta grandega



Pagodo de la templo Asakusa



Unu el malgrandaj altaroj en Asakusa por trankvila kontemplado



Ankaŭ memorigaĵoj logas turistojn



… kaj ankaŭ bongustaĵoj



Nia ĉiĉerono David Hochman estis por ni fonto de utilaj informoj



Enirejo en la amuzparkon, la plej malnova en Japanio

lampiono, sed ankaŭ la tegmentita strateto kuniganta ambaŭ. En ĝi troveblas multaj giĉetoj ofertantaj multajn japanajn kaj lokajn gastronomiajn specialaĵojn, sed ankaŭ multajn memoraĵojn. Sed en Asakusa ne estas nur antikvaj vidindaĵoj. Estas tie ankaŭ tre mov- kaj bruoplena amuzparko Hanajaŝiki, la plej malnova amuzparko en Japanio.

Mi estis surprizita ankaŭ de tio, kiel en tiu turisme frekventata spaco estas kaŝitaj trankvilaj lokoj kun malgrandaj altaroj konvenaj por preĝado kaj meditado. Dum mia unua vizito de Asakusa mi miris, ke diference de aliaj budhismaj temploj mi ne vidis najbare almenaŭ etan ŝintoisman sanktejon. Sed tion kaŭzis mia malatento. Kiel mi eksciis pli poste, sufiĉis dekstreniĝi fronte al la templo kaj post momento mi staris antaŭ ŝinto-sanktejo, kaj ne malgranda! Survoje al ĝi mi renkontis plurajn monaĥojn, de kio mi ekkomprenis, ke la domoj survoje al la sanktejo, kiuj ne estas en fokuso de turistoj, estas preskaŭ certe loĝlokoj de la budhismaj monaĥoj.

Ŝinĝuku estas administra centro kaj la kvartalo de ĉielskrapantoj. La stacidomo Ŝinĝuku estas la plej granda fervojstacio en Japanio kaj vere ĝi



Malgranda tradicia gastejo en Ŝinĝuku

similas al homa formikejo. Sed sufiĉas eliri de tiu frekventata stacidomo al la alia flanko ol estas la ĉielskrapantoj kaj tuj oni troviĝas en idilaj stratetoj, kie kvazaŭ haltis la tempo en antaŭlasta jarcento.

Senhejmuloj en Tokio. En ĉi tiu ege frekventata stacidomo mi vidis la unuan fojon en Japanio senhejmulojn. Ili rezidis en flanka vestiblo en konstruaĵoj faritaj el kartonaj skatoloj. Mi miris pri ilia maniero de vivtenado, kiun mi spertis persone. Kiam ni preteriris ilin kun mia amiko, profesoro Hiroomi KANNO, venis al ni iu senhejmulo kaj ofertis al ni iujn kolorajn revuojn. Mia amiko iun de li aĉetis, sed post momento, sen rigardi en ĝin, li flankenmetis ĝin kaj mi rimarkis, ke la senhejmulo tuj ĝin denove reprenis. Mi kompreneble demandis, pri kia stranga teatraĵo temis. Kiel mi eksciis, la japanaj senhejmuloj neniam almozpetas, ĉar ili scias, ke japanoj neniam donas ion al klara maldiligentulo. Tial ekestis la kutimo, ke ili „vendas" katalogojn, kiujn ili ricevas senpage en grandvendejoj. Por tiu „laboro" jam ankaŭ japanoj pretas pagi. Klaras, ke la prezo estas libervola.

Kiam mi la saman lokon vizitis post proksimume tri jaroj, la senhejmuloj tie ne plu estis. Mi demandis pri ilia sorto kaj eksciis, ke ili ricevis je



Senhejmuloj en la stacidomo Ŝinĝuku



Kolonio de senhejmuloj en Ueno



Senhejmuloj en la bordo de Sumida – ĉi-malgaja realeco jam ankaŭ en Japanio



Komerca centro Ginza

dispono alian spacon, nome en parko ĉe la stacidomo Ueno. Mi estis scivolema, tial mi vizitis ankaŭ tiun lokon. Jes, ili rezidis tie, sed la kondiĉojn tie ili havis malpli favorajn, ĉar dum en Ŝinĝuku ili estis sub tegmento, en la parko subĉiele. Pro tio ankaŭ iliaj „hejmoj" aliaspektis.

Dum la lasta vizito de Tokio kun la grupo de esperantistoj ni vidis el boato sur la rivero Sumida multajn senhejmulojn loĝantajn ĉe la bordo. Mi demandis, ĉu oni denove translokis ilin de Ueno aŭ ĉu temas pri alia grupo da ili, sed mi ne eksciis tion. Mi ricevis respondon, ke bedaŭrinde dum la lastaj jaroj tiuj kompatindaj sortuloj multiĝas pli kaj pli en diversaj lokoj. Estas malfeliĉa fenomeno de la moderna tempo, kiu jam trovis vojon eĉ al Japanio.

Ginza estas komerca centro viciĝanta inter la plej luksajn en la mondo. En ĝi setlas multaj elstaraj firmaoj kiel la lokaj tiel ankaŭ japanaj filioj de internaciaj kompanioj, kiuj havas tie ankaŭ siajn specimenejojn. Mi vizitis unu, de la firmao Sony, sed tiun pli ĝuste ol specimenejo mi nomus muzeo, ĉar en kelkaj etaĝoj la ekspozicioj prezentas ne nur la historion



La ĉefa arterio de Ginza dum semajnfino



Tomohiro kun mia verko enmane

de la firmao, sed ankaŭ la evoluon de elektronikaĵoj. Kompreneble ne mankas la plej modernaj produktoj de la firmao kaj ĝiaj planoj por estonteco.

Tra la centro de Ginza gvidas tre frekventata larĝa strato kun densa aŭtomobila trafiko. Sed min tre agrable surprizis, ke dum posttagmezoj de ĉiuj sabatoj kaj dimanĉoj tiu frekventata strato transformiĝas al la zono nur por piedirantoj.

El Ginza mi havas ankaŭ neforgeseblan gastronomian travivaĵon. Mi promenis tie en akompano de japana amiko, astronomo HIRAYAMA Tomohiro. Rilate

lin estas interese, ke lia granda labormodelo estis la ĉeĥa astronomo Antonín Mrkos, kiun li renkontis en iu konferenco. Tiu faris al li tiel fortan impreson, ke sub la influo de ĉeĥe skribita libro, kiun li donacis al mia amiko, li eĉ komencis lerni la ĉeĥan. Mi do tuj provis alparoli lin ĉeĥe kaj miasurprize li vere ĉeĥe reagis, kvankam kun eraroj, tamen kompreneble.

Do, Tomohiron mi invitis komune trinki bieron. Li akceptis tion kun ĝojo, ĉefe pro tio, ke hazarde proksime de ni troviĝis Pilsena restoracio, kie oni povas aĉeti originalan ĉeĥan bieron. Ni eniris ĝin kaj mi ekvidis, ke la posedanto verŝajne opinias, ke Pilseno troviĝas en Aŭstrio, ĉar en la muroj estis eĉ ne unu bildo el Ĉeĥio, sed laŭ mia pritakso ĉiuj bildigis Alpojn kaj aŭstrajn lagojn. Sed eĉ pli ol la murornamaĵo min mirigis la prezoj. Temis pri la plej multekosta biero, kiun mi iam ie trinkis. Por du, laŭ la ĉeĥaj mezuroj malgrandaj boteloj de originala pilsena biero mi pagis en miaj okuloj astronomian sumon. Mia japana amiko lasis sin gastigi per biero, sed reciproke por ni mendis „tipe ĉeĥajn" bavarajn kolbasetojn. Nu, almenaŭ pro la nomo de la gastejo kaj biero mi sentis min tie en mia hejma medio.

Tradicia teatro kabuko. En la areo de Ginza estas lokita teatro Kabukiza, iuspeca japana nacia teatro prezentanta sole tradiciajn formojn de la teatraĵo nomata kabuko. En ĝi ludas, same kiel en eĉ pli antikva tradicia teatra formo No, nur viroj, ankaŭ en virinaj roloj. Kvankam mallongajn specimenojn de tiu tipa japana teatraĵo mi eĉ ripete vidis enkadre de kulturaj partoj de kongresoj kaj konferencoj, logis min vidi kompletan spektaklon. Kiam mi interesiĝis pri enirbiletoj, surprizis min ne nur la alta prezo, sed ankaŭ la longo de la prezentado, se mi ne eraras pli ol kvar horojn. Tial mi bonvenigis la eblon por turistoj aĉeti enirbileton nur por iuspeca gustumo de kabuko, do nur por parto de la spektaklo. Pro tiu celo estas je dispono unu apartigita sekcio de balkono, kien eblas eniri elkoridore kaj resti tie, se mi bone rememoras, proksimume 20 minutojn. Sed mi devas konfesi, ke eĉ tiuj 20 minutoj ŝajnis al mi tro longaj. Kvankam la scenaranĝo, maskoj de la aktoroj, muziko kaj danco efikis al mi belege, post kelkaj momentoj mi jam trovis la spektaklon miaguste monotona ĝis enua. Sed la problemo estas certe ĉe mi kaj ne ĉe la formo aŭ prezent-maniero de tiu teatraĵo, tiel ŝatata de japanoj.



Teatro kabuko



Arealo de Imperiestra Palaco

Imperiestra Palaco Kókjo. Kiel mi jam menciis dum la priskribo de la imperiestra palaco en Pekino, tiu en Tokio estas diference de ĝi plu uzata kiel restadejo de la japana imperiestro. Tial estas alireblaj por turistoj nur la Imperiestra Placo kaj Higaŝi Gjóen, la orientaj ĝardenoj de la Imperiestra Palaco.

Verŝajne ne necesas emfazi, ke tie estas belege prizorgata parko ofte uzata promencele, sed en la arealo troviĝas ankaŭ objektoj servantaj ne nur por turistoj (Muzeo de scienco kaj tekniko, Nacia galerio de la moderna arto). Ekzemple mi vizitis tie grandan sportan salonon,



Luktoarto en la arealo de la Imperiestra Palaco

en kiu tiutempe okazis iu granda porjunulara konkurso en luktoarto. En la salonego luktis kelkdeko da duopoj sur multaj luktejoj kaj pliaj trejnis ekster la salonego, eĉ subĉiele.

Kiam mi menciis la japanan imperiestron, mi devas aldoni por mi ĝis tiu vizito nekonataĵon. Kiel verŝajne ĉiuj nejapanoj ankaŭ mi sciis, ke la simbolo de Japanio estas sakuro, sed ne, ke ankaŭ la japana imperiestro havas floran simbolon, kaj ĝi estas krizantemo. Nenie mi vidis tiom da specoj da belegaj krizantemoj.

Sanktejo Jasukuni proksime de la Imperiestra Palaco estas verŝajne la plej diskutata sanktejo ne nur en Japanio. Ĝi estis fondita en la jaro1869 kiel unu el la sanktejoj, kiuj estadis fondataj post la oficialigo de ŝintoismo kiel la ŝtata religio. Tiu ĉi devus servi por adorado de la batalantoj, kiuj mortis dum militoj. Nun ĝi rememorigas 2,5 milionojn da soldatoj, inter kiuj estas ankaŭ 14 militkrimuloj el la dua mondmilito, kiuj estas ĉi tie adorataj kiel herooj kaj martiroj. Tial la sanktejo kaj la apuda militista muzeo estas perceptataj kiel montro de la japana nacionalismo kaj eĉ kiel konsento kun la militista politiko de Japanio dum la dua mondmilito.



Sanktejo Jasukuni



Tokia Eifelturo

La sanktejon de tempo al tempo vizitadas ankaŭ altrangaj japanaj politikistoj kaj kvankam ili ĉiam deklaras, ke ili ĝin vizitis kiel privatuloj, tio kaŭzadas akrajn protestojn, precipe flanke de Ĉinio kaj Suda Koreio. Mi ĝin vizitis dufoje kaj ambaŭokaze mi havis bonŝancon, ĉar dume tie floris krizantemoj, verŝajne eĉ en pli da specoj kaj pli multaj ol en la parko de la imperiestra palaco.

Eifel-turo de Tokio estas 333 m alta, je 9 m pli ol la originalo en Parizo, kaj eĉ je 33 m se ni enkalkulas ankaŭ la televid-antenon. Kaj ĝi estas atentokapta ne nur pro sia



Oazo de trankvilo meze de la brua grandurbo

simileco kun sia pli maljuna fratino, sed ankaŭ pro sia ruĝa koloro. Ĝia ĉirkaŭaĵo estas ĉiam movoplena kaj eventoriĉa, almenaŭ laŭ miaj du vizitoj en tempa distanco de kelkaj jaroj. Certe temas pri plia loko, kiu postlasis ĉe mi fortan impreson.

Teopavilono en la parko Hamarikyu. Ĉi tiun parkon ni vizitis kun nia ĉiĉerono David. Mi estis kelkfoje dum miaj vizitoj proksime, sed ĉi tiu bela parto de naturo meze de altaj domegoj estas tiel kaŝita, ke mi neniam rimarkis ĝin. Ni admiris ne nur la belecon de la loka flaŭro kun zigzagaj vojetoj kaj agrable lokitaj benkoj por ripozi, sed precipe lageton kun laŭstila teopavilono sur artefarita insuleto kunigita kun la bordo per ununura ligna ponteto.

Sed por ne perdi perfektan idiliecan impreson oni ne rajtas rigardi supren, ĉar tiumomente vi revenos en la vitrobetonan arbaron. Mi rimarkis ĉe mi interesan fenomenon. Ĝis mi rigardis nur horizontale kaj ĝuis la belecon de la parko kaj lago, mi ne perceptis la bruon deekstere. Sed post kiam mi rigardis supren kaj ekkonsciis, kiel proksime al la urbega civilizacio ni estas, mi tuj komencis percepti ĝin ĝeniga, kvankam ĝi ne estis tro intensiva.



Direkcio de bierproduktanto Asahi kun granda ora bierguto surtegmente

Direkcio de la bierejo Asahi. La boatado laŭlonge de la rivero Sumide havigas rigardon ne nur al la senhejmuloj, kion mi jam menciis, sed oni subveturas tre interesajn pontojn kaj en la bordoj preter la rivero videblas multaj arkitekture atentokaptaj modernaj domoj. Inter aliaj situas tie ankaŭ la sidejo de la direkcio de Asahi, la plej granda japana produktanto de biero (cetere, tre bongusta). Pli preciza ol japana estus verŝajne la termino *monda produktanto de biero kun la ĉefsidejo en Japanio*, ĉar ĝi estas posedanto de multaj bierejoj en pluraj landoj.

Inter la taskoj por la arkitektoj estis ankaŭ la postulo, ke ĝi enhavu bone videblan elementon iel kunigitan al biero. La rezulto estas granda guto da biero sur la tegmento, pri kiu, almenaŭ kiel mi aŭdis, neniu japano parolas alimaniere ol kiel pri *la ora merdo*.

Japana Esperanto-Instituto (JEI) en Ŝinĵuku estis mia plej ofta celo en Tokio, kie mi ankaŭ dum mia prelego ene de la unua vojaĝo al Japanio renkontiĝis kun KURISU Kei. JEI estas la plej signifa japana organizaĵo okupiĝanta pri Esperanto. Merite de malavara membro, kiu heredigis al JEI relative grandan domon, ĝi estas ankaŭ bone finance sekurigita.



La domo de Japana Esperanto-Instituto

La teretaĝon kaj la unuan etaĝon ĝi luas por komercaj celoj, en la dua etaĝo estis prelegejo kaj oficejoj, en la lasta riĉa biblioteko kaj la plej granda (sed ne ununura) Esperanto-libroservo en Japanio. Kiel eldonisto eldonanta ankaŭ librojn en Esperanto mi strebis laŭeble ĉiam kunporti kaj proponi al la libroservisto miajn novaĵojn, kiujn li kutime aĉetis. Ĉar normale mi liveras la librojn perpoŝte, estas tiuspeca persona liverado avantaĝa por ambaŭ flankoj. Por mi, ke li aĉetas ankaŭ tion, kion li nevidante ne mendus, por la libroservo ŝparo de altaj sendokostoj.



La tiama direktoro de JEI, ISINO Josio, rigardanta kantareton kompilitan de mia edzino Stanjo

En JEI tamen pleje impresis min alia okazaĵo. Dum mia prelego pri la Ĉeĥa Respubliko, velura (sensanga) revolucio, paca disiĝo de Ĉeĥoslovakio al du memstaraj ŝtatoj kaj la ŝanĝo de politika kaj ekonomia reĝimoj (de socialismo al kapitalismo kaj de regulata ekonomio al la merkata), kiuj estis la plej ofte dezirata prelego el ĉiuj de mi ofertitaj kaj en Japanio kaj en Koreio, mi konatiĝis kun mia estonta proksima amiko Kei Kurisu, sed li meritas propran subĉapitron.

Kei KURISU. Kvankam tiu mia amiko ĉiam subskribiĝis Kurisu Kei laŭ la japana kutimo ankaŭ per la latina lingvo (male ol multaj pli junaj japanoj), mi plu nomos lin kiel la ceterajn laŭ la kutimoj en Eŭropo, kie mi vivas kaj nun verkas pri li. Kiel jam menciite, la unuan fojon mi renkontis Kei dum mia prelego en JEI jam ene de mia unua vizito de Japanio en la jaro 1994. Dum ĝi mi rimarkis maljunulon en la unua vico, kiu ne nur sorbis ĉiujn miajn vortojn, sed eĉ multon diligente notis. Kiam mi finis kaj invitis la publikon al demandoj, li havis tute konkretajn demandojn, el kiuj mi eksciis, ke li konas la situacion en Ĉeĥio kaj Slovakio pli bone ol plejparto de ĉeĥoj kaj slovakoj. Post la fino de la prelego li venis al mi kaj prezentiĝis modeste *Mi estas Kurisu Kei.* Per tio komenciĝis nia unua interparolo, kiu daŭris sufiĉe longe.



Konfeso de KURISU Kei pri sia rilato al la ĉeĥa literaturo

Pri la elstara japana bohemisto* kaj esperantisto mi kompreneble sciis, sed eĉ en sonĝo mi ne imagis, ke mi povus iam lin renkonti kaj ke ni fariĝos eĉ bonaj amikoj. Miajn simpatiojn li akiris jam kiam mi ne sciis, pri kiu temas, pro sia nekutime atenta intereso pri mia prelego. Kiam mi ekkonis lin pli proksime, lian modestecon, elanon, kun kiu

* Bohemisto = fakulo pri la ĉeĥaj lingvo kaj kulturo

Výběr z překladů Kei Kurisu, vydaných v Japonsku

Pozn.: Do tohoto výběru jsou zahrnuté pouze překlady, vydané do roku 1996 a převzaté z jeho publikace *Co mi dala česká literatura*. Pro stručnost jsou vynechány názvy vydavatelství a rovněž nejsou zařazena díla již přeložená a dosud nevydaná.

Karel Čapek: **Povídky z jedné kapsy** (1960, 1976), **Válka s mloky** (1970, 1974, 1978), **Muž, který uměl lhát** (1971), **R.U. R.**, **Ukradený kaktus** a **Sbírka známek** (1978), **Šlépěje** (1988), **Příběh o kasaři a žháři** (1988), **R.U. R.** a **Bílá nemoc** se sbírkou Čapkových her a 6 esejemi (1992), **Případ Selvinův** (1994)
Jan Drda: **Němá barikáda** (1952)
Julius Fučík: **Reportáž psaná na oprátce** a dalších 11 článků (1952; reedice **Reportáže** spolu s 12 dopisy z vězení a několika dalšími články a studiemi – 1962, 1977)
Karel Havlíček Borovský: **Křest sv. Vladimíra** (1960)
Jaroslav Hašek: **Osudy dobrého vojáka Švejka** (1962, 1963; reedice se vzpomínkou Josefa Lady **Jak jsem maloval Švejka** – 1972, 1978)
Arnošt Lustig: **Modlitba pro Kateřinu Horovitzovou** a **Sousto** (1967)
Božena Němcová: **Babička** (zkrácený překlad pro mládež – 1956; úplný překlad včetně tří dopisů Němcové – 1972)
Jan Neruda: **Matce**, **Naše hodiny** a **Útěcha** (1960), **Kam s ním** (1963)
Josef Nesvadba: **Blbec z Xenemünde** (1971)
Stanislav Kostka Neumann: **O bitevním poli v nás** (1960)
Jaroslav Seifert: **Řip v okně** a **U jednoho hrobu na Olšanech** (1960)
Olga Scheinpflugová: **Karanténa** (1975)
Jiří Weil: **Život s hvězdou** (1967)
Jiří Wolker: **Samota**, **Epitaf** a **Poutník si říká** (1960)

El la elĉeĥigitaj eldonaĵoj de Kei Kurisu

li planis, kion ĉion li devas ankoraŭ verki kaj traduki, mia admiro de li fortiĝis pli kaj pli. Tiam mi ekkomprenis, kiel juna povas resti homo eĉ post sia okdekjariĝo, se li vivas pli per siaj planoj ol per rememoroj.

Kun lia malfacila vivo, kial li fariĝis konvinkita komunisto (kio videblas ankaŭ el la elekto de la verkoj de li tradukitaj), sed ankaŭ kial li poste malmembriĝis de la japana komunista partio kaj multo el liaj spertoj de tradukisto eblas ekscii el la libreto *Co mi dala česká literatura* (Kion al mi donis la ĉeĥa literaturo*).

Dum sia lasta vizito de Prago en la jaro 1996, post la finiĝo de la UK, Kei gastis unu semajnon ĉe mi, do ni havis bonan eblon eĉ pli proksime amikiĝi dum vesperaj diskutoj. Li ĝojis pro la invito al la praga kastelo, sidejo de la ĉeĥa prezidento. Kiam ni eniris en la laborĉambron de la prezidento Václav Havel, lin tre impresis la japana torijo sur la muro ĉirkaŭ la enirejo, rekte kontraŭ lia labortablo. Li nur bedaŭris, ke li ne povis renkontiĝi kun la prezidento mem, ĉar tiu estis dume eksterlande. Sed kun lia sekretario ili agrable babilis, sed mi ne scias pri kio, ĉar ili miasurprize parolis japane.

Lastan fojon mi renkontiĝis kun mia amiko Kei dum la UK en Jokohamo en la jaro 2007. Konsiderante lian aĝon mi supozis, ke ni vidas nin lastan fojon, kio bedaŭrinde plenumiĝis. Mi do strebis ĉerpi de li avare kiom eble plej multe el lia vivoelano kaj konservi tiun heredaĵon kiel

* Ĝi aperis ankaŭ en Esperanto: https://katalogo.uea.org/index.php?inf=7285



Lasta foto kun Kei Kurisu

eble plej longe. En siaj 97 jaroj li preskaŭ ne vidis, malbone aŭdis, irante lamis, sed lia intereso pri novaĵoj de mia eldonejo kaj situacio en Ĉeĥio pozitive skuis min. Kiam mi finfine trovis okazon demandi, kiel li fartas, kaj laŭ lia aspekto mi atendis aron da plendoj, mi estis eĉ pli surprizita. Li ekparolis pri tio, kion li verkas kaj kion li ankoraŭ volas fini, precize en la spirito de tio, kion mi admiris ĉe li antaŭ 13 jaroj. Ununura plendeto, kiun li esprimis, temis pri tio, ke li pro baldaŭa laciĝo devas ofte ripozi kaj tial la laboro progresas malrapide.

Mi mencios ankoraŭ unu eventon, kvankam ne mian propran, ĉar mi opinias, ke ĝi bone karakterizas tiun mian admirindan amikon. Post la UK en Jokohamo lin vizitis nia komuna belga amiko Jakvo en la hejmo de pensiuloj, kie Kei Kurisu loĝis kaj sekve sian travivaĵon rakontis al mi. Li atendis ĉe la akceptejo kaj rigardis al la lifto, sed Kei venis al li malrapide de la ŝtuparo kaj invitis lin supren. Jakvo tuj ekdirektis siajn paŝojn al la lifto, sed al tio Kei reagis *Se mi uzadus la lifton, jam longe mi ne plu estus vivanta.* Do ili ekiris malrapide surŝtupare; kaj surprize por Jakvo, kiu esperis, ke Kei loĝas en la dua etaĝo, kun paŭzoj ili daŭrigis la surŝtuparan ascendon ĝis la kvara.

Proksimume post unu jaro li ne plu reagis al miaj retmesaĝoj kaj sekve mi eksciis, ke li forpasis en sia aĝo de 99 jaroj. Lastan tempon li dediĉis sin al la japanigo de la verko de Jaroslav Hašek *Historio de la Partio de modera progreso en la limoj de la leĝo*, kion li ne plu finis.

NIKKÓ estas relative nova urbo kaj laŭ japanaj mezuroj trankvila (malpli ol 100 000 loĝantoj). Pro sia proksimeco al Tokio ĝi apartenas al la plej vizitataj ekskursoceloj. La plej famaj tieaj vidindaĵoj estas la sanktejoj Futarasan kaj Tóŝógú, kaj la budhana templo Rinnóĵi, kiu estas vizitinda ne nur pro tri unikaj statuoj de Budha, sed precipe pro belega ĝardeno Ŝójó-en.



Templo Rinnóĵi



Jukicuri en Nikkó

Tiun belan urbon mi vizitis en decembro, tial mi ne vidis por ĝi karakterizajn florantajn sakurojn, sed mi povis konatiĝi kun tre interesaj porvintraj arboprotektiloj jukicuri – lignajn konstruojn ĉirkaŭ kaj super ĉiuj malgrandaj arboj, kiujn ili protektas kontraŭ pezo de neĝo. Ili kaptis mian atenton pro tio, ke ili estas ne nur utilaj, sed ankaŭ tre plaĉaj.

Ni promenis tie kun afabla japana esperantistino, kiu veturigis min tien per aŭto. Ni promenis sen valizoj, kaj kiam ni revenis al la parkumejo, mia akompanantino eksciis, ke ŝi ne povas eniri la veturilon, ĉar ŝi ŝlosis la aŭtoŝlosilojn en ĝi. Tio

timigis min, ĉar mi havis ene ĉiujn aĵojn inkluzive de miaj pasporto kaj veturbiletoj. Ne gravis por mi, ke ni planis komune tagmanĝi okaze de nia adiaŭo, sed mi havis sidlokbileton por la trajno forveturanta je 15:00, se mi bone memoras al Sendai, kie devus min atendi alia loka esperantisto. Sed kiam mi vidis mian amikinon Ĥaose ĉirkaŭkuradi la aŭtomobilon kaj vane traserĉadi siajn poŝojn (kion mi ne komprenis, ĉar la ŝlosiloj estis bone videblaj en la aŭto), mia supozo, ke mia trajno forveturos sen mi, ŝanĝiĝis al certeco. Feliĉe post iom da tempo ŝi trankviliĝis kaj diris, ke ŝi trovis la telefonnumeron de sia edzo. Ŝi vokis lin kaj post proksimume unu horo li venis kun rezervaj ŝlosiloj. Do mi forveturis malsata, tamen per mia planata trajno kaj en la celstacio mi renkontiĝis kun plia japana esperantisto.

Klarigo por junuloj kial mi ne povis telefone informi lin pri eventuala ŝanĝo de mia plano: en la tempo de tiu mia travivaĵo ne ekzistis poŝtelefonoj funkciantaj en diferencaj retoj (aŭ almenaŭ mi ne posedis ĝin), tial mia poŝtelefono en Japanio ne funkciis (nek en Koreio). Mi do devis kredi, ke mi vojaĝante ĉiam renkontiĝos kun mia plia planata partnero je la difinita tempo en la difinita loko. Kaj tio ĉie bone funkciis.

Cetere, temis pri mia prelegvojaĝo por diversaj japanaj Esperanto-kluboj, organizita de Tokia Esperanto-Klubo (TEK) gvidata de sinjorino OOBA Ŝigeko. Ŝi preparis mian itineron perfekte kaj tiu prelegvojaĝo apartenis al miaj plej interesaj restadoj en Japanio, dum kiu mi havis bonŝancon viziti plurajn Esperanto-klubojn kaj gasti ĉe familioj de esperantistoj kaj bone konatiĝi kun iliaj hejmoj. En la sama klubo mi gvidis la konversacian Esperanto-kurson, kiun mi jam menciis pli frue priskribante diferencon de opinioj pri supo, ĉu ĝi estas manĝaĵo aŭ trinkaĵo. Kaj Ooba Ŝigeko ankaŭ organizis plurajn grupajn ekskursojn en Ĉeĥion kaj unu eĉ ligitan kun la kurso de Esperanto por siaj membroj, kion ĉion mi volonte preparis .Sed male, ŝi ankaŭ organizis postkongresan semajnan programon en Japanio por mia internacia grupo de esperantistoj post la UK en Seulo en 1994.

Kastelo **HIMEJI** en samnoma urbo kun iom pli ol 500 000 loĝantoj estas unu el la plej antikvaj konservitaj historiaĵoj, unu el tri japanaj kasteloj komplete konstruitaj el ligno. Pro sia blanko ĝi estas ofte nomata Kastelo de blanka agamio.



Ligna kastelo Himeĵi

Tiu kastelo interesis min ne nur pro sia pompo, sed ankaŭ pro kelkaj inĝeniaj instalaĵoj, kiujn mi neniuokaze volus elprovi. Vera frosto atakis mian dorson en la korto, kiu estis destinita por la samurajoj kondamnitaj al harakiro, do el kiu ne gvidis vojo reen. Tiurilate mi eksciis interesan informon, ke la japanoj ne uzadas la terminon harakiro (en traduko distranĉo de ventro); japane ĝi nomiĝas seppuku.

Sed kiel la traduko indikas, la kondamnita samurajo (ĉi-kaze, sed ekzemple kiel militkaptito aŭ alikiale memdecide por savi sian honoron) tranĉas sian ventron, kutime de maldekstre dekstren kaj se-



Korto por la kondamnitoj al harakiro



La internacia grupo de esperantistoj en 2007

kve ankoraŭ supren. Tiun memmortigon li faras duonkorpe nuda kaj por ĉiam fali antaŭen li interligas siajn genuojn per manikoj. La vizito de tiu efektive tre morna korto (ankaŭ per aspekto) kaj aŭskulto de rakontoj pri harakiroj ĉe mi superis la impreson de la kastela belegeco ĉirkaŭe.

HIROŜIMO – la novnaskita urbo. Tiun urbon kun la trista historio mi vizitis dufoje. Unuan fojon kiel gasto de geedzoj Moritaka kaj Taeko OŜIOKA, duan fojon kun la grupo de esperantistoj enkadre de la turisma programo antaŭ la UK en Jokohamo. Kaj ambaŭ vizitoj postlasis en mi neforgeseblajn rememorojn.

El la stacidomo de Hiroŝima mi veturis al la familia domo de Oŝioka per taksio. Mi donis al la ŝoforo la adreson, sed kiel mi ekkomprenis, ĝi ne sufiĉis kaj kiam ni alproksimiĝis, li devis demandi lokulojn. Unue mi pensis, ke estas strange, ke li ne prizorgas por si urbomapon (la navigacisistemoj ankoraŭ ne funkciis tiutempe), ja klaras, ke li ne povas koni ĉiujn stratetojn en tiu granda urbo.

En tiu kunteksto mi nun iom deflankiĝos de la temo Hiroŝima. Post jaroj mi rememoris tiun domserĉadon, kiam mi serĉis en Tokio novan domon



Parko de la Paco



Lernejanoj en Monumento de la Paco

de Joŝimi UMEDA. Al lia antaŭa loĝejo mi bone konis la vojon, sed li inter miaj vizitoj aĉetis familian domon, kiun mi celis la unuan fojon. Laŭ la urbomapo mi orientiĝis perfekte kaj ekvidis la ĝustan numeron de la domo, do senhezite mi eksonoris. Eliris iu por mi nekonata virino, kiun mi videble timigis. Mi sukcesis trankviligi ŝin, montris al ŝi la nomkarton de Joŝimi, sur ĝi la domnumeron, kaj la saman numeron ankaŭ ĉe ŝia pordo. Sekve ŝi montris per mano apudan domon, kiu, por mi nekompreneble, havis la saman domnumeron. Ĉi tiun misteron de la japanaj adresoj mi ne ekkomprenis. Kaj pri la taksiŝoforoj en Japanio



Policanoj en Hirośimo

mi ne plu miras, male ili havas mian admiron, ke en tiu ĥaoso ili kapablas veturigi siajn klientojn al la ĝusta celo. Ja en tiu ĉi sistemo eĉ la navigacisistemo ne helpos. Sed reen al Hirośima.

La domo de geedzoj Oŝioka troviĝas tutrande de Hirośima kaj ĉe ĝi estas eĉ malgranda (laŭ niaj mezuroj) ĝardeno, kio en Japanio ne estas kompreneblaĵo. La bonvenigo estis amika kiel ĉiam ĉe Esperanto-amikoj kaj iom da tempo post mia enĉambriĝo ni faris ĉe la vespermanĝo planon, kion mi povus dum la mallonga vizito vidi. Kompreneble kiel la unuan celon ni planis la viziton de Parko de la Paco kaj la Memoraĵon de la Atombombo.

Post la faligo de la atombombo la 6an de aŭgusto 1945, kiam en unu momento mortis 70 000 kaj ĝis la jarfino pli ol 140 000 homoj kaj la tuta urbocentro falis en cindron, kiel ununura domo en la epicentro rezistis Prefekteja palaco por industriaj ekspozicioj de la jaro 1915, kvankam ankaŭ ĝi estis damaĝita. Por mi ĝi estis interesa ankaŭ pro tio, ke ĝi estis konstruita laŭ la plano de la ĉeĥa arĥitekto Jan Letzel, kio ankaŭ estas klare indikita en la klariga surafiŝa teksto. Ĝis nun ĝi estas lasita en tiu duondetruita stato kiel averta atestanto de la detruemo de atomarmiloj.



Hodiaŭ estas Hirośimo moderna grandurbo

Taeko estas perfekta ĉiĉeronino kaj Moritaka veturigis nin per aŭto. Pro tio ni sukcesis en minimuma tempo ne nur trarigardi la Monumenton kaj la apudan bele aranĝitan Parkon de la Paco, sed ankaŭ iom ekkoni la ĉirkaŭaĵon inkluzive de la fama insulo Mijaĝima, kien ni revenis post proksimume dek jaroj kun la grupo de esperantistoj. Sed pri tio pli poste.

Survoje mi povis konatiĝi kun la benzinprovizado laŭ japana maniero. Ni enveturis en la benzinejon kaj tuj aperis du viroj kaj post mallonga dialogo kun la ŝoforino (verŝajne pri la kvanto da benzino) ili eklaboris. Unu ĉerpis la benzinon en la aŭtobenzinujon, la dua perfekte purigis ĉiujn fenestrojn kaj reflektilojn de la aŭto. Sekvis kliniĝoj, pago, denove kliniĝoj kaj forveturo, sen ke Moritaka devus malfermi la pordon.

Dek jarojn post mia vizito de la familio Taeko akompanis nian Esperanto-karavanon, inkluzive de la vizito de la insulo. Ŝia rakontado estis denove tre interesa; ne nur pri la tempo de la atombombo kaj ĝiaj postsekvoj, sed ankaŭ pri la sekvaj aktivadoj inkluzive de la pacaktivadoj, por kiuj ŝi tre engaĝigas sin. Krom alie, ŝi kolektas ĉiujare, precipe de esperantistoj el la tuta mondo, gratulleterojn okaze de la Internacia tago de virinoj, ĉiun jaron indikante alian temon, sed ĉiam porpacan. Tiujn ŝi tradukas en la japanan



Niktereŭto – regula vizitanto de geedzoj Osioka

kaj kune kun la tradukoj ekspozicias ilin en Hiroŝima. Krom tio dum la lastaj kvin jaroj ŝi staradas preskaŭ ĉiutage ĉe la memormuzeo kaj kolektas subskribojn de la vizitantoj kontraŭ la nuklea armado. Ŝi jam kolektis kaj transdonis al UN 111 000 subskribojn. Resume, temas pri mirinda kaj admirinda virino.

En la packomplekso estis multo por vidi. Kun ĝojo mi konstatis, ke ĝi estas celo de multaj grupoj de lernejanoj kaj ke la infanoj kun intereso sekvis la rakontadon de siaj instruistoj. La propra Paca Parko estas speciale aranĝita oazo de trankvilo, kiun jam denove ĉirkaŭas granda urbo kun pli ol miliono da loĝantoj.

Mi nepre volas ankoraŭ reveni al du interesaĵoj de la tempo de mia privata vizito de geedzoj Osioka. Kiel mi jam skribis, ili loĝas tute rande de la urbo kaj ĉiun vesperon ili havis interesan viziton, nome niktereŭton, kiu kompreneble ne venadis al ili hazarde, sed ĉar ĉiam falis al ĝi de supre iu bongustaĵo. Ĝi devas havi eksterordinare bonan aŭdkapablon, ĉar ĉiam ĝi aperis post ŝmacado.

La dua interesaĵo estas pripensinda. Mi rimarkis unumatene iom nekutiman fenomenon, nome ke la lernantoj portas krom la dorsosakojn an-



Lernejanoj matene



La unua celo survoje en la lernejon

kaŭ plastajn sakojn enmane. Kiam ĝi estis nur unu, mi supozis, ke temas pri la vestaĵo por lecionoj de korpoekzercado, sed kelkaj portis sakojn en ambaŭ manoj. Poste mi malkovris la kialon. Ilia unua celo estis rubaĵkontenero, kien ili enĵetis la plastajn sakojn kaj daŭrigis sian vojon al la lernejo. Ĉu tio estas nur loka fenomeno, aŭ ĉu tio estas kutimo ankaŭ en aliaj japanaj regionoj mi ne scias. Sed mian intereson kaptis ankaŭ la kontenero, kiu estis supre malfermita, tamen provizita per reto, por ke la rubaĵoj ne forflugu en vento. Sur ĝi pendis libere balaileto kaj ŝovelileto, por ke ĉiu, kiu ion forverŝas, povu tion post si purigi. Ĉirkaŭ la kontenero regis perfekta pureco.



Monto Misen

Ĉe tiu ĉi temo mi ankoraŭ iomete restos, ĉar tiun vesperon mi diskutis kun miaj gastigantoj pri la maniero de la kolekto de rubaĵoj. Min interesis, kiom ili pagas pro la rajto forĵetadi siajn rubaĵojn en la kontenerojn. Sed tio estis demando, kiun ili ne komprenis, precipe kial kaj al kiu ili devus pagi. Mi do klarigis al ili, ke ankaŭ ni ekĵetadas rubaĵojn en kontenerojn, sed por ilia forigado ni devas pagi al la urbo certan monsumon, difinitan de la urba konsilantaro, tial ĝia alto varias de unu al alia urbo. Al tio miaj gastigantoj reagis *Ĉe ni la sistemo estas alia. Ni pagas impostojn kaj estas ja la afero de la urbo, ke ĝi estu pura.* Mi ne plu strebis klarigi al ili, ke impostojn ankaŭ ni pagas …

INSULO MIJAĜIMA. Simia monto Misen. La supreniro al la pinto de la Simia monto Misen sur la insulo Mijaĵima estis por mi la plej forta naturtravivaĵo. Kiel mi jam menciis, ankaŭ al la insulo Mijaĵima nin akompanis Taeko, sed ne grimpis kun ni kuraĝuloj sur la pinton de la monto. Sed antaŭ nia ekiro ŝi provizis nin per utilaj informoj ĉe la tabulo kun mapo. Tiuj ŝajnis al mi superfluaj, ĉar mi vidis, ke la tekstoj en la tabulo



Taeko ĉe la turisma mapo de la ĉirkaŭaĵo de la Misen-monto



Klara indiko sur la vojmontrilo (almenaŭ la distanco)



Simia siesto



Serioza patro makako

estis dulingvaj, en la japana kaj en la angla, tamen pro dececo mi pacience ŝin aŭskultis.

Sed kiel dankema mi estis al ŝi, post kiam ni venis al la disvojiĝo, kie en la latina skribo estis nur la signo *km*, do ni eksciis, ke irante dekstren ni atingus la celon post 1,1 km, se maldekstren post 1,4 km, sed sen scio de la celo, kiun ni atingus. La ideo, ke irante al la pinto oni devas kutime iri supren, ne helpus, ĉar la padoj en ambaŭ direktojn gvidis supren. Danke al la instrukcioj de Taeko ni ĝuste dekstriĝis kaj post iom da tempo ni jam povis ĝui la belajn rigardojn de la pinto. Tie ni supozis renkonti simiojn, kion promesis la nomo de la monto, sed anstataŭe ni vidis tie paŝtantajn cervojn.

Post kiam ni iom satiĝis per rigardoj al la maro kaj al la sanktejo lokita en ĝi ĉe la bordo de la insulo, restis al ni ankoraŭ tempo por reveni al la disvojiĝo kaj sekvi la vojon al la dua flanko, kie situis la supra stacio de la telfero. Tie ni finfine renkontiĝis kun la simioj, nome makakoj, kiuj videble alkutimiĝis al la homoj kaj trankvile daŭrigis sian sieston en ilia najbareco.

Rigardo al la horloĝo sciigis al ni, ke se ni ne volas malsupreniĝi per telfero, kio estus sub nia turisma animo, ni devas tuj reveni. Per rapida malsupreniĝo ni atingis la grupon, kiu preferis kafejon, ĝuste en la planita tempo de la daŭrigo de nia komuna programo. Tie ni konstatis, ke ambaŭ grupoj estis konvinkitaj, ke ili trapasis la tempon en la plej bona ebla maniero.

Sanktejo Icukuŝima. La insulo Mijadžima estis destinita en pasinteco nur por ŝintoismaj dioj kaj do la homa piedo ne rajtis treti sur ĝin. Sed japanoj deziris esti en proksimeco de dioj, tial ili decidis konstrui tie sanktejon, tamen nekutime, por ne ĝeni la diojn. Kiam ili ne povis ĝin konstrui sur la insulo mem, ili konstruis ĝin sur la malprofundaĵo de la maro apud la bordo, kie oni anstataŭ la fundamento uzis fostojn enbatitajn en la fundon. Sed per tio ekestis problemo, ĉar oni ne rajtas eniri ŝintoisman sanktejon alimaniere ol tra torijo kaj la ununura permesita aliro al la apudborda sanktejo estis de la maro. Sed eĉ por tio oni trovis solvon. Oni konstruis grandan torijon, kiun devis traflugi ĉiuj ŝipoj celantaj la sanktejon. Kaj tiu torijo estas nun verŝajne la plej ofte fotografata objekto de la tuta Japanio.



Torijo – iam ununura alireblo al la sanktejo



Icukuŝima dum malalta tajdo



Artefarita insulo en Jokohamo, en la fono fama tragolfa ponto

Hodiaŭ la situacio estas alia. Kiel certe klaras el la antaŭaj alineoj, la insulo estas paradizo por turistoj kaj sur tiu iam sankta ŝintoisma grundo staras eĉ bela budhisma templo kun pagodo.

Por turistoj estas ĉi tie ankaŭ alia allogaĵo. Ĉar la sanktejo troviĝas sur plata malprofundo, en ĝia ĉirkaŭaĵo ekaperas dum ĉiu malalta tajdo plaĝo, en kiu turistoj kutimas promeni kaj serĉi konkojn.

JOKOHAMO estas la plej moderna urbo el la triurbo Tokio – Kawasaki – Jokohamo. En la bildo prezentiĝas artefarita insulo kun diversaj specoj de moderna arkitekturo inkluzive de amuzparko kaj en la fono mondfama tragolfa ponto el la jaro 1989. Duetaĝa, longa 860 m, larĝa 39 m, kun ses-koridora aŭtoŝoseo, interne sub ĝi ŝoseo por normala trafiko, tamen kun malpermeso de la uzo por etaj motorcikloj kaj piedirantoj.

Ĉielskrapulo Landmark estas (aŭ almenaŭ estis en la jaro 2007 dum la UK en Jokohamo) la plej alta ĉielskrapulo en Japanio. Hodiaŭ tio ne plu



Ĉielskrapulo Landmark en Jokohamo



Rigardo el Landmark al proksimaj ĉialskrapuloj



Nombroj de marŝantoj la 1an kaj 2an tagojn

validas, la plej alta ĉieskrapulo Abeno Harukas en Osaka pli altas je 3,6 m. Rigardante el la restoracio en la 69a etaĝo bele videblas, ke la proksimaj ĉielskrapuloj havas surtegmente alteriĝejon por helikopteroj. Tio certe necesas, ĉar mi ne povas imagi, kiel la urĝa kuracista helpo povus atingi iun en supra etaĝo precipe dum fajro, kiam ne eblas uzi lifton.

IML – Japana tritaga marŝo en Higaŝimacujama. Pri la IML-marŝoj mi jam skribis relative multe en la ĉapitroj pri Tajvano kaj Koreio, sed mi ne povas ĝin eviti ankaŭ ĉi tie. Ankaŭ en Japanio, same kiel en Koreio, kvankam por IML estas enkalkulitaj nur itineroj de minimume 20 km, ekzistis ankaŭ itineroj por familioj kun infanoj. Kiel videblas el la bildo, ekzemple la duan tagon partoprenis preskaŭ 29 000 marŝantoj. Malgraŭ tio, ĉar la organiza flanko estis perfekta, oni iris komforte sen krei iujn amasiĝojn de homoj.

Konsiderante la prezojn de la hoteloj ni volonte uzis la oferton de la organizantoj kaj tranoktis en unu el provizoraj amasloĝejoj en lernejo. Ankaŭ tio estis utila sperto, precipe ni povis vidi, kiel la lernejo estas kunigita kun belega ĝardeno, en kiu ne mankis lagetoj, nek ŝtonaj padoj. Kiu kontrasto



Amasloĝejo en lernejo



Lerneja ĝardeno



Ĉe ĉi tiu muziko neniu ekdormetis

kun la familiaj domoj, ĉe kiuj, se entute ekzistis ĝardeneto, do nur kelkaj kvadratmetroj.

Diference de la dutagaj internaciaj marŝoj en Tajvano kaj Koreio, tiu ĉi estis laŭnome tritaga marŝevento, sed fakte daŭris 4 tagojn, ĉar krom la itineroj enkalkulitaj en la IML, jam por la antaŭa tago estis preparita tre interesa dekkilometra marŝo tra kvietaj stratetoj kaj ankaŭ preter gravaj vidindaĵoj en Tokio inkluzive de la Imperiestra Palaco. Kaj el la adiaŭa vespero plej impresis la tambur-asembleo, ne nur pro ĝuo de ĝia tondrosimila muziko, sed ankaŭ de la elegantaj moviĝoj de la getamburistoj.

La sekvan tagon post la oficiala fino de la evento preparis la organizantoj fakultativan tuttagan busekskurson por la eksterlandaj partoprenantoj. Ĝia celo estis najbara turisme alloga gubernio Gunma, kie estas ankaŭ sidejo de la japana IML-organizanto nomata Gunma Marŝasocio.

Dum ĝi ni vizitis ekzemple Kaŝoozan, kiun nomon havas kaj la monto 1323 m alta, kaj la monaĥejo. Survoje ni ankaŭ preterveturis monton Osutaka en vilaĝo Ueno, kie okazis la 12an de aŭgusto 1985 granda akcidento. La flugmaŝino de Japan Air Line tie kraŝis kaj mortis 520 personoj, inter kiuj estis ankaŭ tre populara kantisto SAKAMOTO Kjuu. Lian



La monumento de IML

agrablan tenoron ni aŭskultis dumvoje en la buso. Sekve, impona estis la rigardo al la akvofalo Fukiwari, kiu ne falas el altaĵo al la tero, de kie ĝi povas esti rigardata, sed male ĝi falas el la nivelo de la ĉirkaŭaĵo en la profundon de la tero.

La tria halto estis en pomĝardeno, kie ni ne nur aŭskultis fakinformojn pri la utileco kaj kreskadmaniero de pomoj, sed ĉiu ankaŭ ricevis prunte tranĉilon; kial, tion mi komence ne komprenis. La kialo baldaŭ klariĝis. En la ĝardeno estis sufiĉa kvanto de ŝtupetaroj kaj siteloj kaj enkadre de la ekskurso ni ĉiuj povis rikolti kaj surloke manĝi



Deviga fotado ĉe la IML-monumento



Akvofalo Fukivari

ajnan kvanton de pomoj. Kaj nun venis vico al la tranĉiloj, ĉar ĉiuj per ili la pomojn senŝeligis. Mi preferus manĝi ilin kun la ŝeloj, kiel mi kutimas hejme, sed tie ankaŭ mi senŝeligis ilin, por ke mi ne estu rigardata kiel iu sovaĝulo, krome mankis tie eblo ilin lavi. Klare, se iu volis iujn pomojn aŭ ion el la oferto de pomproduktoj forporti, tion oni jam devis pagi.

Post mallonga paŭzo kun fotado ĉe la monumento de IML (Japanio kune kun Nederlando estis iniciatintoj kaj fondoŝtatoj de IML) ni vizitis socialan instalaĵon, kiu vere tre impresis min. Temis pri infanĝardeno kaj dumtaga prizorgejo



En pomĝardeno



La infanoj bonvenigis nin per flagoj

por maljunuloj, ambaŭ en unu domkomplekso. Tie dumtage vivis apud si la plej juna kaj la plej maljuna generacioj. Plejparton de siaj aktivecoj ili havis en apartaj ĉambroj, sed plurajn komune.

Kiam ni alvenis tien, jam ekstere bonvenigis nin la infanoj kun siaj instruistinoj kaj svingis flagojn de ĉiuj landoj, el kiuj alvenis la ekskursantoj. Mi atentigis tre ĝentile la instruistinon starantan ĉe la knabo svinganta la ĉeĥan flagon, ke tiu devus esti inverse, nome per la blanka strio supre. Mi emfazis, ke tio tute ne gravas por ni kaj ni estas plezurigitaj vidante nian flagon kaj ke mi diras tion nur, por ke ŝi sciu. Mi ne supozis, kion mi kaŭzos per tio! Ŝi komencis kliniĝante pardonpetegi pro la eraro kaj kiam mi finfine esperis, ke mi jam trankviligis ŝin, ŝi foriris flanken, ion diris al la infanoj kaj post la reveno sekvis la dua parto de ŝiaj pardonpetoj. Post momento reaperis la knabo jam svingante kun ĝuste fiksita ĉeĥa flago. Kaj la tria parto de la pardonpetoj flanke de la instruistino sekvis, kiam ni forveturis.

Profesoro Hiroomi KANNO estas koreisto kaj rusisto. Ni proksime amikiĝis, kvankam komence ni havis interese komplikan komunikadon. Li regas la anglan tiel, kiel ĝi estas kutime lernata en Japanio, do bone pasive por povi senprobleme legi la tekstojn, precipe fakajn, sed ne konversacicele. Kiel studento li estis vigla esperantisto kaj ankoraŭ kiel universitata asistanto li eĉ Esperanton instruis, sed poste venkis ĉe li aliaj interesoj kaj li asertis, ke li ĉion rilate al Esperanto forgesis kaj jardekojn havas neniujn kontaktojn kun Esperanto. Kaj se temas pri mi, la situacio similas rilate al miaj scioj de la rusa, kiun mi regis relative bone, sed pro jardekoj de neuzado mi ne kapablis esprimi miajn ideojn per ĝi. Do, li parolis al mi ruse, mi al li angle aŭ pli ofte en Esperanto. Sed mi devas konfesi, ke liaj konoj de Esperanto revenis al li pli rapide ol miaj de la rusa, do baldaŭ ni jam parolis preskaŭ nur en Esperanto kaj li la rusan kaj mi la anglan uzadis nur escepte kiel lingvajn lambastonojn por eviti eblan miskomprenon.

Ni amikiĝis ĝis tiu grado, ke ni ne nur renkontiĝis multfoje dum miaj restadoj en Japanio, kie li fariĝis mia fidela helpanto, sed ni havis eĉ renkontiĝon en Seulo dum unu el miaj restadoj en Koreio. Li ankaŭ gastis en mia hejmo kaj sekve eĉ lia filino venis en Pragon perfektiĝi en la aldoludo.

Malgraŭ tio, ke ni havis tre amikajn rilatojn kaj li alparolis min laŭ mia deziro per mia Esperanto-nomo, Petro, kiam mi provis alparoli lin



Profesoro KANNO Hiroomi ĉe la tombo de siaj gepatroj

Hiroomi, li ridetis kaj diris al mi, ke tiel alparolis lin lastan fojon lia panjo, kiam li estis ankoraŭ infano. Kaj li instruis min, ke japanaj plenkreskuloj neniam uzadas proprajn nomojn dum la reciproka komunikado. Li do plu restis por mi *profesoro Kanno*.

Dume mi ekkonsciis, kia diferenco estas inter la nuntempaj japanaj esperantistoj kaj la ceteraj japanoj kaj ankaŭ de esperantistoj antaŭ proksimume 40 jaroj, kiam ankoraŭ aktivis en Esperantujo prof. Kanno. Ja nun plejparto de miaj japanaj esperantistaj amikoj senprobleme uzadas en rilato kun eksterlandanoj siajn proprajn nomojn. Mi ne scias, ĉu oni uzadas ilin ankaŭ parolante inter si reciproke kiel dum internaciaj rilatoj aŭ ĉu ili restas ĉe la kutima japana alparolo *Familia nomo san* (*san* = sinjoro, sinjorino, kaj oni ĝin metas malantaŭ la nomon).

Ĉar profesoro Kanno havas familian tombon hazarde en Higaŝimacujama, li akompanis nin ankaŭ al la IML-marŝo. Tie mi vizitis kun li ne nur liajn budhisman tombejon kaj ŝintoisman sanktejon, sed ankaŭ kelkajn parencojn, do mi povis ekkoni ankaŭ hejmojn de neesperantistoj.

Mi mencios ankaŭ unu travivaĵon, kiam li gastis ĉe mi. Unu tagon ni komune vizitis familion de miaj amikoj en vilaĝo, en kiu la patro devenas



Sofie sukcesis ludigi profesoron Kanno

el Moldavio kaj do dum sia junuleco, kiam Moldavio estis parto de Sovetunio, li vizitadis rusan lernejon, kaj do ili senprobleme babilis. Dume la proksimume kvinjara filino Sofie atente rigardis la nekutime aspektantan *onklon* (verŝajne li antaŭe neniam vidis azianon) kaj post iom da tempo sen averto ŝi saltis en lian brakplenon. Tio videble embarasis lin. Ni do petis lian pardonon menciante, ke tio estas certe malagrabla por li, sed li reagis, ke male, nur ke li neniam renkontis tiel neformalan konduton de infano rilate al nekonato. Kaj li flankenmetis sian normale tre seriozan aspekton kaj ne nur, ke li eltenis ŝin en sia brakpleno, sed eĉ iom ŝercpetolis kun ŝi.

OOMOTO estas unu el pli ol kvardek novaj religioj, kiuj en Japanio ekestadis ekde la jaro 1800. Multaj el ili estas sinkretismaj kaj en ili miksiĝas elementoj de ŝintoismo, budhismo, konfuceanismo, taoismo, bahaismo kaj kristanismo. La plej konataj el ili estas Tenrikjo kaj Soka Gakkai, sed mi havis bonŝancon konatiĝi sufiĉe profunde kaj ripete kun la nova religio staranta sur la bazo de ŝintoismo, nome Oomoto, al kiu min venigis la fakto, ke ĝi havas proksimajn rilatojn al Esperanto. Ĝia moto estas *Unu Dio, Unu Mondo, Unu interlingvo*. Do ne rekte Esperanto, sed iu komu-



Ŝtono kun la moto de Oomoto en Kameoka

na internacia lingvo. Ĉar ununura vere funkcianta internacia lingvo estas nuntempe Esperanto, ĝi subtenas tiun. Tamen, jam la kunfondinto de Oomoto, DEGUĈI Onisaburo deklaris, ke en la nuna situacio, Esperanto estas la „unu interlingvo". Ne nur pro la lingvo mem, sed ankaŭ pro tio, ke ĝia iniciatinto, L. L. Zamenhof, havis idealajn motivojn, kiuj kongruas kun la motivoj de Oomoto. Kaj en la jaro 1923 li fondis Esperanto-Popularigan Asocion, EPA, kiu vigle agadas ĝis nun.

Unuavide estas certe strange aserti, ke Oomoto staras sur la fundamento de ŝintoismo, do konfesas multajn diojn, kiam ĝi deklaras ekziston de unu Dio. Nu, jes, oni konfesas en Oomoto multajn diojn, sed super ili staras unu la plej potenca, DIO Kreinto. Krom ĝi oni konfesas ankaŭ pliajn du kategoriojn de dioj, nome Regantajn Diojn en la ĉielo kaj sur la tero, kaj la plej malsignifaj estas la ceteraj dioj, kiuj estas ekzemple la mortintaj misiistoj, sed inter ili estas ankaŭ la kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof.

Oomoto estis fondita en la jaro 1892 fare de malriĉa vilaĝanino DEGUĈI Nao, analfabeto, kiu post sia iluminiĝo prenis penikon kaj komencis skribi. La rezulto estas fundamentaj skriboj, kiuj estas unu el la du bazaj sanktaj skriboj, nome *Instrukcioj pri Dioj de Oomoto*. La dua sankta skribo



Unufoja tranokto en tradicia japana ĉambro



Kaj mi tie dormis bone

estas *Rakontoj el la Spirita Mondo*, verkita de DEGUĈI Onisaburo, bofilo de Nao kaj edzo de la Dua Spirita Gvidantino.

Mi menciu almenaŭ du el la instruoj de Oomoto: *Bankjo Dokon*, kio signifas, ke ĉiuj justaj religioj devenas de unu fonto, kaj *Ĵinrui Aizen*, ke ĉiuj homoj estas reciproke fratoj, malgraŭ la diferencoj religiaj, naciaj, lingvoj ktp.

Certe interese estas, ke en la sanktaj skriboj de Deguĉi Nao estas priskribite, ke la spirita gvidanto de Oomoto estu virino, do efektive, ĝis nun la spiritaj gvidantoj de Oomoto estas ĉiam virinoj.

Post la jaro 1933 Oomoto trairis tre malfacilan periodon de sia ekzisto, ĉar ĝi estis ununura japana religio, kaj kune kun Komunisma partio de Japanio unu el nuraj du organizaĵoj, kiuj malferme kontraŭstaris la militistan politikon de la japana imperiestra monarĥio. Ĝia agado estis malpermesita kaj dufoje komplete detruitaj iliaj sanktejoj kaj centroj.

Nun Oomoto havas proksimume 180 000 kredantojn kaj du ĉefcentrojn, ambaŭ proksime de Kioto. Ajabe estas centro de spirita vivo, kie okazadas diservoj, interalie en tre moderna sanktejo Ĉosej-den, komplete konstruita el ligno. La dua centro, Kameoka, estas kleriga kaj misia centro, kie en granda parko troviĝas oficejoj, gastĉambroj, lernejoj, eldonejo, presejo, sed kompreneble ankaŭ sanktejo, kie okazadas diservoj kaj aliaj ceremonioj.

La unuan fojon mi havis bonŝancon viziti Oomoton en la jaro 1995 kaj estis tie kiel en alia mondo. Temis pri mia dua vojaĝo al Japanio, sed la unuan fojon mi venis en kontakton kun la japana tradicia vivo. Oni loĝigis min en la tatama ĉambro, tre modeste sed elegante meblita, kaj mi konatiĝis kun alia maniero de vivo, por mi surpriza kaj iam malfacila. Ofte io ŝajnis al mi kutime konata, sed post pli bona ekkono mi eksciis, ke tio estas tute alia. Kiel ekzemplon mi menciu kusenon, kiu aspektis same, kiel tiu en mia hejmo. Sed kiam mi tuŝis ĝin, mi eksciis, ke anstataŭ molaĵo ĝi estas malmola kaj susuris. Mi tuj deĉifris tion, ke ĝi estas plenigita per rizo, en Japanio ne nur ĉefa manĝaĵo, sed ankaŭ ofta materialo. Nur poste mi eksciis, ke la kusenoj estas kutime plenigitaj per fagopiroj ne senŝeligitaj, tial ili susuras.

Oni oficas ĉe malaltaj tabloj sidante surkalkane, kio por mi estis suferado. Kiam tio nur iom eblis, mi evitis tion eĉ sciante, ke tio estas minimume maldeceta.



En oficejo apud la ĉefo de Esperanto-Popularigа Asocio de Oomoto Takasi AGOU

En manĝejo, malgraŭ tio, ke temis pri memservejo kaj eblis elekti laŭ sia gusto, mi havis problemon, ĉar multaj manĝaĵoj aspektis por mi alloge, sed kiam mi gustumis ilin, mi apenaŭ povis gluti ilin ne nur pro tio, ke por mi ne kutimis la gusto, sed ĝi enhavis iun spicaĵon, kiu levis mian stomakon. Feliĉe tuj la unuan fojon mi iris tien en akompano de usona esperantisto Joel Brozovsky, kiu siatempe laboris en Oomoto jam plurajn jarojn kiel redaktoro de Esperanto-gazeto kaj instruisto de Esperanto. Li klarigis al mi, ke mi verŝajne havos problemon kun la manĝaĵo, same kiel li havis komence, sed ke mi neniukaze restigu ion nemanĝitan surtelere, ĉar tio estus konsiderata kiel nepardonebla peko. Kaj li afable proponis al mi, ke kaze de neeblo manĝi ion mi metu tion al lia telero. Tion mi volonte uzis kaj la unuan fojon preskaŭ ĉio krom rizo celis tra mia telero la lian. Sed pro atentema gustumado mi relative rapide alkutimiĝis kaj iuj nutraĵoj, komence ŝajne por mi nemanĝeblaj, komencis al mi eĉ bongusti.



Joel helpis rilate al manĝado ne nur al mi, sed post multaj jaroj ankaŭ al miaj grupanoj



Lerta teksisto



Lenka Bloudková sukcesis produkti eĉ vere belan ujon.

Se mi jam saltis al la restado ĉe Oomoto kun la grupo post multaj jaroj, mi ankaŭ menciu, ke oni prezentis al ni ankaŭ la tradiciajn metiojn, kiuj estas ĉe Oomoto zorge praktikataj. Dum la laboron de teksisto ni povis nur observi kaj vere admiri, la produktadon de ceramikaĵoj pluraj el ni povis ne nur provi, sed eĉ atingi sufiĉe bonan rezulton, kompreneble konsilataj de loka fakulo.

Prelego por la studentoj de liceo estis mia unua tasko ĉe Oomoto (aparte por la junulina kaj junula klasoj). Ili ĉiuj lernis ankaŭ Esperanton, sed la nivelo de iliaj scioj ne permesis sekvi prelegon, do ilia instruisto kaj mia kolego el la komitato de UEA Tacuo HUĜIMOTO (kaj ekde la vizito ĉe Oomoto ankaŭ mia bona amiko) tradukis miajn vortojn en la japanan. Sed prefere ol la enhavon de la prelego, kiun oni sekvis tre atente, mi menciu miajn embarasojn dum la alveno al la klasĉambro. Kiam mi venis kun Tacuo al la pordo, li petis min, ke mi momenton atendu, li eniris sola kaj fermis la pordon. Mi do atendis, kiam li revenos al mi, sed jam ŝajnis al mi la tempo tro longa, do mi iomete malfermis la pordon kaj ekvidis la studentojn kaj ankaŭ Tacuon surgenue, per kapoj direkte al la pordo, sed



Bonvenigo en la junulina klaso



Miaj junulaj aŭskultantoj

klinitaj al la tero. Mi do eniris kaj cerbumis, kiel agi. Se mi kliniĝus direkte ilin, ili ne vidus tion. Do mi dankis al ili por la bonvenigo kaj salutis – kaj kliniĝis nur post kiam ili levis siajn korpojn kaj rigardis min.

Klare mi interesiĝis pri la enhavo de la lernobjektoj kaj la longo de la kursoj. Per tio mi ekkomprenis, kial la knaboj kaj knabinoj devas esti disigitaj, ĉar ili havas komplete diferencajn studplanojn. La kursoj de junuloj daŭras elekteble unu aŭ tri jarojn kaj iliaj studobjektoj estas ekzemple studado de dia koncepto, historio de Oomoto, preparo de te-ceremonio, tradicia teatra kaj danca arto No, prizorgado de sabla ĝardeno ktp.

La junaj damoj havas la kursojn ĉiam dujarajn kaj la lernobjektojn tute diferencajn, inter ili ekzemple dekoraciado per floroj (ikebano), kudrado de kimonoj, kuirarto laŭ tradiciaj receptoj, ludado per tradiciaj kordaj instrumentoj kotó (sonanta iom kiel citro, longa iom malpli ol du metrojn, trans moveblaj pontetoj estas streĉitaj kutime 13 kordoj, sed povas esti eĉ pli; por ludi oni uzas dikfingron, montrofingron kaj mezfingron, sed eblas ludi ankaŭ helpe de plektro el elefantosto).

Tiurilate mi devas mencii ankoraŭ unu interesaĵon. La roloj de viroj kaj virinoj ĉe Oomoto estas tute diferencaj, ekzemple la te-ceremonion preparas nur viroj, same kiel nur viroj povas roli en noo-teatraĵo, ankaŭ en la virinaj roloj, instrumenton kotoo male ludas nur virinoj. Tamen tio, ke la roloj de viroj kaj virinoj estas apartaj, centprocente validas en grandaj ceremonioj. Sed en la lokaj Oomoto-centroj povas plenumi ĉiun rolon kaj viro, kaj virino, laŭokaze.

Eĉ la funkcion de pastoroj povas plenumi kaj viroj kaj virinoj. Tiel mi estis informita, sed dum miaj vizitoj ĉe Oomoto mi neniam renkontis en tiu rolo virinon. En tiu kunteksto ankaŭ estas menciinde, ke Oomoto ne havas profesiajn pastorojn. Kiu ajn trejnita membro povas plenumi tiun rolon.

Mi vizitis ankaŭ la kurson de Esperanto por infanoj gvidatan de Joel, kiu ne regas la japanan krom kelkaj ĝeneralaj frazoj. Li havis je dispono asistanton, kiu tradukadis liajn klarigojn japanen kaj lia metodo de instruado estis bazita je priskribo de bildoj, kiu ŝajnis al mi ne tro efika. Por iom da tempo mi transprenis la instrugvidon sen la asistanto per rekta metodo kaj per mia senarta pantomimumado mi komplete favorigis al mi la infanojn. Ili estis tre atentaj kaj ĝoje lernis la prepoziciojn. Per tio mi ne volas diri, ke mi estas pli bona instruisto ol Joel, sed nur ke tio estis



Kun la lernantinoj de Esperanto

por la infanoj agrabla ŝanĝo de kutima instruhoro, kion ili esprimis per sia entuziasmo.

Kameoka – diservo. Diservoj okazadas ĉiutage kaj ankaŭ mi partoprenadis ilin. Mi ne plu memoras la kialon, sed tuj por mia unua diservo mi malfruiĝis kaj venis nur post kiam ĝi jam komenciĝis. Mi rapide surgenuiĝis en la lastan vicon, sed rimarkis, ke kolego, kun kiu mi jam antaŭe parolis, ion geste montras al mi, kion mi deĉifris ke mi foriru, aŭ male ke mi venu al li. Mi atente ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis, ke maldekstre, kien mi viciĝis, estas nur virinoj, dum ĉiuj viroj estas dekstre. Do ne nur, ke mi eksidis iom pli komforte, kio estas permesite al virinoj, sed eĉ inter virinojn enviciĝis! Mi tuj transigis min al la porvira flanko, sed certe mi jam estis rigardata kiel vera ekzoto. Feliĉe ĉiuj estis, kiel japanoj ĝenerale, al fremdulo tre toleremaj kaj neniu montris al mi, kion li aŭ ŝi pri mi opinias.

Dum la diservo oni preĝas legante tekstojn, aŭ pli precize deklamante ilin kun emfaza disdivido de silaboj, do tio ŝajnis al mi kvazaŭ muzika stakato; kaj mi estis lernigita, ke gravas precipe klara elparolo de ĉiu



Ĉiutaga Diservo

silabo. Oni provizis min per la teksto skribita per latinaj literoj, do mi povis kunpreĝi, kvankam mi ne komprenis la enhavon de tio, kion mi deklamas.

Ekumenismo. Kiam mi prezentas Oomoton, mi devas mencii, ke min logas al ĝi ne nur ĝia pozitiva sinteno al Esperanto, sed ankaŭ ĝia ekumena agado en la plej vasta senco de la vorto. Enkadre de Oomoto aktivas ekumena misia asocio UHA (Universala Homama Asocio), fondita jam en la jaro 1925. Ĝi, fondita de Onisaburo Deguĉi, havas la sidejon en Kameoka kaj krom aliaj aktivadoj ĝi organizadas renkontiĝojn de reprezentantoj de diversaj religioj. Unu el la ĝis nun plej grandaj kunvenoj kun komuna preĝado por monda paco (ĉiu laŭ sia konfeso) okazis en Ajabe okaze de la malfermo de la nova sanktejo Ĉoosej-den en novembro 1993. Ĝin partoprenis kaj japanaj, kaj eksterlandaj reprezentantoj de diversaj religioj, nome kristanoj, budhistoj, islamanoj, taoistoj,, kompreneble ankaŭ ŝintoistoj inkluzive de la hejmaj oomotanoj, ktp. Tiel oni montris al la mondo, ke eblas venki religiajn, rasajn kaj naciajn diferencojn kaj dume konservi sian kredon kaj konvinkon.



Spiritaj gvidantoj de multaj religioj eniras la sanktejon Ĉoosej-den en Ajabe[*]

Ĉi tiun ekumenan agadon ne limigas Oomoto nur al la teritorio de Japanio, sed ĝi partoprenadas aktive ekumenajn aranĝojn en la tuta mondo. Kiel alian ekzemplon mi indiku la komunan katolikan kaj Oomotan diservon por militfalintoj kaj por la monda paco en Manila, la ĉefurbo de Filipinoj. Plia bela montro de la serĉado de subaroj ne de tio, kion la homojn kaj do ankaŭ la kredantojn disigas, sed ĉefe de tio, kio ilin kunigas.

Ĉar la agado de Oomoto plu interesas min, mi mencios ankaŭ pli freŝajn informojn, kiujn mi jam havas nur peritajn, ĉar mi vizitis Oomoton la lastan fojon en la jaro 2007. Mi ĉerpas ekzemple el la artikolo de la prezidanto de EPA, s-ro OKUWAKI Toŝiomi[**]. En la jaro 2016 Oomoto fondis Internacian Reton de Universala Homama Asocio, IRUHA. Ĝi ne estas formala organizaĵo, do ĝi ne havas siajn oficistojn, sed ĝi estas nur

---

* Fonto de la fotografaĵo: publikaĵo Universala Homama Asocio / Universal Love and Brotherhood Association, Oomoto, 1995 (kun afabla permeso de la eldonejo).

** IRUHA kaj Esperanto, Nova Vojo (ĉiumonata gazeto de Oomoto en Esperanto), 2020/6, p. 4-7 kaj 2020/7, p. 4-7.



Novgeedzoj

reto de kunlaborantaj religiaj organizaĵoj. En kadroj de IRUHA jam okazis tri gravaj interreligiaj kunvenoj, nome en 2016 en Bankoko, 2018 en Salajo (ambaŭ Tajlando) kaj 2019 en Tajpeo (Tajvano) En la jaro 2020 ĝi estis planita en Kameoka, sed pro la kovim-pandemio ĝi ne povis esti realigita.

Por la jaro 2023 estas planata en la sidejo de Oomoto internacia festeno de centjariĝo de EPA, al kiu ankaŭ mi estas invitita. Kvankam mi pensis, ke per mia deka restado mi jam miajn vojaĝojn al Japanio finis, tio iom konvinketis min. Kaj se mi ankoraŭ decidos realigi la 11an vojaĝon al Japanio, tio estos tutcerte lige al ĉi tiu festeno.

Geedziĝfesto. Mi havis bonŝancon, ke ĝuste ene de mia ĉeesto okazis en Kameoka tradicia geedziĝfesto laŭ la rito de Oomoto. Mi demandis la gefianĉojn pere de mia amiko Tacuo, ĉu mi ne ĝenus, se mi por mallonga tempo ĉeestus kaj farus kelkajn fotojn. Ili volonte konsentis kaj mi do povis ĉeesti kiel observanto – sed la programo estis tiel interesa, ke mallonga tempo iom longiĝis. La ceremonion gvidis ses pastoroj, unu el ili staris malantaŭ la novgeedzoj kaj sufloris al ili, kion ili diru.



Spirita preparo



Muzikistinoj

Ĉe la tabloj ordigitaj en la formo de la litero U, fronte sidis la novgeedzoj en specialaj nuptaj kimonoj, dekstraflanke la familianoj de la novedzo kaj maldekstraflanke de la novedzino. Flanke sidis muzikistinoj ankaŭ vestitaj per kimonoj, kiuj provizis la muzikan akompanon per tradicia japana korda instrumento jakumokotoo, simila al la jam priskribita kotoo, nur kun la diferenco, ke ĝi havas nur po du kordoj. Ankaŭ la ceteraj gastoj sidis flanke de la ĉefa U-forma tablaro.

Mi demandis mian akompananton Tacuo, ĉu la kompatinda novedzino devos esti vestita per tiu



okulfrape malkomforta kimono ĝis la malfrua vespero. Ne. Laŭ la klarigo, ŝi kutime dufoje ŝanĝas la vestaĵon. Por la propra festa ceremonio, kiun mi parte ĉeestis, ŝi portas specialan blankan nuptan kimonon kun kovrita hararo, en kiun oni vestas ŝin minimume unu horon kaj duonon kaj plian unu horon ŝin ŝminkas. Post la ceremonio ŝi vestiĝas por la nuptobankedo en koloran, jam pli simplan kimonon, kies survestiĝo daŭros nur proksimume duonhoron, kaj por la vespero en normalan civilan vestaĵon, sed tion ne ĉiam.

Mi volis transdoni al ili iun donacon, sed tiutempe restis al mi nur kelkaj bildkartoj de Prago. Mi do almenaŭ tiujn bele enpakis kaj antaŭ mia foriro mi iris al la novgeedzoj por bondeziri kaj danki al ili, ke mi rajtis parte observi ilian festan okazaĵon; kaj dume mi transdonis al ili la enpakitajn bildkartojn. Precize laŭ la japana etiketo ili kliniĝante tre dankis al mi pro la donaco, sed metis ĝin flanken enpakitan, pri kio mi fakte ĝojis.

Bicikla ekskurso. Kiam Joel dum nia babilado eksciis, ke mi estas ofta biciklanto, li invitis min al bicikla ekskurso en proksiman ĉirkaŭaĵon. Mi tre volonte akceptis tion, li provizis min per biciklo kaj ni ekstartis. Bedaŭrinde tuj komence ni devis uzi frekventatan straton, kie mi ne sentis min



Flosado sur la rivero Hozu



Bicikla ekskurso

sekura. La biciklo estis por mi maltaŭge malgranda kaj mi trovis min kvazaŭ sur malbone regebla kapro. Krome, la veturilvojoj ne havis vojborderojn kaj ili finis ĉerande per vertikalaj betonaj muroj de flankaj kanaloj kun akvo. Sed post mallonga tempo ni jam troviĝis en bela naturo kaj preter bambua arbareto atingis bordon de la rivero Hozu, kiun ĝuste flosis homoj en boatoj, kio estas tie kutima aktiveco. Tio estis por mi ŝatata rekompenco por iom stresoplena vojaĝo en la urbaj stratoj kaj mi estis tre dankema al Joel, ke li helpis al mi por kelkaj horoj liberiĝi de la iom formala medio de la centro de Oomoto al la moviĝo en naturo, kaj aldone ekkoni la belan naturon tiel proksime al Kameoka, kiun mi alimaniere ne estus eĉ supozinta.



Te-ceremoni-gvidantoj

Te-ceremonioj eniris Japanion el Ĉinio kune kun la zen-budhismo kiel medio por kontemplado kaj meditado super teo. Ili baldaŭ disvastiĝis ankaŭ inter la ŝintoismaj konfesioj kaj hodiaŭ ekzistas en Japanio multaj skoloj de te-ceremonioj. Ĉe Oomoto oni instruas kaj praktikas la skolon Ura-Senke. Krom ĉe Oomoto mi partoprenis post jaroj ankoraŭ modelan te-ceremonion en Tokio preparitan por turistoj (se oni diris al ni la nomon de la teo-skolo, mi ĝin forgesis), kiu estis tre simila, se ne la sama kiel Ura-Senke, kiun mi plurfoje partoprenadis ĉe Oomoto.

Te-ceremonia gvidanto en kimono "alvenas" surgenue. Post kiam sufiĉe varmiĝas la akvo en kaldrono (li ne rajtas lasi ĝin boli, ĉar tio rezultus al nebongusta teo) li verŝas iom de ĝi en la preparitan ujon kaj batmiksas per speciala batmiksilo la teo-pulvoron ĝis ĝi ŝaŭmiĝas kaj sekve li tre ceremonie enverŝas en ĝin plian varmegan akvon. Por la gastoj estas grave post la ricevo de la bovlo da teo rotaciigi la bovlon, kaj ankaŭ la speco de ĝia tenado per ambaŭ manoj. Antaŭ la teo oni estas priservataj kutime per unu aŭ kelkaj malgrandaj dolĉaĵoj. Oni diras, ke la maldolĉa teo gustas pli bone en kontrasto kun dolĉeco de frandaĵo, sed miaguste la frandaĵoj estis dolĉaj tro. Kaj kiel memkompreneblaĵon oni supozas la festan sidmanieron.

Dum mi partoprenis te-ceremonion kiel unu el la invititaj gastoj, mi tenis min laŭeble en la fono kaj mian sidmanieron mi ĉiam iel faciligis. Sed kiam unufoje okazis, ke la te-ceremonio estis organizita al mia honoro kaj mi sidis okulfrape kiel ĉefgasto, mi strebis elteni la sidon sur miaj maleoloj, kvankam miaj piedartikoj tute ne estas konvenaj por tio, ĉar mi ne kapablas rektigi ilin en miaj instepoj. La rezulto estis, ke iom da tempo mi tion eltenis, sed sekve la doloro permesis al mi eĉ ne ŝanĝi mian sidmanieron al la pli facila virina sido kaj iel mi kurbiĝis verŝajne kun tre bedaŭrinda aspekto, ĉar unu el la partoprenantoj foriris kaj revenis kun malgranda seĝo kaj proponis ĝin al mi. Tiumomente mi sentis min hontigita, tamen mi volonte akceptis ĝin kaj ekde tiu momento mi jam povis la ceremonion plenĝui.

Tiun travivaĵon mi rememoris post multaj jaroj, kiam mi denove ĉeestis la te-ceremonion ĉe Oomoto, sed tiutempe en Ajabe, kune kun la grupo de esperantistoj survoje al la UK en Jokohamon, kiam mi vidis kelkajn kolegojn peze solvi la saman problemon. Kaj mi admiris la trankvilon de la ceremonigvidanto, ĉar mi sciis, kion li sentas ekzemple kontraŭ la streĉitaj kruroj de iom dika amiko, kiu ne povis ekhavi alian pozicion ol teni sin per dorso al la muro kaj streĉi siajn krurojn antaŭen, do direkte al la ceremonigvidanto provizanta lin per teo. Sed tiu montris neniun malagrablan geston kaj nin ĉiujn li regalis per la dolĉaĵoj kaj teo tre elegante.

Mi estis informita, ke iuj instruistoj de te-ceremonio tiom zorgas pri la precizaj movoj preskribitaj de la skolo, ke ili forgesas pri la plej ĉefa celo de la te-ceremonio, nome ke la gastoj ĝuu ĝin. Ĉe Oomoto tiu ĉefa celo de te-ceremonio estas respektata. Do se gasto montras doloron pro la nekutima pozicio, oni komprenas, ke pro tio li ne povas ĝui la okazaĵon kaj la gastiganto ne ofendiĝas, se gasto ne povas sin movi aŭ sidi laŭ la priskribita maniero. Eĉ ofte oni ofertas al li seĝon, kiu kutime estas je dispono, kion mi priskribis ankaŭ rilate min.

En lernejo. Grandan impreson postlasis en mi la vizito de la baza lernejo Osada Hinaŝi en la urbo Jamagata. Mia akompanantino TAKAGI Akiko, kun kiu mi konatiĝis jam dum mia antaŭa vizito de Japanio en Japana Esperanto-Kongreso, tie instruis la anglan, kaj ŝi iom konatigis min pri la eduksistemo. En la baza lernejo estas infanoj de la sesa ĝis la 12a jaro, sekvas la dua grado nomata mezlernejo.



Leciono de kaligrafio



Junaj ĥemiistoj

Min plej multe interesis la instrumaniero de laŭ mi tre komplika sistemo de japana skribo. En la bazlernejo oni komencas per hiragana, kiun tamen jam multaj lernantoj kapablas legi kaj iuj eĉ skribi jam antaŭ la eniro en la lernejon. Sekve oni instruas al ili katakanan kaj iujn pli simplajn signojn de kanĵi kaj ekde la kvina klaso aldoniĝas ankaŭ romaĵi, kiel oni nomas la latinan skribon. Se temas pri la nombro kaj elekto de kanĵi, kiujn la lernantoj devas lerni, tiu iom diferenciĝas de lernejo al lernejo. Sed ekzistas 1946 bazaj signoj de kanĵi, kiuj estas uzataj en publikaj ĝeneralaj komunikiloj (gazetoj, ĵurnaloj),

kiuj kreas la bazon. Al tiuj ĉiam la instruistoj iujn aldonas. Do eblas diri, ke bona lernanto post la bazlernejo kapablas skribi proksimume 2000 ĝis 2500 signojn de kanĵi kaj legi ĝis 5000.

En la lernejo instruas proksimume la sama nombro da instruistoj kaj instruistinoj. La instrutempo daŭras de la 8a ĝis la 15a horo, lecionoj po 45 minutoj. Malgranda paŭzo daŭras 10 minutojn, granda 25 minutojn, kaj tagmeze estas unu horo por tagmanĝo, kiun por la infanoj prizorgas la urbodomo.

Mi havis bonŝancon konatiĝi kun la instruhoroj de kantado (la instruistino akompanis la infanan kantadon per fortepiano), de kuirado (dum kiu ĉiuj portis maskojn antaŭ la buŝoj kaj nazo), de ĥemio, kaj fine, kio plej kaptis mian intereson, mi ĉeestis la instruhoron de kaligrafio, do praktikado kiel skribi kanĵi, sed per peniko. Tion oni praktikis surplanke kaj oni proponis al mi, ke ankaŭ mi provu tion. Nu, mi provis, sed mi devas konfesi, ke ne tro sukcese kaj pro mia mallerteco la infanoj bele amuziĝis.

Meze de kuracistoj. Dum miaj vojaĝoj al Japanio mi vizitis du privatajn kuracejojn. Kun Masajuki SAJONĴI, kiu praktikis la Jumeiho-masaĝadon,



La teamo de SAIONJI Masayuki



Nun masaĝejo, vespere mia lito

mi konatiĝis jam antaŭe dum la UKoj, kie li regule prezentis sian arton forigi doloron de la korpa movaparato helpe de libervoluloj, kiuj neniam mankis. Li invitis min al sia privata kliniko en Tokio, kie mi povis sur unu el la masaĝmatracoj eĉ tranokti kaj havis eblon ekkoni laboron de li kaj de liaj kolegoj.

Min surprizis, ke la matracoj estas varmigitaj, sed ankaŭ, kiam mi prepariĝis por dormo, ke mi ne rajtis havi kapon ĉe muro, kiel mi planis. Mian demandon *kial* sekvis klarigo, ke pro oftaj tertremoj, kiuj povas faligi surplanken bildojn kaj ĉion, kio troviĝas surmure.

Iam nokte vekis min, ke la planko sub mi tremas. Mi ĉirkaŭrigardis kaj ambaŭ kolegoj, kiuj tie ankaŭ tranoktis, trankvile dormis, do mi estis konvinkita, ke tio estas nur psika reago al nia parolado pri oftaj tertremoj. Mi tamen rakontis tion matene al Masajuki kaj li reagis, ke li rigardos, ĉu vere estis tertremo aŭ ne. Li ŝaltis televidan kanalon dissendantan seninterrompe novaĵojn pri tertremoj kaj similajn, plejparte avertigajn informojn. Tiel ni eksciis, ke en la loko de la kliniko efektive okazis nokte tertremo, do ne temis pri mia sonĝo. Sed por lokuloj temas pri tiel ordinara afero, ke al ili tio ilian dormadon ne interrompis.

La dua privata kuracejo, kiun mi povis ekkoni, estis kliniko de ginekologo kaj akuŝisto KUNII Hjootaroo en la urbo Sagae. La kliniko estas tre bone kaj praktike ekipita, ekzemple per sufiĉe granda infanangulo por vizitantoj, kie povas infanoj antaŭ la enhospitaligo ludi kun siaj gepatroj kaj alkutimiĝi al la klinika medio. Krome estas tie ne nur kutimaj aŭtomatoj por trinkaĵoj kaj diversaj manĝaĵoj, sed ankaŭ skribotabloj kaj lavmaŝinoj.

Kun doktoro Kunii kunlaboras du virinoj, el kiuj unu estas lia edzino. Li havas ĉiutage multajn klientojn, do li laboras kutime de matene ĝis vespere. Dum ekzameno de estonta patrino li uzas du ekranojn, unu por si mem, la duan lokitan pli supre, por ke la patrino vidu sian bebon en la



Doktoro Hjootaroo KUNII kun la fratinoj

ventro kaj li povu doni al ŝi komentariojn rilate al tio kaj respondi ŝiajn demandojn.

Krom sia profesio li estas ankaŭ ĝisosta esperantisto kaj en la tempo de mia vizito li ĵus ekigis en sia kliniko malgrandan kurson de Esperanto, kiun partoprenis lia edzino, la dua fratino kaj unu patro kun filino. Mi ĉeestis unu lecionon kaj lia amuza metodo tre plaĉis al mi. Sed kio estis pli grava, estis la videble pozitiva efiko de ĉiuj kvar partoprenantoj. Mi supozis ĉe ili grandan probablon, ke ili ĉiuj atingos baldaŭ sufiĉe altan nivelon de scioj. Sed ĉu ili vere sukcesis, mi ne scias.

Privata agrikulturisto. Kiam mi venis al Yonezawa viziti la privatan agrikulturiston MURAOKA Kenji meze de decembro, mi ektroviĝis en montetara neĝigita pejzaĝo. Mia gastiganto atendis min en la stacidomo kaj veturigis min al sia vilaĝo Tamaniva, 20 km for de Yonezawa, kie loĝas proksimume 400 familioj. La centra ĉambro de la domo, kiun mi nomus loĝ-ĉambro kaj kiu fariĝis por tri tagoj mia hejmo, mezuris 12 kaj duono da tatamoj. En ĝi tuj kaptis mian atenton bela budhisma altaro en la muro granda certe pli ol unu kvadratmetro, sed ankaŭ ŝintoisma altaro lokigi-



Kenji MURAOKA klarigas al mi la kialon de la kvalito de lia rizo

ta tradicie subplafone. Tio inspiris min tuj ekparoli pri religioj, kiujn li kaj liaj familianoj konfesas.

Li respondis, ke la familio fakte konfesas firme neniun religion, tamen tenas la religiajn kutimojn kaj konsideras sin kaj budhistoj, kaj ŝintoistoj. Mian sekvan demandon, ĉu ankaŭ li preĝas, li respondis, ke jes, kvankam ne ĉiutage. Tamen sufiĉe ofte, ekzemple en datreveno de la forpaso de la gepatroj, geavoj kaj eventuale aliaj proksimaj parencoj, datreveno de la geedziĝo, sed ankaŭ en festotagoj de ambaŭ religioj. Kiel evidentiĝis, per *datreveno* de la forpaso li ne pensis unufoje jare, sed unufoje monate en ĉiu koncerna tago. Mi alvenis la 12an de decembro kaj lia paĉjo ĝuste preĝis ĉe la budhisma altaro, ĉar la 12an de iu monato mortis lia patro. Tial li preĝas la 12an tagon de ĉiu monato.

Antaŭ la preĝo oni ĉiam ofertas al la altaro la saman manĝon, kiun ili kutime manĝadas, kiel simbolan oferon. Kaj post kelkaj horoj, iam eĉ tuj post la preĝo, oni deprenas ĝin kaj normale ĝin konsumas.

Li gvidis min tra sia bieno kaj iom fiere klarigis al mi, ke li kultivas la rizon sen ĥemiaĵoj kaj vendas ĝin rekte al finkonsumantoj. Li provizas proksimume 100 familiojn, kiuj de li aĉetadas la rizon regule, kaj li sendadas ĝin al ili plejparte po 20 kg. Dum tiu tago li ekspedis 90 kg, kvar po 20 kaj unu dekkilograman. Krom la kultivado de rizo li posedas proksimume 100 kokinojn kaj nur por sia familio li kreskigas ankaŭ legomojn inkluzive de en Japanio ne tro kutimaj terpomoj. Mi demandis lin pri teo, sed pri ĝi li ne okupiĝas, ĉar en lia regiono ne estas konvenaj kondiĉoj por tio.

De li mi eksciis ne nur interesaĵojn kunligitajn kun la kreskigo de rizo, ĝia sekigo, senŝeligado, aŭ kial la blanka ne estas same sanprospera, ktp., sed ankaŭ kiujn problemojn li havas pri la domo, en kiu mi gastis. Ĝi havis tradician tegmenton el pajlo. En pasinteco, kiam oni hejtis per malfermita

fajropelvo, la fumo ĝin konservis kaj ĝi havis vivodaŭron multajn jarojn. Sed nun ĝi rapide putras kaj oni devas ĝin ĉiujare ripari, kio estas tre monpostulema. Krome, ankaŭ la plafonoj jam estas en mizera stato. Li ŝatus fari la rekonstruon kaj konservi la aspekton de la domo, sed tio estus tro multekosta, tial li elektis pli bonan solvon: li konstruigos por somero provizoran domon, malkonstruos la malnovan kaj anstataŭ ĝi konstruigos novan. Ĉio ĉi daŭros duonjaron, do antaŭ la vintro la familio jam enhejmiĝos en la nova domo. Li invitis min, ke mi venu post unu jaro tion kontroli, kion mi (kompreneble ne serioze) promesis.



Jukio ĉe la tablo preparita por matenmanĝo

En Ŝirabu-onsen en la montaro, proksimume 20 km for de Yonezawa, mi gastis ĉe ENDO Jukio, la 31-jara fraŭlo, finstudinto de la universitato en la fako historio de la japana ekonomio. Tamen, li laboras (aŭ almenaŭ laboris dum mia vizito) en la familia hotelo, kiun fondis lia avo kaj kiu nun estas posedaĵo de liaj gepatroj.

Jukio atendis min kun sia aŭtomobilo en la stacidomo de Yonezawa. Kiam ni traveturis la serpentumojn de la neĝigita montara ŝoseo per la rapido, kiu morttimigis min kaj mi petis lin iom malrapidigi la veturon, ĉar mi volus reveni hejmen vivanta, li ridetis kaj trankviligis min, ke mi ne devas timi, ĉar lia aŭto havas transmisiilon por ĉiuj kvar radoj kaj ke ĝi verŝajne ne jorus, eĉ se li volus jorigi ĝin. Nu, mi neniam ŝoforis tiuspecan aŭton kaj do mi trankviliĝis nur duone, tamen ne plu ĝenis lin per miaj timetoj.

Klaras jam de la nomo de ilia hotelo, enhavanta la vorton *onsen* (japana esprimo por termala fonto), ke ĝi logas turistojn al la termala baniĝo rekte en la areo de la hotelo. La propra hotelo havas 20 tradicie ekipitajn tatam-ĉambrojn kaj malgraŭ tio, ke la necesejoj kaj duŝejoj estas

komunaj trans la koridoro, la prezo por unu nokto estas komparebla kun tiu en luksaj modernaj hoteloj. Ĉar la posedantoj konscias, ke tiun tradician medion eksterlandanoj ne aprezus kaj ili ne pretus pagi la altan prezon, ili fokusiĝas nur al japana klientaro. Kaj ilia hotelo estas preskaŭ daŭre plenokupita.

Post la alveno kaj enĉambriĝo ni ĝuis teon kune kun la gepatroj, kiuj parolis nur japane, tamen ni povis danke al Jukio agrable komuniki. Unuan fojon mi vidis similan ordigon de manĝloko (kie ni ankaŭ matenmanĝis). Meze pendanta teujo kun la akvo, sub ĝi fajro de ligna karbo kaj ĉirkaŭe aro da malgrandaj teleroj kun diversaj kaj iuj por mi iam misteraj bongustaĵoj.

Naturaj kaj preskaŭ ĉiam subĉielaj termalaj banlokoj onsen estas en Japanio tre popularaj kaj ili troviĝas preskaŭ ĉie. Kutime ili fontas tiel varmegaj, ke oni devas la akvon malvarmigi, sed ĝi tamen restas miaguste nekredeble varmega. Mi jam spertis similan banlokon en Kameoka, kiam mi rapide elakviĝis ruĝa kiel kankro ne komprenante, ke al iu povas tiu brogado plaĉi. Rememorante tiun mian antaŭan sperton mi nun tre atente provis la akvon per dikfingro de mia piedo kaj ŝajnis al mi, ke la akvo bolas. Malgraŭ tio, post la instruado kiel en ĝi konduti, mi malrapide eniris, sed denove mi trovis en tio pli turmentadon ol ĝuon. Do mi ĝojegis, kiam mi estis denove ekstere.

Malgraŭ tio, ke la baniĝo en onsen ne fariĝis mia ŝatata aktivado, mi kun intereso konatiĝis kun la onsena etiketo. Tradicie oni eniras la akvon sen bankostumoj, plej ofte aparte virinoj kaj viroj. Estas interese, ke estis strikta malpermeso eniri la akvon por ĉiu, sur kies korpo troviĝis tatuado. Ĉu tio validas ankaŭ nun, kiam la tatuado estas tiel populara, ke ĝin havas preskaŭ ĉiuj junuloj, mi ne scias.

La sinsekvo de agoj post la enveno en onsenon estas strikte difinita. Unue oni eniras en ĉambron, en kiu oni demetas la vestaĵon en korbon (onidire ie ankaŭ en ŝranketojn, sed tion mi ne renkontis). Ĉe si oni konservas nur malgrandan tukon por viŝado de ŝvitaĵo de la frunto, prenas malgrandan seĝeton kaj siteleton por akvo kaj alpaŝas al muro, kie estas je dispono multaj fontoj de varmega, varma kaj malvarma akvo. La akvon oni kutime verŝas per siteleto al sia korpo. Ie oni havas ankaŭ duŝojn, tamen pro la tradicio oni plejparte preferas la siteletojn. Nur tiel purigita oni povas eniri la varmegan banejon.



Rizkampoj sub neĝo

Kiel superfluan mi konsideris la averton, ke mi ne rajtas tie resti longe, ĉar minacus sveno. Mia vivoinstinkto forpelis min el la akvo vere treege baldaŭ, malgraŭ tio mia korpo estis denove ruĝa. Tial mi tre volonte ripozis en la preparita kimono jukata kun taso da teo en la ĉambro servanta por la malstreĉiĝo post la banado.

Kiam Jukio veturigis min reen al la stacidomo, laŭ mia gusto denove tro rapide tra kurbiĝoj, ĉi-foje plej ofte sube dekliven kaj dum neĝado, mia sento de ne troa sekureco estis eĉ pli forta, sed mi ne plu komentariis tion kaj mi ĝojegis, kiam li haltis antaŭ la stacidomo. Tamen mi survoje rimarkis kelkajn interesaĵojn. Unuan fojon mi vidis rizajn kampojn sub la neĝotavolo, kio aspektis tre bele.

Eĉ pli kaptis mian atenton infanoj, kiuj piediris laŭlonge de la ŝoseo en lernejon. Ili iris unu post la alia en unu vico, la unua portis ruĝan flagon kun la surskribo skioj (kion mi lasis traduki, tamen skiojn portis nur kelkaj el ili), verŝajne do ili celis iun skikurson. Kaj ankoraŭ tria interesaĵo. Kiam mi kun Jukio venis matene al la aŭtomobilo, la diligenta paĉjo ĝuste finis, en densa neĝado, ĝian purigadon, do ni povis tuj enaŭtiĝi kaj forveturi.



Geedzoj Osioka sur la balkono de sia domo en Hiroŝimo – kun la plej granda ĝardeno

Familiaj domoj. Mi jam menciis, ke mi havis bonŝancon viziti dum miaj vizitoj de Japanio relative multajn hejmojn. Kiam tio estis ĉe neesperantistoj, do ĉiam en akompano de iu esperantisto, kiu gvidis kaj prezentis min tie kaj neniam mi restis ĉe tiuj sola. Kaj se oni ie ofertis al mi tranokton, temis ĉiam pri hejmoj de esperantistoj. Tiel mi ekkonis sufiĉe da urbaj loĝejoj, sed mi gastis ankaŭ en tri familiaj domoj de miaj tri amikoj, nome en Hiroŝimo, Kioto kaj Tokio. Mi nomas la lokojn, por ke estu klare, ke temis ĉiam pri domoj en grandaj urboj. En la vilaĝoj la situacio estas verŝajne alia, precipe se temas pri grandoj de ĝardenoj, sed tion mi ne havis okazon ekkoni. Mi lasas flanke miajn gastadojn en la farmo, en la kliniko kaj en la familia hotelo, ĉar tio estas alia kategorio de loĝado.

Ĉiuj tri familiaj domoj estis komplete el ligno. Kiam al ili apartenis ankaŭ ĝardeno (krom tiu en Tokio), do temis nur pri kelkaj kvadratmetroj kaj tamen la prezo de la grundo estis pli alta ol tiu de la konstruo de nova domo. Ĉiuj fenestroj estis flankenŝoveblaj, same kiel preskaŭ ĉiuj pordoj. Krome, la pordoj estis por mi danĝeraj pro sia alto de 180 cm, do mia kapo ricevis plurajn batojn, antaŭ ol mi lernis kliniĝi antaŭ ĉiu trairo. La ŝtuparoj

estis por mi nekutime krutaj, por ke ili ne bezonu tro da spaco, plafonoj laŭ niaj eŭropaj mezuroj malpli altaj, ĉe la plafono malaltaj lustroj kun ŝaltiloj pendantaj de ili malsupren. En ĉiu en la vizititaj domoj oni havis unu solenan tatamo-ĉambron kaj banejon, kiu en du kazoj najbaris kun kuirejo.

La banejo konsistis el bankuvo plenigita de varma akvo kaj kovrita, por ke la akvo ne malvarmiĝu, ĉar ĝin oni post la banado ne elfluigas. Tial ankaŭ mi ricevis klarigon, ke ĝi ne servas por korpa lavado, sed por malstreĉiĝo. Antaŭ ol eniri la akvon oni devas bone lavpurigi sin per sapo apud la bankuvo kaj nur poste engliti en ĝin kaj tie forigi de si la streĉon.

Mi povas resumi, ke la familiaj domoj ne estis grandaj kaj estis modeste, sed agrable ekipitaj, tre racie proponitaj kaj estetike plaĉaj. La restado en ĉiuj el ili postlasis ĉe mi pozitivan impreson (la ŝvelaĵoj sur mia frunto jam malaperis).

Hejtado laŭ la japana maniero. Verŝajne klaras jam de la antaŭa teksto, ke oni lasas en bankuvo varman akvon por ripeta uzo, ke en Japanio oni tre ŝparas energion. Al tio decas aldoni informojn pri la rilato de japanoj al hejtado de ĉambroj.



Tipa japana hejtilo



Vizito ĉe neesperantistoj



Ĉefe havi piedojn en varmo

Vintro en Japanio ne estas simpla por mezeŭropano dorlotita de bone hejtitaj hejmoj kaj sento, ke la loĝejo povas esti komforta nur se en ĝi estas agrabla temperaturo. Kvankam mi hejme ne troigas la intenson de la hejtado, kiam mi venis al Japanio en decembro, mi supozis, ke mi mortfrostos, precipe ĉar mi ne estis por tio preparita. Fenestroj estas por mi surprize ne tro varmizolitaj kaj la hejtadon oni uzadis aŭ neniun, aŭ porteblajn petrolajn hejtilojn, kiuj provizas iom da varmo, sed multe pli da fiodoro. Kiam mi petis, ĉu mi povus ricevi por nokto ankoraŭ unu kovrilon, anstataŭe mi ricevis tiun fonton de iom da varmo kaj pli da malagrabla odoro.

Alian ekzemplon mi montros de la vintra vizito de parencoj de prof. Kanno. Ili ne hejtis, sed estis ekipitaj kontraŭ malvarmo alimaniere. La tableto, ĉe kiu oni sidadis kaj ankaŭ ni sidis dum nia vizito, havis pezajn kurtenojn ĝis la tatami-planko kaj sub la tablo estis en la planko kavaĵo por piedoj. Kaj sur la korpoj havis niaj gastigantoj dikajn pulovrojn el lano. Mi surhavis nur maldikan pulovron, do kvankam mi havis piedojn en varmo, mi sentis sufiĉe malagrablan malvarmon. Mi ne scias, ĉu en Japanio estas energio tro multekosta, kio tamen ne kongruas kun la malbone izolitaj fenestroj, aŭ ĉu temas simple pri ilia vivokutimo kaj ili estas pli harditaj ol mi.



Ekonomia sistemo de necesejo

Ne estas necesejo kiel necesejo! Tio validas en Japanio ĝis ekstremoj. Eĉ en tokia oficejo de malgranda firmao mi renkontis necesejon similan al tio, kion oni nomas, almenaŭ en Ĉeĥio, „turka necesejo“, kiun oni uzadas sidante kaŭre. Sed ĝi havis alian formon kaj iom da tempo daŭris al mi antaŭ ol mi ekkomprenis, ke oni devas eksidi super ĝin ne en la direkto al la pordo, kiel en tiu turka, sed male, al pordo per dorso. Feliĉe ĝi havis akvoŝprucon, sed tiu efikis iam eĉ tro, do la planko estis malseka. Tial la kaŭĉukaj pantofloj ĉe la pordo estis tre utilaj.



Eĉ necesejen penetris elektroniko

La dua speco de necesejo kaptis mian atenton per spaca ŝparo kaj ekologio. Ĝia genieco baziĝas je tio, ke la lavpelto estas samtempe kovrilo de la gargarilo, kiu pleniĝas post gargaro per la akvo fluanta el la krano tra lavpelto. Do la tutan tempon, ĝis la gargarilo komplete pleniĝos, la akvo estas je dispono por lavi al si la manojn.

La tria speco de necesejo, kiun mi renkontis ne nur en hoteloj, sed eĉ en privata hejmo, estas tre, se ne tro aŭtomatigita. Ĝi enhavas multajn funkciojn, kiuj tamen restis al mi plejparte kaŝitaj, ĉar la surskriboj ĉe ĉiuj regiloj estis nur en la japana. Pri la plej bazaj funkcioj mi estis instruita, eĉ mi memoris, kiel por mia komforto agordi malmolon (aŭ ĉu molon?) de la sidtabulo kaj ĝian temperaturon, sed kiel ŝanĝi la necesejon al bideo kaj pri pliaj funkcioj mi prefere ne demandis por ne forgesi tiujn plej bezonatajn, kiel gargari, ktp.

Paĉinko. Antaŭ ol skribi pri la ludejoj paĉinko mi menciu, ke en Japanio estas laŭjure strikte malpermesitaj hazardaj ludoj, do nenie vi trovos klasikajn hazardludejojn, eĉ ne hazardludajn ludaŭtomatojn. Tamen tie ekzistas tre popularaj hazardludejoj paĉinko, kiun oni trovas eble en ĉiuj urboj kaj



Ludejo paĉinko



Venu al paĉinko

kiuj estas nepretervideblaj pro sia trolumigo kaj ofte ĉarmaj knabinoj antaŭ la pordo en naciaj kostumoj logantaj preterpasantojn eniri. Tiuj bele vestitaj knabinoj estas ĉarma, tamen laŭ mi nenecesa reklamo. En ĉiuj tri paĉinko-ludejoj, kiujn mi vizitis, estis ĉiam ĉiuj ludlokoj okupitaj.

En la antaŭa alineo vi certe trovos kontraŭdiron kaj ĝin trovis en miaj diskutoj ankaŭ mi, tial mi komencis strebi malkovri la nelogikaĵon, ke en la lando kun strikte malpermesitaj hazardaj ludoj, eĉ konata per strikta obeo de la leĝoj, povas ekzisti tiel okulfrape lokitaj hazardaj ludejoj. Kaj espereble mi

malkovris la kialon. Sed unue mi klarigu la principon de la ludo: la ludaŭtomatoj laŭ turno de la radeto elpafas ŝtalajn kugletojn en ludkampon, kie ili faladas en truojn, kiuj malfermiĝas tute hazarde. Klaras, ke jam pro la uzita materialo, nome ŝtalo, en ĉiu ludejo estas neimagebla bruego. Onidire origine temis pri rezervaj kugloj el kuglolargoj produktitaj en Ĉeĥio, kiuj restis superfluaj en treega kvanto post kiam oni ĉesis uzadi tiujn largojn; tiun informon mi havas el japana, tamen nepruvita fonto. Ĉar krom la bruo estis en la ludejoj dense fumigita aero, mi neniam restis tie longe kaj rapide fuĝis eksteren. Cetere, la ludantoj kutimas ŝtopi siajn orelojn, kelkaj onidire eĉ per la kugloj.

Kaj jen nun al la paradokso, la malpermesitaj hazardaj ludoj kaj tolerata paĉinko. Dum la kuglojn por la ludado eblas aĉeti en aŭtomatoj lokitaj rekte en la ludejo, la gajnitajn kuglojn oni ne povas tie ŝanĝi al mono. Aŭ la gajninto akceptas ofertatajn gajnobjektojn (preskaŭ neniam), aŭ li portas la kuglojn en najbaran kioskon, kie oni ŝanĝas ilin por mono. Se iu gajnis multe, iu dungito de la ludejo helpos al li ilin porti. Ie oni eĉ faciligas tion, ke anstataŭ la kuglojn oni ricevas senvalorajn ĵetonojn, kiujn oni iras ŝanĝi en la kioskon por la mono. Per tio oni pruvas, ke dum la paĉinko-ludo oni ne celas gajni monon, do ne temas pri hazarda ludo. Kaj tio, ke la najbara kiosko, en kiu oni ŝanĝas kuglojn aŭ ĵetonojn por mono, havas la saman posedanton kiel la paĉinko-ludejo, jam la protektantojn de la leĝo ne interesas. Mi eĉ aŭdis, ke ĉiujn paĉinko-ludejojn regas la japana mafio, sed ĉu tio estas vero, eĉ se nur parte, mi ne scias.

Ankoraŭ unu rimarko al tiuj ludejoj. Dum miaj unuaj du vizitoj de ili mi vidis ĉe la aŭtomatoj nur virojn, sed dek jarojn poste jam ankaŭ virinojn. Malmultajn, tamen. Do ankaŭ ĉi tie videblas ioma emancipado de japaninoj.

Kapsulaj hoteloj. Ĉi tiu japana inventaĵo de onidire komforta kaj samtempe spacoŝpara kaj favorpreza tranokteblo ŝtonmirigis min. Mi ne suferas je klostrofobio, tamen loĝigon en tiuspeca hotelĉambro, kies grandeco estas 200 x 100 x 100 cm mi ne kapablas eĉ imagi. Tial mi tuj strebis ekscii, kiu kreas ilian ĉefan klientaron. Kiel mi trovis, ili estas tre popularaj kaj plej multe uzataj flanke de oficistoj, kiuj sidas ĝis malfruvespere en siaj oficejoj (ofte nur pro tio, ke ankoraŭ ne foriris la ĉefo, do esti je dispono por okazo, ke li bezonus ion de ili). Kaj ĉar ne plu valoras veturi hejmen nur



Kapsula hotelo



«Ĉambro» en kapsula hotelo

por tranokti kaj frumatene revojaĝi, ilia kutima vojo el la oficejo gvidas tra restoracio aŭ paĉinko-ludejo en la plej proksiman kapsulan hotelon – kaj de tie matene reen en la oficejon.

Al ĉiu dormspaco apartenas ankaŭ ŝranketo por valizoj, sed ĝia grandeco ne antaŭvidas vojaĝvalizojn. Ĝi pli rememorigas ŝranketon por vestaĵo en vestodeponejo de iu gimnastikejo. Nek restoracio, nek alia manĝejo estadas en tiuspecaj hoteloj, sed kiel ĉie en Japanio estas tie pluraj vendoaŭtomatoj, kiel por trinkaĵoj tiel ankaŭ por manĝaĵoj pretaj por rekta konsumado.

La propraj kapsuloj, do spacoj por dormi, estas kutime tri super si, ili ne havas fenestron, nur vitran pordeton kun la eblo de mallumigo de interne per rulkurteno, kaj ili estas ekipitaj per klimatizilo, televidilo, retsignalo kaj telefono.

Fervojo. En Japanio preskaŭ ne ekzistas fervoja ŝarĝtrafiko. Sed kiel estas ĝenerale konate, Japanio estis la unua lando, kiu komencis konstrui reton de altrapidaj trakoj inter grandurboj nomatan ŝinkanzen (en traduko spina trako). Kvankam la esprimo ŝinkanzen estas nomo de la sistemo de trakoj, iam ĝi estas uzata ankaŭ por la trajnoj, kiuj trafikas sur tiuj trakoj.

La veturbiletoj estas kompare kun Eŭropo pli kostaj, sed por eksterlandaj turistoj ekzistas fervojaj pasportoj por minimume sep, maksimume 21 tagoj, kiuj ebligas vojaĝadon en la tuta fervoja reto, kaj kiuj validas ankaŭ por iuj aŭtobusaj kaj ŝipaj linioj. Tiuj estas pli favorprezaj, precipe se oni volas fari longajn vojaĝojn. Tiun eblon ankaŭ mi uzadis, kiam mi antaŭvidis trajnadon dum mia planata restado en Japanio. Ununura problemo de tiu sistemo estas, ke oni ne rajtas aĉeti ĝin en Japanio, sed oni devas alveni kun jam anticipe aĉetita pasporto, kiun oni surloke nur ŝanĝos je reta vojaĝbileto. Do oni devas decidi jam planante la vojaĝon, kiom multe oni uzados trajnojn kaj ĉu valoras aĉeti la fervojan pasporton aŭ ne.

La trajnoj estas tre komfortaj kaj krom la rapideco estas por ili karakteriza neimagebla precizeco. Kiel ekzemplon mi menciu, ke kiam mi staris foje kun mia japana amiko surkaje kaj atendis mian trajnon, mi aŭdis ripete iun anoncon, kiu ŝajnis al mi la sama, sed kiu estis nur en la japana, do mi ne komprenis. Kiam mi demandis mian amikon, kion oni daŭre ripetas, li klarigis al mi, ke oni tre pardonpetas, ke la trajno al-



Perfekta sistemo de samtempa el- kaj envagoniĝo

venos eksterordinare je du minutoj pli malfrue kaj petas laŭeble rapidan entrajniĝon.

Dume mi ankaŭ rimarkis, kian saĝan sistemon ili havas por rapide eliri kaj eniri la trajnon, por ke la trajno restu en la stacio laŭeble mallonge. Sur la kajo estas desegnitaj lokoj kun la numeroj de la vagonoj, en kiuj je centimetro precize haltas la trajno, kaj kie estas ankaŭ du sagoj, unu direktita en la vagonon, do tiuflanke oni envagoniĝu, la dua el la vagono, do tie oni lasu liberan spacon por elirantaj pasaĝeroj. Tiel oni samtempe kaj eniras, kaj eliras, kaj ĉio okazas flue, senĥaose kaj sen kurado surkaje kaj serĉado de via vagono – kio eĉ ne eblus, ĉar la vagonaroj estas tre longaj.

La trajnoj trafikas en nekredeble mallongaj intervaloj, ekzemple inter Tokio kaj Osako dum la plej frekventaj horoj po ĉiuj 5 minutoj, tamen estas tre ofte ĉiuj sidlokbiletoj disvenditaj.

Mi ne povas elteni la tenton mencii en tiu kunteksto fervojan aventuron de mia amiko profesoro Kanno, kiam li gastis ĉe mi kaj veturis la unuan fojon al mi memstare el Prago al Dobřichovice, kie mi atendis lin vane en la stacidomo, ĉar li ne alvenis per la interkonsentita trajno. Sed post mallonga tempo vokis min vendistino de la sukeraĵejo en Černošice (5 km de Dobřichovice direkte al Prago), ke tie estas iu japano kun mia nomkarto. Mi do veturigis lin de tie per aŭto kaj survoje mi eksciis, ke li



Japanaj hobiaj fiŝkaptistoj

vidis, ke ĉiuj stacioj nomiĝas *VÝCHOD* (elirejo), do li eltrajniĝis laŭ la tempo de la alveno de la trajno al Dobřichovice, kion li havis de mi skribite surpapere. Kaj nur post kiam la trajno forveturis, li eksciis, ke li estas aliloke ol en sia celo. Nu, alia lando, alia ne nur sistemo de fervojoj, sed ankaŭ pensmaniero de pasaĝeroj.

Amatora fiŝkaptado laŭjapane. El la enurba trajno en Tokio mi vidis ĉe unu stacio interesan scenon, nome basenojn, probable fiŝakvujojn kaj ĉirkaŭ ili sidantajn fiŝkaptistojn sekvantajn siajn hokŝnurojn. Tion mi trovis ege nekutima kaj ĉar mi estis akompanata de loka esperantisto, mi demandis, ĉu li scias, pri kio temas. Li diris al mi, ke tio estas relative nova maniero de amatora fiŝkaptado. Ĉu temas pri fiŝakvujoj, de kiuj oni sekve veturigas fiŝojn en vendejojn, aŭ ĉu ili servas nur al ĉi tiu celo, li ne sciis, sed li klarigis al mi la principon. Post pago de iu monsumo estas la alvenanto provizita per fiŝkaptista ilaro kaj laŭnecese instruata, kaj sekve li povas komenci sian fiŝkaptadon. Post kiam li bonŝancas kapti fiŝon, li fiere lasos sin foti kun ĝi kaj sekve la fiŝo estas metita reen en la akvon kaj atendas, ĝis ĝi fariĝos fotomodelo por plia sukcesa fiŝkaptisto.



Kun Joŝimi en konstruata edukcentro

Joŝimi UMEDA. Jam enkonduke mi menciis, ke antaŭ mia neatendita vojaĝo en Koreion mi eĉ ne kapablis imagi, ke simila ŝanco povus iam ripetiĝi kaj ke mi ankoraŭfoje celos la Foran Orienton. Tial mi volonte akceptis inviton de mia japana amiko Joŝimi Umeda reage al mia informo pri la planata vizito al Koreio, ke mi, estante tiel proksime, saltetu ankaŭ al Japanio, kie li montros al mi ĉion laŭ miaj preferoj. Malgraŭ tio, ke mi havis tiutempe problemojn kun la liberiĝo por pli longa tempo, la propono estis por mi tiel alloga, ke mi al la restado en Koreio aldonis ankoraŭ tritagan viziton de Japanio.

Joŝimi estis la unua japano, kun kiu mi konatiĝis kaj amikiĝis. Ni estis kolegoj en la komitato de UEA kaj ĉar mi estis tiutempe (komence de la naŭdekaj jaroj de la 20a jarcento) senata sekretario de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), sub mia influo ankaŭ Joŝimi komencis tie aktivi. Sekve li eĉ havis grandajn planojn koncerne kunlaboron kun AIS, ĉar tiutempe li komencis konstrui en Japanio klerigan centron, kiun li jam antaŭ ĝia finkonstruo proponis por organizado de aziaj studsesioj de AIS. Do ne mirinde, ke post kiam mi vizitis lin, li fiere gvidis min al la konstruaĵo de tiu estonta edukcentro.

Danke al Jošimi mi ankaŭ registriĝis kiel vojaĝoficejo kaj eĉ akiris la licencon de vojaĝĉiĉerono. Komence venis demando, ĉu mi pretas por la grupo de japanaj esperantistoj, kiujn Joŝimi gvidos al la UK en Vienon aranĝi interesan turisman programon en Prago, inkluzive de prizorgo de hotelo, manĝoj ktp. Mi konsentis kaj baldaŭ venis plia deziro. Unu paro el la grupo volas en Prago geedziĝi. Mi ne imagis, kiujn malfacilaĵojn mi kaŭzos al mi pro la konsento ankaŭ pri tiu deziro.

En la urbodomo, kie la ceremonio devus okazi, oni ne volis permesi, ke ĝi okazu ĉeĥe kaj en Esperanto: aŭ en la ĉeĥa kaj japana, aŭ ĉeĥa



Gastado ĉe geedzoj Umeda



Tri prelegoj de Joŝimi en la ĉeĥa

kaj angla. Tion ne volis akcepti la novgeedzoj, ĉar ili invitis esperantistojn el multaj landoj, kiuj koincide estis en Prago pro la oficiala antaŭkongreso antaŭ la viena UK. Do nur post kiam mi demandis, ĉu la tasko de la atestantoj estas tiel formala, ke ili eĉ ne devas kompreni, kion ili subskribos, la oficistino cedis kaj la ceremonio estis interpretata laŭ la deziro de novgeedzoj ĉeĥe-esperante, kio kontentigis la plenan ceremonian salonon plenan de esperantistoj el 20 landoj el ĉiuj kontinentoj.

Ili deziris tipe ĉeĥan geedziĝfestenon, do ni preparis ĝin por ili en

vilaĝa restoracio kaj por la transporto mendis historiajn aŭtomobilojn. Pro tio ili estis tiel entuziasmigitaj, ke en la mendo de dua geedziĝfesto en Prago post kelkaj jaroj, tiuokaze de la filo de Joŝimi, la mendo jam enhavis aŭtoveteranojn.

Sed la ĉefa kialo, pro kiu mi saltis el Japanio al Prago, estas la antaŭtagmeza okazaĵo antaŭ la propra oficiala geedziĝceremonio. Ĝi laŭ mi bone montras konduton de japana oficisto rilate al sia ĉefo. Kvankam mi transdonis al la japana ambasadorejo ĉiujn bezonatajn dokumentojn ĝustatempe por ricevi konfirmojn de iliaj validecoj (ke la instancoj, kiuj ilin pretigis vere rajtis pri tio), malgraŭ miaj urĝigoj mi ne havis ilin eĉ matene antaŭ la ceremonio.

Mi do veturis al la japana ambasadorejo batalpreta por ricevi la konfirmitajn paperojn tuj, ĉar miaopinie oni devas kompreni la gravecon. Sed mi eksciis de la oficisto, kiu traktis kun mi surkoridore, ke tio ne eblas, ĉar ununura persono, kiu rajtas tion subskribi estas mem la ambasadoro, sed li tiumomente ne ĉeestas. Feliĉe li menciis, ke la ambasaroro estas en sia rezidejo. Al tio mi reagis, ke mi veturas tien, ĉar mi estas konvinkita, ke li havos pli da empatio rilate al la novgeedzoj kaj venos kun mi subskribi la dokumentojn.

Post tio okazis io, kion mi neniam vidis. La oficisto komencis tremi pro timo kaj balbuti, ke tio ne eblas, ke mi neniukaze sukcesos renkonti la ambasadoron kaj al mia *ne zorgu, mi sukcesos, eĉ se mi devus surgenuiĝi en koto* kaj mia gesto, ke mi foriras, li ektremis eĉ pli kaj diris, ke mi atendu, ĉar li kunvojaĝos. Li foriris, sed post momento li reaperis kun dokumentujo enmane, ni eksidis en taksion, kiu atendis min antaŭ la domo kaj veturis al la japana rezidentejo. Tie mi vidis la duan parton de lia prezentaĵo. Minimume kvinfoje li kontrolis, ke li havas ĝuste butonitan jakon kaj per moviĝo de la plej granda timemulo li proksimiĝis al la pordo kaj post iom da hezito li eksonoris.

Eble nurajn du aŭ tri minutojn post kiam li malaperis en la domo, li denove reaperis, sed li aspektis tute alimaniere. Li transdonis al mi la dokumentojn kun la heroa fiero de venkanto en olimpikaj ludoj. La famkonata japana masko komplete fiaskis, kaj pro la timo de sia plej alta ĉefo, kaj sekve pro la ĝojo de la sukcesa fino.

Mi ne volas aserti, ke tio estas kutima timo de la ĉefo por plejparto de japanoj. Mi ne scias, ja mi travivis tion nur unufoje kaj eĉ en Prago kaj ne

en Japanio. Eble tiu oficisto estis nur escepto el la regulo, ke japanoj tamen ĉiam havas la maskon, kiu kaŝas ĉiujn iliajn emociojn. Ĉu?

Sed reen al Joŝimi. La kunlaboro inter Joŝimi kaj AIS koncerne la aziajn studadsesiojn en Japanio ne efektiviĝis, ĉar la planitan edukcentron li ne finis, sed ĝi tamen estis finita kaj nun ĝi apartenas al JEI. Do la celo, ke ĝi servu al esperantistoj, restas konservita. Post ĝia finiĝo mi ne plu vizitis ĝin, sed mi kapablas ĝin imagi, ĉar ĝi havas tre informriĉan kaj belan retejon*.

Same kiel kaze de la korea profesoro Lee, ankaŭ kaze de Joŝimi tre kaptis mian intereson liaj prelegoj. Tial ankaŭ lin mi petis pri la kopirajto, kiun li volonte disponigis al mi kaj mi eldonis tri laŭ mi la plej interesajn, nome *Lingvaj kaj kulturaj problemoj en internaciaj komercaj rilatoj*, plue *Religia vivo de japanoj – religia labirinto kaj religia paradizo* kaj *Kiel sukcese komerce trakti kun japanoj* en unu libreto. La unuajn du tradukis el Esperanto Karel Kraft, la trian el la angla Michaela Chrdlová. En la titolpaĝo de la libreto pozas mi kun Joŝimi, lia edzino Setuko (ankaŭ esperantistino) kaj lia asistanto.

Etsuo MIYOSHI estas plia el miaj japanaj amikoj, al kiu mi devas dediĉi apartan subĉapitron, kiun postulas ne nur lia fruktodona agado, sed ankaŭ nia kunlaboro. Longe li estis prezidanto (nun estas honora konsultanto) de la firmao SWANY produktanta ĉefe gantojn kaj valizojn, sed ankaŭ la plej malgrande faldeblan rulseĝon.

Mem handikapita, Etsuo elpensis kaj patentigis *Swany-bag* (korpoapogan marŝantan valizon), kiu krom kutimaj radetoj kaj manteniloj por simpla transporto enhavas ankaŭ muntitan seĝeton ebligantan iam ajn kaj ie ajn ripozon. Ĝi fariĝis komerce tre sukcesa produkto de SWANY.

Mi amikiĝis kun Etsuo, kiel kun multaj aliaj japanoj, danke al Esperanto. Etsuo estas ne nur membro de Oomoto, sed estis eĉ la direktoro de la Esperanto-Populariga Asocio ĉe Oomoto, sed dum miaj vizitoj de Oomoto mi ne renkontis lin. Mi konatiĝis kun li dum UK iam komence de naŭdekaj jaroj de la dudeka jarcento kaj niaj personaj renkontiĝoj okazis ankaŭ sekve nur dum UKoj.

Kiel sukcesa entreprenisto kaj ĝisosta esperantisto Etsuo fariĝis ankaŭ subtenanto de Esperanto, kiu inter alie fondis proprakapitale en la jaro 1995 la fonduson Cigno finance aprezantan ĉiujare la Esperanto-Asocion

* https://jacugatake.jei.or.jp/e-domo-internacie.htm



Mia renkontiĝo kun Etsuo Miyoshi ene de UK en Jokohamo en la jaro 2007

el EU, kiu plej efike kontribuis al informado pri Esperanto. Plue, li ankaŭ financis en multaj landoj plurajn tutpaĝajn gazetarajn anoncojn, en kiuj li klarigis la avantaĝojn de Esperanto kiel komuna helpa lingvo. En ĉi tiu kampo komenciĝis ankaŭ nia kunlaboro. Mi helpis al li aperigi la anoncon en la ĉeĥa en populara tutŝtata ĵurnalo Právo.

Loĝurbo de Etsuo Higaŝikagaŭa en la insulo Ŝikoku estas tradicia „urbo de pupoj", kie ĉiujare ekde la 17a de februaro okazadas pupfestivalo. Merite de Etsuo tie ekestis Muzeo de Pupoj, en kiu li helpe de esperantistoj kolektis pupojn el multaj landoj de la mondo. Mi mem kontribuis per sendo de tipaj ĉeĥaj mane produktitaj pupoj, nome de arbara koboldo, sorĉisto, sorĉistino, muzik-vagabondo, avino kuracherbistino kaj nikso, kun klarigaj priskriboj, bildkartoj kaj pliaj eksponaĵoj.

Eblus ankoraŭ multon skribi pri la admirinda persono Etsuo Miyoshi, sed mi fine menciu almenaŭ tion, ke li ricevis multajn honorigojn, el kiuj certe elstaras la pola Kavalira Kruco por propagando de Esperanto en EU laj la Ordeno de Leviĝanta Suno de la japana registaro en la jaro 2013.





Verko de V. Vinař en la ĉeĥa kaj en Esperanto

La skandalo pro Jozefo. Grandan impreson kun praktika sekvo postlasis ĉe mi la renkontiĝo kun la diligenta tradukanto Esperanto-japana, IKAI Josikazu. Dum nia parolado li montris al mi ankaŭ sian tradukon de la libro de Valdemar Vinař *La skandalo pro Jozefo*, kiu aperis en la tempo, kiam Vinař pro politikaj kialoj ne rajtis publici. Do la libro aperis nur en Esperanto kiel aldonaĵo al la permesita gazeto *Paco*. Temas pri netradicie prilaborita malnovtestamenta rakonto pri Jozefo kaj diversrigardataj atestoj de kvin rolantoj en la fuĝo de Jozefo de la Potifar-edzino kun ŝia histeria kriaĉo de la malhonorigita virino kaj ties postsekvoj.

Kiam mi vidis tiun libron de la ĉeĥa aŭtoro kaj esperantisto en la japana, mi eksentis, ke kiel la ĉeĥa eldonisto kaj esperantisto mi havas moralan devon eldoni ĝin ankaŭ por la ĉeĥa legantaro. Bedaŭrinde la aŭtoro ne ĝisvivis la tempon post la falo de komunismo ĉe ni, kiam li denove povus publici, tial ne eblis, ke li mem verku ankaŭ la ĉeĥan version. Tial mi devis, post permeso de lia edzino, trovi tradukanton, ĉi-kaze tradukantinon Renata Mauserová. Tial la verko de Vinař aperis ankaŭ en la ĉeĥa, precipe merite de la japana tradukanto Yosikazu Ikai. Sekve mi eldonis ĝin en la formo de bindita libro ankaŭ en Esperanto.



Nia grupo preparita konkeri altodiferencon de pli ol 1600 m ĝis la pinto de Fuĵi

Ek al la sankta monto Fuĵi. Dum miaj naŭ antaŭaj vojaĝoj en Japanion mi ĉiam almenaŭ de malantaŭe vidis la monumentan kaj por japanoj sanktan monton Fuĵi, japane *Fuĵi san*, ofte nomata en nejapanaj fontoj Fuĵi jama. Tio postulas klarigon. Monto estas japane *jama*, sed estas kelkaj montoj, konsiderataj kvazaŭ sanktaj, kiujn tiel nomi estas minimume nedece. Tiujn oni nomas *san*, kio validas kompreneble unuavice pri la plej alta kaj plej monumenta monto de Japanio – *Fuĵi san*. San estas japane sinjoro, do la kompleta nomo de la monto estas en traduko Sinjoro Fuĵi.

Sed reen al mia naŭfoje nerealigita revo iam povi supreniri al la pinto de tiu sankta majesto, atinganta la alton de 3776 m super la marnivelo. Dum la planado de mia deka vojaĝo, kun la grupo celanta la Universalan Kongreson de Esperanto en Jokohamo kun antaŭa semajna turisma programo mi provis tiun mian revon realigi. La avantaĝo estis, ke la unuan fojon mi veturis tien en la akompano de perfekta profesia ĉiĉerono kaj japanologo vivanta en Japanio David Hochman, do mi konfesis al li mian deziregon kaj demandis lin, ĉu li vidas almenaŭ iom reala la eblon envicigi post la kongreso elekteble supreniĝon al la monto Fuĵi. Mi kredis, ke inter



Tiun tumulton ni vere ne atendis

32 partoprenantoj de la flugkaravano mi ne restos unusola interesiĝanto. David surprizis min per sia komplezo; ne nur, ke li trovos eblojn, sed eĉ ke li volonte grimpos tien kune kun ni.

Mi konsciis iujn riskojn, tial en la oferto de tiu aldona surmonta ekskurso mi postulis subskribon de ĉiuj aliĝintoj, ke ili konscias, ke ne temas pri oficiala programero de la karavano, sed nur helpo al individua programo de ĉiu partoprenanto kaj ke ĉiu el ni tien iras proprariske. Fine ni ekstartis 12 (inkluzive de David), sed kvar survoje rezignis kaj revenis, tamen ni ok kuraĝuloj atingis la pinton.

David preparis ĉion perfekte. Sabate je la 12a estis fino de la kongreso kaj ni jam havis sidlokbiletojn por la buso forvojaĝonta el Tokio je la 22a horo. Fakte en la sama tempo startis multe da aŭtobusoj. Ĉiu el ili celis iun el kelkaj elirpunktoj por la piedatingo de la pinto de Fuĵi. Tiu nia veturigis nin al unu el la plej alte lokitaj elirstacioj, sed eĉ el ĝi atendis nin nivelodiferenco de pli ol 1600 m. Ni iris dumnokte, ĉar laŭ la informoj la klaran elrigardon el la pinto eblas ĝui nur dum la sunleviĝo kaj maksimume du horojn post ĝi, sekve la tuta pejzaĝo vualiĝos en nebulon kaj oni povas vidi sub si nur nubojn.



Eĉ la averto pri falantaj ŝtonoj la lacajn grimpantojn ne fortimigis

La vetero estis tre amika, sed la elekto de la tago por la supreniro ne, sed ni ne havis elekteblon. Ne nur, ke temis pri la nokto de sabato al dimanĉo, do la plej konvena por la laborantaj japanoj, sed krome la veterprognozo estis tre favora, pro kio elveturis el Tokio onidire duoblo de la aŭtobusoj ol en aliaj sabatoj. Tial atendis nin surdeklive vera tumulto de grimpantoj. En la elirstacio ni atendis laŭ la rekomendoj preskaŭ unu horon pro alkutimiĝo al la alto kaj poste jam enviciĝis en la procesion de turistoj kaj komencis supreniri.

La pado estis plejparte bone irebla, tamen en kelkaj partoj oni devis grimpi rokojn; kaj kvankam ankaŭ tiuj estis relative bone sukceseblaj, pro la amaso da homoj tio tre malrapidigis la vojon kaj oni devis plurfoje eĉ sufiĉe longe atendi.

Ĉe la unua ripozstacio mi rimarkis, ke oni vendas botelojn kun oksigeno. Ĉar mi neniam antaŭe estis en simila supermara alto, mi pripensis, ĉu unu aĉeti, ĉar mi suferis pro astmo (tamen havis la lastan astman atakon antaŭ pluraj jaroj) kaj kvankam mi kunhavis en Japanio enspirilon, tiun mi lasis en la hotelo. Post momento de pripensado mi venis al la decido, ke mi prefere ne eksperimentu, ĉar mi ne scias, ĉu, kaze ke mi havus spirpro-



Kratero de Fuĵi

blemojn, la oksigeno helpus aŭ male ĝin eĉ plimalbonigus. Feliĉe mi havis dum la tuta vojo neniujn spirproblemojn.

Preter la pado estis krutaj deklivoj kaj se ie troviĝis iu eĉ malgranda ripozeblo, tuj ĝi estis okupita de iu, kiu nepre bezonis paŭzon, kaj kiu pro la amaso da homoj kaj mallarĝa pado alimanere ne eblis. Eĉ ne gravis por ili dulingvaj avertoj *Atentu, falantaj ŝtonoj.*

Nia grupo baldaŭ disfalis, ĉar la pli kapablaj strebis traiĝi antaŭen por atingi la pinton dum bona videbleco kaj male, kion mi jam menciis, kelkaj turniĝis en la unua ripozstacio kaj revenis al la elirstacio. Mi do komplete perdis trarigardon pri ili kaj nur devis kredi, ke ni ĉiuj ree renkontiĝos en la difinita tempo ĉe la aŭtobuso, por kiu ni havis sidlokbiletojn por revojaĝi al Tokio.

Survoje mi komprenis, kial plejparto de japanoj surhavas maskojn antaŭ la buŝo kaj nazo, kaj iam havas kovritan eĉ la tutan vizaĝon escepte de la okuloj. Baldaŭ ni havis fajnan lafopulvoron ĉie kaj ĝi eliris el mi dum nazpurigado kaj tusado ankoraŭ plurajn tagojn. La situacion iom ilustras la foto de nia germana kolego Hariolf Traib kaj la japanino en la fono.



Lafa pulvoro ne gluiĝis nur al la vizaĝo, sed ĝi trapenetris eĉ en internaĵon

Rilate al la vetero ni estis eksterordinare bonŝancaj. Kiel ni eksciis de tiuj, kiuj revenis, ankaŭ ili povis ĝui la belajn rigardojn al la ĉirkaŭa pejzaĝo, kvankam el malpli alta nivelo, ĉar David elektis por ni la supreniron de la sudorienta flanko. Tamen, la rigardoj, kiuj estis preparitaj por ni sur la pinto, estas neforgeseblaj kaj ili vere valoris la penadon kaj senton de



La rigardo de la pinto



Aŭtoro de la libro surpinte de Fuĵi

malvarmo eĉ en varmaj jakoj. Kvankam mi kun mia partnerino atingis la supron nur dum jama taglumo, la sunleviĝon ni povis ĝui survoje kaj ankaŭ de la pinto ni vidis klare lumigitan pejzaĝon. Kaj eĉ dumvoje suben nin akompanis suno, kvankam la fame konata nebulo ankaŭ aperis, sed nur en eta skalo kaj la ĉirkaŭaj montopintoj elirantaj super ĝin ankaŭ bildigis nepriskribeblan poezion.

Post la trarigardo de la kratero kaj ĝuo de mallonga promeno sur la pinto kun la rigardoj al ĉiuj flankoj ni ekis la reiron.

Feliĉe la padoj supren kaj suben estis unudirektaj, tiu suben eĉ pli komforta, do la tempo bezonata estis malpli longa. Sed ĉe la buso min atendis malagrabla surprizo. Unu el niaj germanaj partoprenantoj ne revenis al la buso ĝis ĝia forveturo. David sukcesis ŝanĝi la sidlokbiletojn por kelkaj el ni por la lasta forveturanta buso, por ke ni povu lin atendi, sed li ne revenis eĉ ĝis tiam. Do mi havis neniun alian elekteblon ol reveni sen li kaj ni konsiliĝis, kion fari, ja ni havis por la sekva tago flugbiletojn por hejmeniĝi. Mi obeis la konsilon de David, ke ni atendu ĝis matene, ĉu li reaperos kaj nekaze ni informos policon kaj germanan ambasadejon kaj devos forflugi sen li. Verŝajne mi ne devas priskribi miajn sentojn kaj ke mi malgraŭ la

laceco post la grimpado kaj la antaŭa sendorma nokto ne dormis ankaŭ la lastan nokton en Jokohamo.

Feliĉe nia perdito antaŭ mateno reaperis. En unu ripozstacio survoje suben li pretervidis montrilon kun surskribo identa kun tiu sur lia papero, kiu devigis lin flankeniĝi, kaj li venis en alian elirstacion, kiel li diris tute samaspektan kiel tiu nia, do li ne tuj malkovris sian eraron kaj vane serĉis nin kaj nian aŭtobuson. Kiam li ekkonis sian eraron, en neniu aŭtobuso al Tokio estis libera loko por li. Tial li devis veturi nokte en la hotelon per taksio. Mi ne kapablas imagi, kiel simila okazaĵo evoluus, se lialoke estus iu sen kapablo komuniki angle kaj sen havi ĉe si pagokarton kun sufiĉe alta monsumo en sia konto por tiu longa nokta ekskurso per taksio. Nu, ĉio bone finiĝis kaj post mallonga antaŭtagmeza dormripozeto ni transigis nin al la flughaveno kaj forflugis hejmen. Kaj per tio por mi finiĝis la lasta vojaĝo en la landon de la eliranta suno.

Kelkaj eldonaĵoj de KAVA-PECH

De sama aŭtoro

Petr Chrdle: Sen laco por paco – Vivo kaj verko de Bertha von Suttner



Atesto pri la vivo kaj verko de la unua virino, kiu famiĝis kiel verkistino (la plej fama estas ŝia kontraŭmilita amromano *For la batalilojn!*), porpaca aganto en internacia skalo, sed ankaŭ batalantino kontraŭ antisemitismo kaj por la virinaj rajtoj. Kiel la unua virino ŝi ricevis en la jaro 1905 la Nobel-premion pri paco.

159 paĝoj *15,90 EUR*



Eva Vychodilová: Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul

Triopo de amikoj dum ludado erariras, ĝis ili perdiĝas en arbaro. Post travivo de timoplena aventuro ili ekscias, ke ne ĉiu malbono estas nur malbona, sed eĉ ĝi povas esti por io bona. Ĉarmaj koloraj ilustraĵoj de Miroslava Zezulová, tradukis Petro Chrdle.

12 paĝoj *6 EUR*

Petr Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj



Spertoj de la aŭtoro el profesia uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj samrajte kun la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj, ĉefe en la branĉoj de turismo kaj eldonado; sed li priskribas ankaŭ specifaĵojn en la internacia komerco. Tria novprilaborita eldono.

97 paĝoj *10,90 EUR*

Faka Literaturo

Puramo Chong: Kompleksia medicino kaj Saama akupunkturo



Enkonduko en la problemaron de la specifaj koreaj medicino kaj akupunkturo fare de profesoro de orienta medicino, kiu ne nur instruas en universitatoj en Usono kaj Koreio, sed havas grandajn praktikajn spertojn el la multjara gvido de privataj orientmedicinaj klinikoj en ambaŭ landoj. 20 x 28 cm, solide bindita.

267 paĝoj *32 EUR*

Radka Dvořáková: Perrefleksa terapio kiel memhelpo



Memserva kuracmetodo: Kion tuŝi, se io min doloras. Siajn konsilojn la aŭtorino ofertas surbaze de siaj praktikaj spertoj en la formo de instrukcioj, kiel oni povas helpi al si mem. La teksto estas kompletigita je multaj kompreneblaj koloraj bildoj.

79 paĝoj *12,90 EUR*

Valeria Sipos, Ulrich Schweiger: Ne kredu ĉion, kion vi pensas Instrukcio por sana kaj feliĉa vivo



La cerbo estas la plej granda mirindaĵo, kiun la homa korpo povas prezenti. Ĝi estas ekstreme utila ilo. Sed se vi tro naivkrede uzas ĝin, ekestas danĝeroj kaj riskoj. La informoriĉa kaj profunda faklibro priskribas en distra stilo, kiamaniere per ĝusta kompreno de la riskoj kaj kromefikoj de la cerbo vi povas efike apogi vian psikan sanon. Kun multaj kazoekzemploj. Tradukis Alois Eder.

304 paĝoj *18 EUR*

Lingva literaturo

Bent Jensenius: Bonvenon en nia mondo



Legolibro skribita en simpla Esperanto estas konvena precipe por komencintoj kaj progresantoj en lernado de Esperanto. Sed ĝi povas esti utila ankaŭ por spertaj esperantistoj, ĉar ĝi prezentas trarigardon tra la Esperanto-movado en la mondo. Dua, aktualigita eldono.

127 paĝoj, *13,20 EUR*



Sabine Fiedler – Pavel Rak: Ilustrita frazeologio

Esperanto-frazeologio kun klarigoj de unuopaj proverboj akompanataj per spritaj desegnaĵoj de Pavel Rak kaj ekvivalentoj en kelkaj naciaj lingvoj. La dua eldono. Temas certe pri libro, kiun devus konsulti ĉiu esperantisto, kiu volas pli profunde ekkoni la riĉecon de la internacia lingvo.

144 paĝoj *13,50 EUR*

Jana Melichárková: Esperanto por infanoj / Esperanto pro děti (Du volumoj)





Nove ellaborita baza lernolibro de Esperanto por infanoj, kie la teksto estas akompanata de abundaj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková. La lernolibro direktita al ĉeĥlingvaj infanoj, tamen facile adaptebla ankaŭ por aliaj lingvoj, ĉar escepte de dulingva vortareto komence de ĉiu leciono ĝi estas skribita nur Esperante. En du volumoj.

74 kaj 104 paĝoj *4,50 kaj 6 EUR*

Beletro

Bertha von Suttner: For la batalilojn!



Kontraŭmilita romano, ĉefverko de la Nobel-premiito, konsiderata biblio por pacistoj kaj ĉiuj pacamaj homoj. Ĝi estas verkita fine de la 19a jarcento, sed perdis nenion el sia aktualeco. Ĝi estas envicigita en la serion „Oriento-Okcidento“ kiel ties 57a numero.

472 paĝoj *39 EUR*

Martin Stuppnig: Home en senhomeco



Rememoroj de la aŭtoro pri la milito, kiam li estis devigita batali por la venko de la Tria Imperio. La unua parto priskribas liajn travivaĵojn en la kruela batalo ĉe Monte Cassino, la dua liajn aventurojn en angla militkaptitejo en Afriko. El la germana tradukis Jozefo Horvath. Aldonaĵojn pri la bataloj ĉe Monte Cassino, militkaptitejoj en Afriko kaj pri la aŭtoro verkis Petro Chrdle. Tria solide bindita eldono.

Dua eldono, 205 paĝoj *17,70 EUR*

Sabine Dittrich: Heredantoj de silentado



Romano, respegulanta komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj post la dua mondmilito. Junan judan germaninon, kiu volas ekscii ion pri siaj antaŭuloj, gvidas ŝia esploro al Prago. Tie ŝi ne nur renkontas amon al simpatia ĉeĥa instruisto, sed ankaŭ ekkonas la malnovajn historiajn vundojn kaj la restantajn gutojn de malamo. Aldonita konciza historio de la rilatoj inter germanoj kaj ĉeĥoj sur la teritorio de Ĉeĥio. El la germana tradukis Aleksandro Montanesko. Solide bindita.

144 paĝoj *15 EUR*

Porinfana literaturo



Gabriela Kopcová: Kosmofabeloj por bona nokto
Fabeloj pri planedoj

Dek kvar mallongaj fabeloj, kiuj rakontas pri infana Fabelkosmo kaj ĝiaj misteraj planedoj kaj iliaj strangaj enloĝantoj. Tamen ne mankas tie ankaŭ reĝidoj, drakoj kaj aliaj figuroj el niaj konataj fabeloj. Ĝin abunde kaj ĉarme plibeligis per koloraj ilustraĵoj la aŭtorino mem. El la ĉeĥa ĝin tradukis Miroslav Malovec. Solide bindita.

96 paĝoj *12 EUR*



Ottfried Peußler: La malgranda fantomo

Dum malbona vetero la malgranda fantomo kutime pasigis la fantoman horon en la kastela muzeo, inter malnovaj bildoj kaj kirasoj, inter pafilegoj kaj lancoj, inter sabroj kaj kavaleriaj pistoloj... Sed kion fari, se la fantoma horo subite ne plu funkcias kaj necesas iri inter homojn? Klasikaĵo de la germana literaturo porinfana prezentas universalan rakonton pri amikeco, kuraĝo kaj infana sprito. Rekomendida por ĉiu aĝo. Tradukis Kirilo Brosch

113 paĝoj *9 EUR*



Leif Nordenstorm: Arne, la ĉefido

Aventura historia rakonto el la vikinga epoko. La avo de Arne estas vikingo. En la vilaĝo aperas du fremduloj. Kiuj estas la viroj? Ĉu povas libera homo kaj sklavo ligi amikecon? La facile legebla libro taŭgas por junuloj, sed ankaŭ por ĉiuaĝuloj. Solide bindita.

119 paĝoj *15 EUR*

Kompletan oferton vi trovos ĉe https://kava-pech.cz/esperanto

Petr Chrdle

ĈINIO, KOREIO, JAPANIO

Landoj similaj sed diferencaj

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Luděk Neužil

Kontrollegis: Pavol Petrík kaj Jozefo Horvath

Eldonis KAVA-PECH kiel sian 235an eldonaĵon,

la 95an en Esperanto

La unua eldono, 2022



Petr Chrdle (1946) doktoriĝis en la fako de elektroniko kaj okupiĝis precipe pri aŭtomatigaj sistemoj ĉe fervojo kiel gvida esploristo de Fervoja Esplorinstituto Prago. Krome li neregule instruis kiel gasta docento en Teknika Universitato Prago kaj Trafika Altlernejo Žilina (filio Prago). En 1991 li fondis privatan klerigan agentejon KAVA-PECH (akronimo de la ĉeĥa) kaj samnoman eldonejon. Dum sia agado li uzas ankaŭ Esperanton egalrajte kun la ceteraj 3 laborlingvoj de KAVA-PECH (la ĉeĥa, angla kaj germana).

En lia eldonejo estas el la ĝisnunaj 235 libroj proksimume unu triono en Esperanto. Danke al ili estas KAVA-PECH enskribita en la ĉeĥa libro de rekordoj kiel la ĉeĥa eldonejo eksportanta siajn librojn en la plej multajn landojn de la mondo. Li estas membro de la Asocio de Ĉeĥaj Eldonistoj kaj Librovendistoj SČKN.

Kiel esperantisto li aktivas en la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies prezidanto li estis dum 2 elektoperiodoj (1987-1993), sekve vicprezidanto (ĝis 2011) kaj en Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kie li funkciis kiel senata sekretario ĝis 1994. De 1987 ĝis 2010 li estis komitatano A de UEA kaj en la periodo 1998–2001 ĝia estrarano respondeca pri faka kaj scienca agadoj. Ekde 2010 li plenumas la funkcion de la ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj ankaŭ membras en la muzea grupo de ĈEA, en kiu li respondecas pri internaciaj rilatoj de Esperanto-Muzeo en Svitavy. Li estas honora membro de ĈEA kaj UEA.

El la verkaro de Chrdle ni nomu *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*, en kiu li resumis siajn spertojn en tiu fako, la lernolibron *Esperantem za tři měsice* (Per Esperanto post tri monatoj) kiun li verkis kun sia edzino Stanislava Chrdlová, ĝian kompletigitan version *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z) kun multaj senpage elŝuteblaj didaktikaj helpiloj en la reto kaj la verkon pri la vivo kaj verko de la nobelpremiito Bertha von Suttner *Sen laco por paco*.

ISBN 978-80-88326-24-3

K A V A - P E C H